

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

Retpaĝo: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html>

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 109, oktobro 2013

Nia proverbo: La babilema birdo neniam starigos sian neston.

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani 00355682080677, shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: 0035583222326, gjergji_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430, agimperaj@yahoo.it); Sajmir Beqiraj: (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com); Nehat Sokoli: 00355682587699, nehatsokoli@gmail.com; Engjell Gusho: 00355692350111, engjellgusho@yahoo.fr; Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ; Luan Jaupi: 00355682165870, luanjaupi@hotmail.com; Enkela Xhamaj: 00355685135105, xhamajkl@yahoo.com;

La enhavo

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

Albanio- la 71-a membro de UEA

Bonetose

Seminario en Rumanio

Novaĵoj el nia enlanda movado

Revigliĝas la junulara movado

Niaj membroj

Vizitoj

Verdaj novaĵoj

Monda pupekspozicio

Kurso de Esperanto en Brazilo

Kongresoj

Jarfina festivalo en Nordlingen

Neforgesebla NASK 2013

Nia propagando

Intervjuo debato en televizio

Kial studi Esperanton

Strategio esperiga

Niaj leteroj

El Francio,, Makedonio, Pollando, Brazilo. Italio, Germanio

Artikoloj

Albanaj naciaj kostumoj

Ateno aŭtunofrue

Prevento kontraŭ memmortigo

Kontraŭ la seksperforto

La lasta rifuĝejo de la friponaĵistoj

Intervjuo pri Albanio

Novaĵletero

Beletraĵoj

Ŝercaĵoj

Anekdotoj

Brazila ekspozicio de gravuraĵoj

Fragmentoj el la romano “La inferaj vojoj”

Fragmento el la romano “La Palaco de la sonĝoj”

Ni kaj ILEI, UEA, AIS

Albanio en UEA

Albana Esperanto-Asocio fariĝis la 71-a landa asocio de Universala Esperanto-Asocio. La Komitato akceptis ĝian aliĝpeton en kunsido kun 37 voĉoj por, neniuj kontraŭ, kaj unu sindeteno. AEA estis fondita en 1991 kaj komence nomiĝis Albana Esperanto-Ligo. Ĝia prezidanto estas inĝ. Shaban Hasani.



Bonetose kaj samtempe diligente

Dum la tria semajno de septembro la pola urbo Poznano reeĥas esperantan parolon, ĉar tradicie dum la semajno okazas la **interlingvistika sesio** jam ekde 1998 en la universitato Adam Mickiewicz kaj semajnfine la kultura aranĝo Arkones jam la 29-an fojon.

La aktuala interlingvistika grupo - inter ili tri brazilanoj, du svisoj, po unu germanino, rusino, hungaro kaj polo - komencis sian trian studjaron. Istvan Ertl prezentis panoramon de la nuntempa esperanta literaturo. La grupo laboris en tri specialiĝoj: pri internacia kaj interkultura komunikado (lingvistikaj kaj sociologiaj aspektoj) kun Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor, pri literaturo (beletra tradukado) kun István Ertl kaj pri lingvopedagogio kun Katalin Kováts kaj Ilona Koutny.

La trian specialiĝon eblis partopreni por la grupo de la **unuĵara instruista trejnado** komuna aranĝo de IS de UAM, ILEI kaj <edukado.net>. La dekunu aliĝintoj (el Brazilo, Francio, Germanio, Hungario, Japanio, Kanado, Pollando kaj Portugalio) laboris fervore pri metodologio de lingvoinstruado kaj speciale pri tiu de Esperanto. Ili konatiĝis ankaŭ kun tiklaj problemoj de la esperanta gramatiko sub la gvido de Ilona Koutny kaj donace povis partopreni en kelkaj okupoj de la interlingvistika grupo.

Al la programo kontribuis Stefan MacGill, eksprezidanto de ILEI, nuna vicprezidanto de UEA, pri kursplanado surbaze de la kurso 'Esperanto etape' (www.ilei-mondo.info). La merkreda komuna vespero okazis en bona etoso kun skeĉoj de la ĵus nomito, muziko de Suzanna Kornicka kaj komuna kantado ĉe tabloj kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Kelkaj el la kursanoj ricevas faciligon por la partopreno pere de stipendioj ofertataj de UEA, ILEI kaj la fonduso ESF. Emfazendas, ke la post-diploma trijara kurso estas la sola en la mondo de tia amplekso, kiu okazas en kaj estas rekonata de ŝtata universitato. La nomitaj instancoj ofertadas stipendiojn, ĉar ili

komprenas la gravecon ne nur lanĉi novajn iniciatojn, sed ankaŭ protekti ĝisnunajn atingojn. Tiu trijara kurso finiĝos en 2014 – UEA, ILEI, UAM kaj aliaj aktive nun laboras, por ke nova tri-jara kurso komenciĝu en septembro 2014.

Vidu foton kaj plion en <edukado.net> ĉe <http://edukado.net/novajhoj/montri?id=381>. Multaj kursanoj lokis pliajn fotojn en la reton.

Seminario en Rumanio

Informe al: Landaj Sekcioj de ILEI.

Ni sendis al vi raporton pri la seminario en Rumanio, kiu aprobis la rezolucion, kiun ni nun sendas al vi. La estraro de ILEI same aprobis ĝin – UEA estas invitita ĝin ankaŭ subteni. La rezolucio markas la Mondan Tagon de Instruistoj, kiun proklamis Unesko, en la 5a de oktobro. Pliaj kunvenoj traktos ĝin, i.a. en Bydgoszcz fine de septembro, kaj Pedagogia Tago en Budapeŝto en ĝuste la 5a de oktobro 2013 (sabato). La sekcioj de ILEI, kaj la eŭropaj Landaj Asocioj ricevis informojn pri tiu tago; partoprenontoj kaj salutleteroj bonvenaj!

La rezolucio estas tradukita al la angla, germana, rumana (la enkonduko bezonas aktualigon), finna kaj hungara. La estraro de ILEI promesis tradukojn en la slovaka kaj franca. La traduktasko apartenas unuavice al la ILEI-sekcioj, LA estas invitataj traduki ĝin nur en landoj sen ILEI-sekcio aŭ reprezentanto, aŭ en kazoj, kiam la sekcio ne kapablas plenumi la taskon. Do, LA de UEA, bv. Unue preni kontakton kun via ILEI-sekcio, por ke oni ne laboru duoble kaj nasku konkurencajn tradukojn!

Ni afiŝigos la rezulton ĉe retejoj de Unesko; ni rekomendas ĝian uzon landnivele – jen plia kialo por kunlaboro inter LA de UEA kaj LS de ILEI. Inter la ebloj estas sendi ĝin al la Unesko-komisiono en via lando, kaj/aŭ al landa sindikato de instruistoj, eventuale kune kun aliaj proponoj por kunlaboro kun tiuj instancoj. Ni volonte ekscios pri viaj realigoj.

Al la sekcioj de ILEI ni sendas la rezolucion duafoje; intertempe la hungara enkonduko estas aktualigita kaj germana traduko estas pretigita.

Mi salutas vin el trajno survoje kontribui al la interlingvistika kaj instruisto-trejna kursaro kaj la kulturfesto Arkones, ambaŭ en Poznano, Pollando

Antaŭdankon pro via kunlaboro!

Novaĵoj el nia enlanda movado

Revigliĝas la studenta esperantista Movado

Reveninte el la feriado en Saranda, min telefonis nekonato, junulo. “Mi nomiĝas Ili Gerdupi, - sin prezentis li. -Mi estas serĉinta vin tra la reto kaj sukcesis trovi vian telefonnumeron, ĉar la malnova yahoo adreso ne plu funkciis. Mi interesiĝas eklerni Esperanton kaj petus vin montri kelkiun lernokurson pri tio”.

Delonge mi estis cerbuminta kiamaniere revigli nian enlandan junularan esperantistan movadon, almenaŭ kiel en la unua jardeko 1991-2001. Tutan tempon mi klopodis varbi ĉe la mezlernejoj aŭ universitatoj novajn kursanojn. Kaj jen, alvenis la momento taŭga.

“Jes, kial ne- respondis mi. -Des pli, la kurso estos senpaga, en mia hejmo. Se vi trovos geamikojn same interesataj pri Esperanto bonvolu venigi ankaŭ ilin”.

Ni difinis la horaron kaj baldaŭ komenciĝis la nova lernokurso,. Ĉeestis **Ili** mem, studento de Juro en la ŝtata universitato, **Ada**, abiturientino en gimnazio, **Enis** studentino de la unua jaro de la Informacia Teknologio en privata universitato.


Mi volonte donacis al ili po unu lernolibro kaj kelkajn revuojn.

Ni jam pasis la unuajn ok lecionojn el 20 entute por la elementa nivelo.

Mia intenco estas krei sendependan junularan grupon. Kaj ili konsentis. Des pli ke ĉiuj partoprenas aktive de kelke da tempo en alia neregistara organizaĵo “La Volontuloj de Albanio” kies celoj kongruas al niaj humanismaj.

Mi ege esperas ke el tiu ĉi grupeto kreskiĝos pli larĝa nova junulara movado studenta kiu daŭrigos la agadon de nia asocio en la venontaj jaroj.

Gjergji Gusho



Ada Tafaj,



Evis Gjini



Ili Gerdupi



Niaj membroj



S-ro Tonin Ĉobani, nia membro, verkisto, preleganto en universitato, fakulo de masmedio

Tatjana Loskutova renkontas la albanajn fajrobrigadistojn



Dum sia restado en Albanio s-rino Tatiana Loskutova vizitis ankaŭ teamon de fajrobrigadistoj, ĉar ŝi mem prelegas en aliternejo pri tiu fako en Ivanovo, Rusio

Shaban Hasani

Vizito de Martha Otto



En kafofiro en Tirana, dum la vizito de s-ino Martha Otto, esperantistino kaj bahaanino, deĵorinta longajn jarojn ankaŭ en via lando

Foto: Arben Mezini

El niaj leteroj

Kara Bardhyl !

Antaŭ du tagoj atingis min denove libro eldonita de Tomasz : La sloganoj el ŝtonoj de Illyet Aliĉka

Tuj mi deziris ekscii pri tiuj sloganoj kaj finleginte la rakonton kaj poste la sekvajn unutrajte mi subite eksentis la neceson cerbumi pri la nocio de absurdo !!!

Kutime la homoj tuj ekpensas pri Kafka kaj la absurdo en la burokrata mondo, sed la homoj, kiuj legas la rakontojn de albanaj verkistoj rapide komprenas, ke en Albanio la absurdo estis volvola metodo de obeigado, eĉ torturado ! Dank'al la diverslingvaj jamaj tradukoj de la verkoj de Ismail KADARE okcidenteŭropanoj tuj kapablis kompreni malantaŭ la imagitaj kaj plejofte diversepokaj lokiĝoj de liaj romanoj, kiel disvolviĝas la vivo en tiu eta enŝlosita ŝtato. KADARE sukcesis kuraĝe atentigi pri la vivo de siaj samlandanoj, sed kia estis la eldonkvanto de liaj romanoj dum la regado de Enver Hoĝa ???? Kaj : la romanoj estas majstre skribitaj, sed ĉu ili ne atingis ĉefe klerulojn !

Ylljet Aliĉka havas la bonŝancon vivi nun en libera Albanio. Kaj ĝuste nun liaj rakontoj plu gravas ! Ili des pli gravas, ke ili tute nude kaj perkute rakontas pri la travivaĵoj de "veraj homoj", de homoj, kiuj vere "trasuferis" tiun epokon ! Li bonege kapablas komprenigi, ke ĉiu ajn civitano - se eblas paroli pri civitaneco en tia ŝtato - povis, je ĉiu momento, pro homamemo, pro la deziro interveni por malhelpi maljustaĵon , iĝi malliberulo. Aliflanke krude aperas la dependeco de tiuj, kiuj profitas pere de ŝmirmono la senpovon de siaj kunvivantoj, eĉ en kadavrejo !

Per liaj rakontoj li atingos ne nur intelektulojn ! Ĉar jen : nekredeblas kiom regas malscio pri Albanio ĉe miaj samlandanoj ! Ankaŭ pri la nuna vivo de viaj nun liberaj kuncivitanoj Illyet Aliĉka donas interesan bildon, sed ĉi-kaze eblas eĉ amuziĝi, ĉar kio okazas al tiuj « herooj » dependas ofte nur de ilia snobismo kaj deziro de rapida riĉiĝo sen troa laboro en tiu por ili ankoraŭ nova kapitalisma vivo. La trompitoj ofte mem akceptas la trompon kaj tutmaniere ili nun havos la rajton plendi.

Ke ankaŭ tiu libera vivo ne aŭtomate kondukas al feliĉo, tion cetere same majstre pentris Fatos Kongoli en Hunda haŭto.

Dank'al viaj tradukoj, kara Bardhyl, vi denove rolas kiel ambasadoro de viaj verkistoj kaj de via popolo, en mondo, kie - laŭ la amasmedioj - gravas nur la nuno !

Espereble baldaŭ aperos ankaŭ via traduko de la rakonto de KADARE, la Palaco de sonĝoj !

Vere, via ambaŭa laboro estas mirinda !

Mi aldonu, ke en nia mondo plurestas iaspecaj Albanioj ! Mi pensas ekzemple pri Norda Koreio ! Ankaŭ tie la homoj ŝajnas travivi similan koŝmaron. Sanĝiĝas la epokoj, pluas ekzemploj de ege senkompataj diktaturoj !

Jen kion mi deziris komuniki al vi !

Agrablaĵojn al vi !

Edmond LUDWIG

- Bonan matenon!

Fulma mesaĝo via ! Nu, ĉio ŝajne bone (mi ne aŭdacis tajpi *plej bone* !) disvolviĝas ...

Surprizo: mi ĵus spektis -sur la ekrano de la komputilo- filmeton pri la konferenco de Tatiana !... Mi eĉprovis konstati, ke vi esprimiĝas en "iu lingvo" tiom sperte kiel en esperanto ! Hi hi hi !

Ankaŭ amuzis min -komence de la filmeto- la infaneton, kiu montris sian umbilikon al la spektantoj ! ..

Povas esti, ke viaflanke ankaŭ vi ricevis mesaĝon de samideano Jacques BARATIE (franco), kiu kompilasĉiumonate aperintjn filmetojn en Eo...ĉifoje, 46 !!! por julio/aŭgusto.

Mi aldonas "mortan" ret-titolon kiel ekzemplon. Perfekta reportaĵo de via nacia televido.

Ĉu mi sendu al vi la aluditajn mesaĝojn (kun la listo -"parolantaj filmetoj" !-).

Plej amike

Pol Denis, Francio

- Estimataj gesamideanoj,
mi tralegis viajn mesaĝojn en kiuj vi skribis pri la nesukcesaj provoj instrui Esperanton en bazlernejoj, iam pro direktoroj iam pri aliaj aferoj. Do, delonge en Prilep, kiam Makedonio estis parto de Jugoslavio, (je la fino de 80-aj jaroj de pasinta jarcento)s-roj Metodi Galeski kaj Naŭm
Celakoski unue preparis Programon por eklernado de la internacia lingvo Esperanto en bazlernejoj. Ĝi estis unu el plej bonaj en tiamaj Jugoslavio kaj ĝi estis akceptita flanke de Ministario por klerigo kaj edukado en Makedonio. Dua paŝo estis prepari sufiĉe da instruistoj kiuj eble instruas en la lernejoj. Pro tio ni alvokis ĉiuj instruistoj lingvistoj (de franca kaj rusa lingvo) kiuj havis mankon de la lernohoroj en iliaj bazlernejoj, lerni Esperanton, unue komencan "A" kurson kaj poste daŭrigan "B" kurson. Tiamaniere sukcese "B" kurson finis ĉirkaŭ 10 instruistoj - lingvistoj (poste en dua grupo finis daŭrigan kurson plus 8 personoj). De la Ministerio por klerigo kaj edukado ni ricevis permeson komenci kun instruadon en la bazlernejoj sed sub la 2 kondiĉoj: havi sufiĉe da lernantojn (tion ni sukcese plenumis) kaj trovi monon por salajro, ĉar Ministerio ne donis al ni monon por lernohoroj por Esperanto. Pro tio tuta laboro falis en akvo, ĉar instruistoj atendis solvi siajn problemojn kun la manko da lernohoroj kaj kompreneble manko da mono pro tio. Antaŭe kaj poste en bazlernejoj ni preparis kaj instruis dekoj da kursoj, ĉiam kiam en iu bazlernejo ni havis esperantiston instruiston - kiu helpis nin prepari la kurson, kaj donis al ni lernantoj en iliaj klasoj. Do, ni tiam instruis kursojn senpage kiel volontuloj.
Antaŭ kelkaj jaroj ni denove serĉis permeson de la Ministario klerigo kaj edukado en Makedonio kun sama Programo kaj ĝi denove estis akceptita sed laŭ samaj kondiĉoj, ĉar neniu de la instruistoj volis instrui senpage.
Do, pri la instruado en la lernejoj devas iri paŝo post paŝo, kun kvalita programo, bone edukitaj instruistoj, kaj serĉi aŭ varbi lernantoj en bazlernejoj. Tiamaniere laboris ni esperantistoj en Prilep Makedonio. Nun en Prilep estas 20 personoj kiuj finis daŭrigan "B" kurson, ne ĉiuj pretaj instrui, sed ni povas elekti minimume 5 personoj kiuj eble povus instrui esperanton en bazlernejoj.
Sincere
Viktor Galeski, Prilep, Makedonio

- Gratulegon.

Mi povas konstati ke via agado rapide kreskas.

Mi spertis tion ne nur restante en Albanio, sed ankaŭ post la akcepto de UEA

kiel landan, oficialan asocion.

Gratulojn al cxiuj kiuj laboras je tiu kampo.

Amike -Via **Stanislavo Mandrak**

- Dankon pro la sendo de la Bulteno kaj gratulon!
Samideane,
Aloísio Sartorato
Rio, Brazilo

- Kara,

bonega bulteno! chu mi povus aperigi beletrajhojn el ghi lau mia placho?

Ĉu la numeroj de via revuo elpreneblas en iu retpaĝo?

Amike,

JJS, Cinio

- Kara, koran dankon: mi legos kompreneble!
Via **Elda Doerfler**, Italio

- Tre kara samideana amiko

Nome de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, kaj de la teamo de la Esperanto-Fako de LBV mi korplene dankas Vin pro aperigo de 2 artikoloj de la verkisto Paiva Netto: "*Amikeco, jen mia Religio*" kaj *Toksoj: Letero de filo al lia patro*. Krome mi dankas pro aperigo de niaj leteroj al Vi.

Mi ankaŭ kaptas la oportunun gratuli Vin pro ci tiu aŭgusta numero de via buntkolora kaj riĉenhava Bulteno. Ĝi interese kaj pensige bildigas gravajn scenojn de la albana (aparte) kaj de monda (amplekse) E-movado. Paŝu pluen, via laboro indas! Ricevu reciproke en via koro ĉi tiun eldiron de la edukanto Paiva Netto:

"Flegu la Spiriton, reformu la Homon. Kaj ĉio transformiĝos".

Nur bonon al Vi!

Kore kaj samideane salutas

Maria Aparecida da Silva

www.bonavolo.com

www.tbv.com.br/esperanto

- Dankon, pro la lasta numero!

Renato Corsetti, Italio

- Bonan matenon,
dankon por sendi al mi vian bultenon, kiu mi ricevis ĵus antaŭ kelkaj minutoj - ankoraŭ legante, sed jam gratulante vian enigon al UEA!

Nu, la MONDOGAZETO ja ne estas 'eldonata' kiel periodaĵo. Ĝi estas retgazeto kiu estas aktualigita ĉiufoje iu enigis artikolon. Pro tio neblas krei .pdf aŭ docx (aŭ ia ajn dokumento el ĝi)... kvankam... tio ja estus ĉarma ideo... mi pripensu...

Mi invitas vin aliĝi kaj estus feliĉa bonvenigi vin ĉe al la MONDOGAZETO! Ankaŭ ni havas RSS-fluon per kiu vi povas regule ricevi la novaĵojn en via RSS-legilon.

Amike salutas
Wolfgang (Lupiro)

Verdaj novaĵoj



Monda Pupekspozicio 2013 en la urbo Higashikagawa

‘Ĉi tiu Pupekspozicio estas okazo por lerni pri aliaj kulturoj kaj kreskigi la popolan interkompreniĝon’ emfazis dum sia parolado la Ambasadoro de Pollando en Japanio, S-ro Cyryl Kozaczewski, dum la Malferma Ceremonio de la 3a Monda Pupekspozicio, ĉijare dediĉita al Pollando kaj nun okazanta en la urbo Higashikagawa.



Aparte altiris la atenton de la ĉeestantoj kaj la amaskomunikiloj, ke la edzino de la Pola Ambasadoro kaj iliaj du filinoj portis tradiciajn polajn kostumojn.

La Malfermon ĉeestis la Guberniestro de Kagawa, S-ro Keizō Hamada, la Urbestro de Higashikagawa, S-ro Hideki Fujii kaj aliaj aŭtoritatuloj pri kulturo kaj turismo de la regiono. Pupambasadorino veninta el Pollando, S-ino Agnieszka Mozer, varme invitis la publikon viziti la ekspozicion, kiu daŭros ĝis la venonta 6a de oktobro.

La kolekto, farita danke al la helpo de Esperantistoj tra la mondo, kalkulas je pli ol 800 pupoj el 44 landoj kaj portantaj tradiciajn kostumojn. El ili, 20 pupoj estas albanaj kaj ili parte prezentas la grandan diversecon de kostumoj kaj tradicioj en Albanio.

La Pupekspozicio estas evento ĉiujare organizata de la Nova Turisma Asocio en la urbo Higashikagawa (Kagawa, Japanio) <http://www.hnt.or.jp> kaj okazanta en ĝia sidejo en Hiketa (Izutsu Yashiki, 769-2901 Higashikagawa, Hiketa 2163, Japanio; Tel. +81 879-238557). Ĉijare ĝi kalkulas je la aŭspicio de la Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo de la Pola Respubliko, la Ambasadro de Pollando en Japanio kaj la pola provinco Lubuŝio.

Etsuo Miyoshi

Prezidanto



Kurso de Esperanto ĉe prestiĝa klerigejo en Brazilo

Komenciĝos la 12an de aŭgusto la baza kurso de Esperanto, ĉe la Universitato de Sanpaŭlo – USP. La kurso daŭros kvar monatojn kaj la lecionoj okazos dufoje en la semajno, lunde kaj merkrede, de la 14h ĝis la 16h, kaj ĝin gvidos la studentino pri Beletro Karina Oliveira.

Ĉe la fino de la kurso, la lernantoj ekzameniĝos por ricevi atestilon de la Interfaka Centro pri Lingvoj de USP. La Centro pri Lingvoj havigas ankaŭ kurson de Esperanto je daŭriga nivelo. Por pliaj informoj, vizitu la retejon de Centro pri Lingvoj.

Festo en Kongo

Okaze de la 126-jariĝo de la internacia lingvo, Konga Esperanto Virina Asocio okazigis feston en la urbo Kinŝasa (Demokratia Respubliko Kongo), la 27an-de julio. Ĉirkaŭ 84 personoj partoprenis, el kiuj 25 estis geinfanoj kaj 13 geamikoj el Esperantista Grupo de Sankta Rita. La programo konsistis el la nacia himno kaj esperanta himno; oferto de diversaj lernejoj materialoj por la geinfanoj; prezentado esperante de la infanoj. La partoprenantoj spertis belan kaj ĝojan etoson, manĝante, trinkante, dancante kaj memorfestante Esperanto-datrevenon.

Koran bonvenon al la 30-a IF en Nördlingen!

La klerigejo - komforta porfamilia hotelo, novkonstruita en 2007 - denove invitas nin, kun luksaj ĉambroj, ofte kun balkono kaj TV. La domo disponas pri **saŭno**, kiun ni ofertas al vi (senkoste) ĉiun duan tagon. Nördlingen famas pro sia mezepoka orgino: Rondiru la urbon sur la komplete konservita

urba murego aŭ vizitu la 90 m altan preĝejan turon 'Daniel'.

[Niaj kotizoj](#) inkludas tri manĝojn tage, la loĝigon en komforta ĉambro kun duŝo kaj necesejo - kaj la tradiciajn silvestrajn bufedon, balon kaj novjaran brunĉon.

Nova **[varbilo/informilo](#)** (iom ŝanĝita, kun koloraj fotoj pri Nördlingen kaj la tuttaga ekskurso) estas preta kaj elŝutebla en nia interreta (start-)paĝo sub "Dua Informilo". Ĝi aperis en PDF-formato kaj estas laŭplaĉe printebla, same ankaŭ la papera versio de la (flava) **[aliĝilo/informilo](#)**. Bonvolu disdoni kaj informi ankaŭ viajn geamikojn kaj konatojn.

Ni preparas interesan programon: partoprenu dumtage en prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj - aŭ paralele en kursojkaj promenoj. Ni antaŭvidas variajn distrajn ofertojn, i.a. lumbildajn prelegojn, jubilean vesperon (kun jubilea torto kaj ŝaŭmvino!) kaj koncertojn. En nia **tuttaga ekskurso** (fakultative, 30 dec 2013) ni vizitos aŭtobuse la bavaran 'Rothenburg ob der Tauber' - simbolo kaj prototipo de germana mezepokeca urbo. Tagmanĝo en la proksimeco de la urbodomo (menuo inkl. en la biletprezento).

Nia IFgastejo *Knajpo* atendas vian ĉiutagan (kaj noktan) viziton, ĝuu la "faman trinkejon enEsperantujo", niajn bavaraĵojn (lokajn) bierojn, vinojn kaj koktelojn, kapuĉinon, kafon kaj kukon ... plus nian konatan IF-etoson. Dum multaj jaroj nia IF-bistroo akompanis vin kun profesieca oferto kaj garantiis bonhumoran komunecon ... **Plilongiga tago:** ni antaŭvidas matene prelegon, posttagmeze viziton al najbara urbeto Oettingen, kun promeno kaj vizito al kafejo. Vespere estu surpriza vespero, kun lokaj bieroj ...

Alveno Nördlingen: Najbaraj flughavenoj estas München, Nürnberg aŭ Stuttgart, celo de prezindaj flugoj estas ankaŭ Memmingen. **Aŭto-veturantoj** havos grandan (senkoston) parkumejon antaŭ la domo. **Trajnveturantoj:** Veturu el la menciitaj urboj per interurbaj trajnoj al proksimaj *Aalen* aŭ *Donauwörth* kaj daŭrigu per regiona trajno al Nördlingen. Informiĝu ĉe **www.bahn.de** aŭ petu de ni konvenan rekomendon. Pliaj detaloj en nia interreta subpaĝo **[rekomendoj](#)** (atingebla el la startpaĝo).

Vizitu niajn interretajn paĝojn kaj legu aktualajn informojn:

www.internacia-festivalo.de

Karaj geamikoj, dum 30 jaroj ni ofertis al vi renomajn kaj allogajn seminarion, evidente nun indas pensi al ĝia fino. Bonvenon al nia jubilea kaj adiaŭa IF en Nördlingen!

Utiligu la rabatitajn [kotizojn](#) ĝis 31 aŭgusto resp. 30 septembro, [aliĝu](#) jam nun!

Festu novjare kun ni, ĝuu la IF-etoson - lastfoje kun ni!

Aliĝintoj ricevos la Trian Informilon en novembro, kun rekomendoj pri alveno kaj restado.

Salutas vin elkore kaj ĝojas pri (re)vido,
HDP / Hans-Dieter Platz (organizanto)

[Neforgesebla NASK 2013](#)

21 Aŭgusto 2013 de AIKo



NASK en Raleigh: Fabjo Monteiro el Brazilo prezentas siajn filmojn de “Globeto – interreta televido”. (Foto: Hoss Firooznia)

NASK 2013 estis luma fasko el kulturo, amuzaĵo kaj amikeco, okazinta de la 26a de junio ĝis la 5a de julio meze de la urbo Raleigh en la usona ŝtato Norda Karolino.

Mi estas tre feliĉa pro mia decido partopreni en tiu prestiĝa kursaro jam longedaŭra, komencita en la jaro 1969 kaj daŭre okazigata de la fonduso Esperantic Studies Foundation. Ĝi estis mirinda okazo por praktiki nian lingvon. Partoprenis ĉirkaŭ 50 homoj, ĉefe el Usono, sed ankaŭ el Aŭstralio, Barato, Brazilo, Ĉilio, Kanado, Kolombio, Koreio, Kubo, Germanio kaj Meksiko. Tamen ne gravis la deveno: ni ĉiuj estis anoj de granda familio ligita de frateca amo! Mi ĝoje amikiĝis kun multaj homoj, kaj mi sentis min hejme.

La etoso estis tre agrabla. La universitato William Peace estas vera paradiza ĝardeno: belega, arboplena, silenta. Krome moderna kaj komforta. Ni havis bonan manĝaĵon: matene, tagmeze kaj vespere.

La postbazan kaj meznivelan kursojn instruis Lee Miller kaj Derek Roff. Mi frekventis la superan kurson, gvidatan de la klera kaj entuziasma d-ro José Antonio Vergara. Mi estas ravita pro la kurso kaj pro la fakto, ke la amindaj usonanoj serioze studas kaj parolas Esperanton!

Grava temo de nia kurso estis diskuto pri la rolo por Esperanto en la moderna mondo. Interalie ni analizis eseojn de Trevor Steele (*Ĉu malesperi?*, LOdE, 2011, №10), José Antonio Vergara (*Esperanto estas multe pli valora ol speco de malanĝla aŭ identecofonto de supozata “popolo”*, LOdE, 2011, №11) kaj Jorge Camacho (*La zombia lingvo*, aperinta en *Libera Folio*).

Menciinda estas la mojosa ĵurnalo *La NASKa Fasko*, kiu aperis ĉiutage dum la kursaro kaj legeblas en la [kursretejo](http://lodestone.org/nask) ĉe <http://lodestone.org/nask>. Ankaŭ menciinda estas la ĉarma flago de Esperanto sur la pordo de mia dormoĉambro: ĝi estis manfarita de samideanino Mar Cardenas. Sur la flago videblas mia nomo per orumitaj literoj! Tre emocie!

En la liberaj posttagmezoj ni faris ekskursojn tra la urbocentro, vizitis interesajn muzeojn kaj spektis artfajraĵojn okaze de la datrevenfesto de la sendependiĝo de Usono. Dum la artaj vesperoj ni multe amuziĝis per filmoj, kantoj, ludoj. Ni do havis tre bonan tempon dum la neforgesebla NASK 2013!

Maria Nazaré de C. Laroca

Ĉi tiu artikolo aperis en la aŭgusta-septembra kajero de *La Ondo de Esperanto* (2013).

Ĉe represo bonvolu nepre indiki la fonton paperan (se en presaĵo) aŭ retan (se en retejo):

Papere: *La Ondo de Esperanto*, 2013, №8–9.

Rete: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2013/08/227nask/>

Nia propagando

Temo: La lingvoj de la kariero kaj laŭplaĉaj

La 27-an de septembro 2013, la privata renoma televido Top Channel (www.topchannel.tv) en sia frumatena elsendo “Wake Up” invitis min kaj oficiston de la Brita Konsilio en Tirana por diskuti pri la tiel nomataj karieraj lingvoj kaj nekarieraj lingvoj kaj intereso pri ili far nia junularo.

La prezentisto de la elsendo demandis unue,

pro kia motivo niaj gejunuloj studas la anglan kaj Esperanton?

La angla, diris la oficisto de la Brita Konsilio, estas jam kvazaŭ patrino ankaŭ por albanoj, kvankam ne veras la mito disvastigita ke ili lernas la fremdlingvojn amase, ĉar la nivelo de la lingvosciroj estas tre malalta, precipe pri la tiel nomataj biznesa angla, turisma angla ktp. Hodiaŭ la posedo de la angla estas antaŭkondiĉo por enposteniĝo en diversaj entreprenoj, institucioj, aparte en tiuj kiuj interrilatas al la fremduloj. Tiel, se estas du kandidatoj por unu laborposteno kaj la unua havas dekjaran sperton en la fako sed ne posedas la anglan, li havas malpli da ŝancoj akceptiĝi kompare al la dua kandidato, havanta tri jaran sperton en tiu fako sed posedanta la anglan.

Ĉu Esperanto servus por enposteniĝi? - demandis la prezentisto.

Mi volus rimarki, unue, ke la angla ne estas ankoraŭ “monda lingvo”, ĉar tion parolas bone - malbone nur 10 % de la nia globa loĝantaro. Krome ĝi estas ege dialektiĝinta. Tiel romano verkite en la angla de Barato devas tradukiĝi en la angla de Usono por kompreniĝi.. Tamen, Esperanto ankoraŭ ne estas tiel famiĝinta kiel la ceteraj “grandaj” eŭropaj lingvoj (la angla, la germana, la franca ktp), ĉar ĝi estas relative juna, sed la ties kreinto kaj la unuaj subtenantoj esperis ke iutage ĝi povus fariĝi oficiala almenaŭ por granda ŝtatuniĝo kiel estas hodiaŭ EU. Tamen en pluraj landoj eŭropaj kaj aziaj la atestilon pri la posedo de Esperanto oni estimas same kiel la posedon de alia eŭropa fremda lingvo.

Ĉu havas antaŭecon por enposteniĝi ankaŭ la posedo de dua fremda lingvo, krom la angla?

Jes, respondis la oficisto, ĝi havas antaŭecon, ekz. se vi volas enposteniĝi en internacia turka, sveda aŭ germana kompanio, oni preferus ke vi posedu krom la anglan ankaŭ la respektivan landan lingvon, kompare al la kandidatoj kiuj posedas nur la anglan.

Mi menciis ke Esperanto, se oni posedus ĝin almenaŭ ĝis la dua nivelo povus servi sen probleme en ĉiuj laborfakoj, cetere ĝi ankaŭ aktuale servas en multaj kampoj de la homa agado, kiel turismo, vojaĝado, poŝtoservo. Kelkedekoj da albanaj gestudentoj eĉ diplomiĝis en Pollando dum la periodo 1997-2006 en altlernejo kiu uzas ĝin kiel laborlingvon. Sed albanoj, karakterizataj de notinda pragmatismo, studis ĝin ĉefe nur por akiri plian eblecon por vojaĝi eksterlanden, ĝis la liberaliziĝo de vizoj, ankaŭ por ili, fine de la jaro 2010.

Dum la paŭzo, oni prezentis mallongan dokumentaron pri la situacio de la lingvolernado dum la komunisma erao en Albanio. Tiam la reĝimo tute ignoris la tradiciajn fremdajn lingvojn instruitaj en niaj lernejoj (la franca, la itala, la latina, la malnovgreka...) kaj entrudis la lernadon de la serbokroata (1945-1948), de la rusa (1949-1980), la ĉina (1963-1978) konforme al la politikaj landaj konjunkturoj. Post la 1991 jaro ĉi tiuj lingvoj ne plu instruatis kaj, anstataŭe ilin, en la edukprogramoj ekopupis unuajn lokojn la angla, la germana, la franca, la itala, la hispana, ...

Fine, demandis la prezentisto, ĉu oni povas diri ke la albanaj gejunuloj posedas jam la fremdlingvojn?

La oficisto de la Brita Konsilio sin esprimis modere, dum mi deklaris pesimisme ke mensogas ĝenerale tiuj studentoj kiuj diras tion, ĉar ne nur enlande sed ankaŭ en la aliaj eŭropaj landoj inter 100 gestudentoj nur 2 el ili povas kontentige posedi la lingvon. Ekzistas ankaŭ instruistoj de la angla kiuj ne scipovas kompili kaj skribi leteron en la angla...

Bardhyl Selimi

<http://top-channel.tv/video.php?id=31430>

<http://top-channel.tv/video.php?id=31430#.UkXc0Bb1yTc.email>

Strategio esperiga

Kvankam la esperanto movado en Albanio datiĝas almenaŭ ekde la jaro 1907, kun la pastro katolika Lazar Shantoja, mortpafigita de komunistoj en 1945, ĝi evoluis pli rapide post la jaro 1990.

Tiam oni permesis la fondon de la tiel nomataj neregistaraj organizaĵoj, inter kiuj la Albana Esperanto Ligo agnoskita de Ministerio de Kulturo maje 1991 estis el la unuaj. Sekvis vigla agado por propagandi, instrui, eldoni, traduki, komunikiĝi kun eksterlando. Tiam aktivis pluraj samideanoj en kelkaj ĉefaj urboj. Post la jaro 1997 ni sukcesis aligi en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz kelkdekojn da studentoj el kiuj almenaŭ 30 bakalaŭriĝis kaj du magistriĝis. En ISTK Esperanto estis baza lernolingvo.




Sed la Ministerio de Edukado ankoraŭ ne agnoskas iliajn diplomojn, signitaj de AIS profesoroj, simple pro fakto ke AIS estas jure agnoskita en la juĝejo en San Marino kaj ne de Ministerio de Edukado de tiu eta ŝtato!?



Ekde tri jaroj ankaŭ albanoj povas libere moviĝi tra la Ŝengen zono. Tiu pozitiva atingo de albanoj, paradokse efikis negative en nia varbado por Esperanto, ĉar verŝajne antaŭe niaj junuloj uzis Esperanton por moviĝi libere eksterlanden. Sed ankaŭ la Ministerio de Edukado kaj la registara lingva politiko, favorante la anglan, malatentas pri la ceteraj fremdaj lingvoj kaj malfavoris ankaŭ la enkondukon de Esperanto en la lernejoj kaj universitatoj. Estas menciinda ke la iama albana registaro

de ĵus sendependigita Albanio, en la jaro 1922 subtenis la proponon por enkonduki Esperanton en la bazaj lernejoj.

Al tio aldoniĝis ankaŭ la maljuniĝo de nia samideanaro kaj retiriĝo de parto el ili de la movado. Des pli ke la ŝtato postulis la registriĝon de la Ligo en la juĝejo, kio postulis sufiĉe multe da mono.



En tiaj kondiĉoj estis tre bonvena la propono de s-ro Tomasz Chmielik, el Swidnik, Pollando por traduki en Esperanton konatajn verkojn el la albana literaturo. Li mem estis tradukinta tra alilingvaj versioj kelkajn romanojn de tre famiĝintaj aŭtoroj albanaj eksterlande, kiel Ismail Kadare kaj Fatos Kongoli, same poeziaĵojn de aliaj aŭtoroj en Albanio kaj Kosovo.

Antaŭ du jaroj aperis la romano "Hunda Haŭto" de Fatos Kongoli., kiu estas cetere membro de Akademio de Sciencoj de Albanio. La promovigo okazis aprile 2012 en la halo de la Akademio je la ĉeesto de profesoroj, politikistoj, ĵurnalistoj kaj havis grandan eĥadon enlande. Grupo de polaj esperantistoj ĉeestintaj estis intervjuita en TV kaj preleginta antaŭ la studentoj de Tirana Universitato.

Antaŭ nelonge, aperis pliaj du verkoj, la novelaro "Sloganoj el ŝtonoj" de Ylljet Aliçka kaj poemaro "Lundo en sep tagoj" de Luljeta Lleshanaku.

Pretpretas la romano alia de Fatos, "La Perdinto" kaj poemaro de Eqrem Basha. Ĝis la jarfino aperos ankaŭ poemaro de Sali Bashota kaj eventuale la romano "La senfina funebra procesio" de Visar Zhiti, aktuala ministro de Kulturo.

Kvar romanoj de Ismail Kadare atendas la signon de favorebla kontrakto kun la agentoj de la aŭtoro eksterlande ĉar ĉio fariĝas preskaŭ volontule kaj danke al la mono kolektita de amikoj. La aliaj aŭtoroj ne postulis monon de ni.

Akcentindas ke grandan helpon estas doninta por provlegado la s-roj Istvan Ertl kaj Josip Pleadin, ĉi lasta ankaŭ engaĝigis senpage la menciitajn librojn.

La Eŭropa Komisiono ĉe UEA revigliĝis ĉar ankaŭ en nia malnova kontinento ekzistas malfortaj movadoj, inter kiuj tiu en Albanio. Ĉi kaze alvenis monhelpoj far individuaj samideanoj por subteni la enlandan aktivecojn de nia asocio, por kiuj ni estas tre dankemaj.

Dume ni estis kompilinta la necesajn dokumentojn kaj fruan jaron 2013 ni akiris la leĝan agnoskon de nia Asocio en la Tribunalo de Tirana. Verŝajne tiu fakto ebligis ankaŭ la formalan akcepton de nia Asocio kiel la 71-a membro de UEA la 26-an de julio 2013. Tiukaze vizitis nian landon s-ino Tatjana Loskutovo el Ivanovo, Rusio, kiu prelegis sukcese antaŭ kelkdekoj da ĉeestantoj en la Nacia Biblioteko en Tirana, kie oni starigis standon kun pluraj ekzempleroj de esperantaj libroj el la fondo de tiu biblioteko. (interalie la originale verkita en Esperanto kaj eldonita en la jaro 1929 le historia verko "Skanderbeg- heroo de Albanujo" de e-isto Cuk Simoni, kelkajn lernolibroj de IL por albanoj, tradukoj el esperanto al la albana ks.

Ni esperas ke ankaŭ per la traduko en esperanton de renomaj albanaj verkistoj ni allogos la enlandan opinion kaj konvinkos la edukajn instituciojn pri la neceso de enkonduko de Esperanto en niajn lernejojn.

Bardhyl Selimi,

sekretario de la Albana Esperanto Asocio

Kial studi Esperanton?

Cxu oni povas gajni monon per gxi? Gxenerale, ne.

Kial uzi nian tempon por labori por gxia disvastigo?

Bone...cxuiuj,kiuj interesigxas nur pri aferoj,kiuj donas mon-profiton,tute ne okupigxus pri Esperanto.

Sed la personoj,kiuj jam evoluis sufcixe multe por kompreni,ke la vivo ne estas nur mono,facile perceptas la ne-mezureblan valoron de Esperanto.

"Ne nur per pano vivas la homo"...Ankaŭ ne nur per mono...

Fakte, oni vivas ankaŭ de la belo,de la emocio...

Kaj gxuste tio Esperanto povas esti por ni La Granda Aventuro!...

Gxi estas la granda aventuro de la menso,de la intelekto,de la animo...

Kiam ni komencas paroli Esperanton kun aliaj personoj-precipe alilandanoj - kaj vidas,ke la lingvo plene "funkcias",ni povas nur senti veran inundon de plezuro,de profunda emocio,unu-vorte:felicxon!

Nur personoj,kiuj jam spertis tiajn esperantajn emociojn,povas kompreni,kiom multe ili valoras.

Cxu vi jam sention,tion? Ni esperas ke jes!...

(De la libro "La Perfektiga Kurso".)

Artikoloj

Albanaj Popolaj kostumoj- priskribo

La albanaj tradiciaj vestoj inkludas 200 diversajn specojn de la vestoj en la tuta Albanio kaj landoj loĝataj de albanoj. Tio dediĉitas al la divido de la albanaj princlandoj dum la Mezepoko. Ĝis hodiaŭ, kelkaj maljunaj viroj kaj virinoj ĉefe el la Nordo vestas tradiciajn kostumojn dum la ĉiutaga vivo. La homoj el Sudo kutime vestas sin tiel okaze de la festoj.

Preskaŭ ĉiu regiono en Albanio havas sian tradician veston, dume la virinoj sin vestas precipe en variaj koloroj kaj riĉaj detaloj.

La albana vesto konsistas el la jenaj elementoj:

Viraj ĉapoj- albane “*qeleshe*” aŭ “*plis*”(el kamloto)



Qeleshoj diferencas de regiono al regiono:

Norda Albanio kaj Kosovo havas rondan *qeleshe*.

Centra Albanio (Tirana, Durres, Kavaja) havas konusan *qeleshe*

- *Fez*: turka ĉapo el kelkaj aliaj distriktoj.
- *Qylafë*: lana ĉapo uzata en suda parto de la lando.



Kostumo de albana batalanto, jaro 1913

La virinoj portas:

- *Kapica:*
- **Langi**, aliaj nomoj estas *peshqira, riza, marhamë, pashnik*
- *Lëvere*
- *Kryqe*

Kovraj vestoj por la korpo

- [Fustanella](#) kvazaŭ jupo kun pluraj faltoj por viroj



Batalanto suliota

- **Tirq** iaspeco de lanaj pantalonoj por viroj



- **Brekusha**- iaspecaj pufpantalonoj por viroj kaj virinoj
- **Xhubleta**: jupo por virinoj
- **Mbështjellëse**- Envolvaĵo por virinoj

Ŝuoj



Opingoj- mokasenoj

- **Opingat**: artaj sandaloj

Xhaqete- jako

Oni vestas ĝin ĉiuj viroj en [Albania](#), [Kosovo](#), Makedonio, Serbio, [Montenegro](#), kaj en *Arbëreshaj* vilaĝoj en Italio.

Brez- zono

Oni vestas Brez same en la supre menciitaj landoj


Çorape- lanaj ŝtrumpoj

Suda Albanio havas kelkajn regionojn:

Labëria




Albana Fustanella [Lord Byron](#) vestite per la albana kostumo, Virinaj vestoj, Virino kaj viro el norda Albanio



Ornamaĵoj

Virina kostumo el suda Albanio, Virina vesto Vira kaj virina kostumoj



Detalo de la supraj partoj de la virina vesto



Vesto el longa ĉemizo kaj antaŭtuko

La ĝenerala klasifiko

1 La viraj kostumoj:

Kun *fustanella*

Kun *longa ĉemizo kaj cibun*

Kun *poture* (mallongaj pantalonoj ĝis la genuo)

Kun *tirqe*

La plej ornamiotaj partoj estas la jelek-oj (subjako) kaj xhamadanoj (dĵamadanoj)

La albanaj viroj portis diversajn arĝentajn ornamaĵojn kiel brustaj kusenoj, dekorigaj butonoj ĉe la subjakoj, fingroringoj, cigaredingoj kaj cigaredujoj, sed surtute, la zonajn kaj brakajn armilojn, kiuj same ornamigis riĉe.

Por la virinoj la ĉefaj tipoj de la vestoj estis:

La kostumo kun *xhubleta* (dĵubleta) (jupo je formo de la kampano),



Virinoj kun xhubleta

la kostumo kun longa ĉemizo kaj la kamlota *xhoke* (dĵoke) supre,



la kostumo kun du *futoj* (antaŭtukoj) metitaj sur la longa ĉemizo, unu antaŭe kaj la alia malantaŭe kaj la kostumo kun envolaĵo (malfermita jupo, envolvita ĉe la zono kun krispoj aŭ faltoj)



En la vestoj la koloroj kaj la ornamaĵoj diferencis laŭ la aĝo. Por la etuloj kaj junuloj, la regiona kostumo estis pli simpla. Diference de la ceteraj popoloj de Balkanio, en Albanio, la knabino je la geedza aĝo, devus sin vesti simple kaj sen ornamaĵoj, bone kovri la hararon per kaptuko kaj ne vesti ruĝan tolon. La geedza kostumo estis la plej riĉa variaĵo de la regiona vesto, kaj por novedzinoj kaj por novedzoj.

Por la novedzinoj, la metalaj ornamaĵoj ne mankis, eĉ oni uzis ilin troe, ĉar gravis verŝajne ne nur ilia estetika funkcio, sed ankaŭ la magia funkcio atribuita. Por la novedzinoj, apartan gravecon havis la kapa ornamigo. Kelkajn jarojn post la geedziĝo, la vesto plimalpeziĝis de la ornamaĵoj.

En la popolaj vestoj, la funebraj signoj estis malmultaj, la virinoj povus vesti maloportune unu el la plej ornamitajn partojn de la kostumo, ekz. la *xhoko*-n aŭ *antaŭtukon*.

La ĝisnunaj studoj montris ke la konsistigaj partoj de la tradiciaj vestoj, ne havas la saman aĝon. Estas partoj rememorigantaj la mezepokajn vestojn, je influo bizanca kaj orienta, la ceteraj alvenas kiel eĥon el la antikvaj tempoj, sed estas ankaŭ elementoj, rilatintaj al la ilira kulturo.

Oni povas mencii tiel la rimarkitajn analogiojn inter la popola linio kaj la ilira “dalmatiko”, aŭ inter la Kapuĉoj, strukoj (ŝaloj), opingoj (mokasenoj) ka., kaj la respektivajn elementojn, uzitajn de iliroj. Danke al tiuj hereditaj elementoj el la ilira kulturo kaj de tiu de la mezepokaj arberoj, dum ilia historia evoluo, la popolaj vestoj estas akirintaj originalajn karakterizaĵojn, ricevintaj la valorojn de etna indikilo, distinganta la albanajn vestojn disde la aliaj popoloj.

2 La klasifiko de la virinaj vestoj

La vesto per *xhubleta*

Estas iaspeco de jupo je formo de ondigita kampano, kudrita per rimenoj el kamloto surmetita unu post la alia laŭ horizontala linio, kies kuniĝo realiĝas per maldikaj galonoj el lano. La *xhubleta* akompanatas ankaŭ per aliaj partoj el kamloto je nigra koloro, kiel de *xhubleta* nomataj *gorĝulo*, *manikumo* kaj *brakumo*. La alia parto estas la larĝa zono ornamita per globetoj kaj galonoj kiu en la

loka lingvaĵo nomatas *kerdhokell*. Surkape oni portis blankan tukon, ellasita sur la skapolo. La kruroj protektiĝis per kamlotaj *kelleoj* aŭ per longaj ŝtrumpoj samkiel per ledaj mokasenoj.

La vesto per xhubleta en la malsupra duono havas la formon de la kampano kaj sur la supra duono similas al la vesto de krucmilitiristoj, samkiel multaj simboloj gravuritaj sur tiu kostumo, kiel kapo de la krita virbovo, krucaj formoj, svastikoj ka kiuj konatas kiel simboloj de la templuloj.

Tiun veston portis en ĉiuj montaroj de la Alpoj en nordo de Albanio same en Montenegro. Xhubleta reprezentas la plej praan veston en Albanio kaj Balkanio. Ĝi alportas la mesaĝojn de la ilira civilizo en la albana popola kulturo.

La vesto kun longa ĉemizo kaj antaŭtuko



Ĉefa parto de ĉi tiu vesto estas la longa ĉemizo, kun longaj manikoj, larĝaj kaj malvastaj. Meze ĝi premiĝis de lana zono je diversaj koloroj kaj akompanatis en la antaŭa parto de lana aŭ kotona antaŭtuko je grandeco kaj ornamaĵoj diferencintaj de regiono al regiono. Dum la somera sezono, sur la supra parto la virino vestite per ĉemizo portis subjakon, dum vintre sur ĝi oni aldonis ankaŭ *mitano*-n kun longaj manikoj ankaŭ kamlotan xhoko-n. La longo, koloro kaj ornamiĝo de la xhoko diferencis aparte depende de geografia pozicio aŭ evoluiĝo de la regionoj kie oni portis ĝin, kreante tiel lokajn multajn apartecojn.

Ĉi tiu vesto estas disvastigita en Mirdita, Dibra, Mat, Shpat, Ĉermenike, Dumre, Myqeqe, Berat, Korçe, Kolonje, Gjirokaster, Sarande ka.

La vesto kun du futoj (antaŭtukoj)

Ankaŭ ĉi tiu vesto konsistis el longa ĉemizo, subjako aŭ mitano (speco de ĉemizo), la zono kelkkolora, sed akompanatis per du longaj futoj (antaŭtukoj), unu premita sur la antaŭa parto kaj la alia iom pli malgranda lokiĝis malantaŭe. En ĉi tiu variaĵo (longa) estis la antaŭtukoj (futoj) portataj de virinoj de Postriba (Shkoder) aŭ de vilaĝoj Baz, Vinjoll, Karrice ka de la distrikto de Mat.

En alia variaĵo la futoj havis la trapezoidan formon kaj tiu lokita antaŭe estis pli granda, la alia pli malgranda kaj nomatis *mbrapanik* (malantaŭaĵo). Ĉi tiu variaĵo disvastiĝis en kelkaj vilaĝoj de la distrikto de Puka, en la montaro de Gjakova (distrikto Tropoja), en kelkaj vilaĝoj de la distrikto de Has, samkiel en kelkaj vilaĝoj de la Ebenenaĵo de Dukagjin (Kosovo).

la futoj havis la formon de kvarangulo, ankaŭ en ĉi tiuj regionoj tiu en la antaŭa parto estis pli granda ol la malantaŭa.

Kiel en la dua variaĵo ankaŭ en la tria, ili estis el lano kaj ŝatatis per malhelaj koloroj (nigra, kafa aŭ griota)

La vesto kun envolvaĵo

La ĉefa parto en ĉi tiu tipo de la vesto estas iaspeco de larĝa jupo, kun etaj faltoj. Sub ĝi oni vestis malvastan ĉemizon, dum sur la supra parto vestis la subjakon kaj iaspecon de trikita jako kun malvastaj manikoj.



En la vilaĝoj de la regiono de Zadrima oni tenis variaĵon de envolvaĵo kies faltoj surmetiĝis nur sur la malantaŭa parto de la korpo. Kutime ĝi havis nigran koloron.

En kelkaj vilaĝoj de Puka kaj Montaro de Gjakova, la envolvaĵo, kiu kutime havis griotan koloron aŭ verdan kaj pli rare violan, havis aspekton tre elegantan kaj akompanatis per lanaj ŝtrumpoj ornamitaj per multkoloraj motivoj.

Dum la variaĵo tenita en kelkaj vilaĝoj de la regiono de Luma (Kukes) kaj tiu en Shishtavec (Kukes) akompanatis per longaj kalsonoj, kies piedumoj fariĝis larĝaj kaj el lano je diversaj koloroj.

La vesto per *dimiq* (pufa virina pantalono)


La nomo devenas de speco de pantalonoj tre larĝaj kaj nigrakoloraj. Sur la supra parto de la korpo la virinoj tiel vestitaj per *brekushe* vestis mallongan ĉemizon, subjakon kaj mitan-on. Sur piedoj tenis lanajn ŝtrumpoj je multaj koloroj.



La vesto kun brekushe

Ĉiam sur la brekushe en la antaŭa parto oni vestis ankaŭ lanan antaŭtukon ornamitan per kvadratoj multkoloraj. Dum surkape oni portis tukojn multkolorajn ligitaj subantaŭkole, ne faldinte je formo de triangulo. Fakte tiu vesto estas enkondukita je la komenco de XX jc kaj havis limigitan uzadon, ĉefe en kelkaj vilaĝoj de la Tirana montaro, en Martanesh, Berzeshte, Gur i Bardhe, ka.

3 La vestoj por la viroj



Estas unu el la tradiciaj albanaj vestoj en la regiono de Laberi

La vesto per fustanelo

Ĝian nomos donas iaspeco de blanka jupo, farita el kotona tolo kaj kun multaj krispoj. Sub tiu jupo oni tenis longajn kalsonojn, sur kiuj, ekde la piednodo ĝis la genuo vestiĝis per kamloto. En kelkaj kazoj ili plilongiĝis ĝis rande de la femuroj, tial oni nomas ankaŭ femurumoj.

Supre oni vestis mallongan ĉemizon kun larĝaj manikoj, la subjakon kaj manikumon (penditaj malantaŭen). Sur la talio metis lanan larĝan zonan, sur ĝia ankoraŭ alian ledan ornamitan sur kiu enigis kaj pendigis la zonajn armilojn.

Dum la malvarma sezono parto de ĉi tiu vesto estis ankaŭ lana harplektaĵo. Kvankam surkape oni metis blankan ĉapon kun najleto meze, ĉi tiu vesto estas uzata en la tutaj albanaj teroj de Kosovo ĝis Ĉamerio. Poste limiĝis nur en la vilaĝoj de la Suda Albanio.

La vesto per longa ĉemizo kaj *dollame* (aŭ *cibun*)

La plej gravaj partoj de ĉi tiu vesto por la viroj estas:

La ĉemizo je blanka koloro samkiel la dollama aŭ longa cibuno el kamloto. Dum somero anstataŭ dollamo oni vestis iaspecon de xhamadano el kamloto.



Sub la ĉemizo vestis longajn kalsonojn akompanataj per piedumoj. La dollamo aŭ cibuno prezentiĝas je kelkaj diferencoj en la diversaj areoj. Iuloke estis longa ĝis la genuo, aliloke estis ĝis la krursuroj. Iuloke je blanka koloro kaj aliloke je nigra koloro. Tiun veston oni uzadis en Mirdita, Mat, Dibra,

Malesi e Madhe, Gore, Kolonje, Gjirokaster ka. Post la dua Mondmilito ĉi tiu vesttipo anstataŭiĝis per la vesto kun *tirq* aŭ uzatas en kazoj de kunvenoj.

La vesto kun *tirq*

La plej tipa elemento de ĉi tiu vesto estas *tirq*-oj havantaj la formon de la malvastaj pantalonoj el kamloto (plejmulte blankaj kaj rare nigraj aŭ brunaj). Ĝenerale ilin oni ligas malsupre de la talio akompanante per lana zono kun kelkkoloraj linioj.



En la supra parto oni vestis ĉemizon kun longaj manikoj, senmanikan subjakon kaj xhamadanon kun longaj manikoj, ambaŭ el kamloto.


Dum la malvarma sezono, sur la xhamadano oni vestis ankaŭ jakon kun mallongaj manikoj kaj kun marista kolumo (el kamloto je nigra koloro) nomata iuloke *xhurdi*, aliloke *kaporane* aŭ *herke*. La *tirq*-ojn kutime oni tenis en la norda Albanio, en Kosovo kaj nordorienta Albanio, atingante ĝis la distrikto de Berat.

La vesto per *Breksha*

Tiun nomon donas la malsupra parto de la vesto, havanta la formon de larĝaj pantalonoj, faritaj el lana aŭ kotona tolo teksita per hejma teksilo. Ĉiam ili estis longaj ĝis la piednodo kaj akompanatis per larĝa zono lana je ruĝa- griota koloro.



la korpo oni vestis ĉemizon kun longaj kaj mallongaj manikoj. Dum la malvarma sezono krom la subjako kaj xhamadano el kamloto, oni vestis ankaŭ *jakuĉe* kun hupoj (iaspeco de jako kun multaj manikoj). Tiun veston uzadis en la vilaĝoj de Zadrime (dum varma sezono), en la Meza Albanio kaj en kelkaj vilaĝoj de Mati, Martanesh, Mirdita, Librazhd, Ĉermenika ka.



Vesto kun *poture*

La *potur*-oj havas formon de larĝaj kaj longaj pantalonoj ĝis la genuo.



Diference disde la aliaj vestoj ĉi tiuj pantalonoj estas tre influitaj (je la formo de la tajlorado) de la sama vesto uzita en la orientaj landoj.

En la malsupra parto de la kruroj (sub la genuo) oni vestis *kalce* el kamloto. Dum en la supra parto oni vestis la ĉemizon kun longaj manikoj akompanata de subjako el kamloto, kiu alkrociĝis al la latera parto de la brusto.

Dum la malvarma sezono oni vestis ankaŭ xhamadan-on kun manikoj pendintajn en la malantaŭa parto de la korpo. Tiu vesto havis ankaŭ alian parton sin distinginta de la aliaj regionoj, estis ĝuste la alta *qeleshe* aŭ *takie* duonsfera.

Tiu vesto havis limigitan uzadon, ĉefe en Laberio, Mallakaster, Myzeqe ka. La *Potur*-oj estas anstataŭintajn la veston kun fustanelo ĉirkaŭ la XIX jc.

La [Fustanella](#)

Estas popola virvesto en diversaj areoj, en la Sudo kaj en la Nordo. La fustanelo havas la formon de larĝa jupo, kun multaj krispoj je trapezoida formo, kudritaj kune kaj envolvitaj kun densaj faltoj ĉe la

talio. La materialo estis tolo blanka hejma el kotono kaj lino. La kostumo kun fustanelo konsistas el ĉemizo, fustanelo, tirq-oj/kalc-oj, zono, subjako kaj xhamadano. Diversaj batalantoj estas vestintaj ankaŭ brunajn kaj nigrajn fustanelojn.

La fustanelo estas vesto aparteninta al la tre malnova tempo. Estas dokumentita ekde la IV-III jc antaŭ Kristo, en kelkaj arkeologiaj trovitaĵoj.



La Xhubleto



Estas tipa vesto virina en la norda Albanio, supre la rivero Drin, Nikaj- Merturaj kaj Rugova, malesi e Madhe kaj ĉe la albanoj de Montenegro.

En la areo sub Shkoder ĝis la Breg Mati kie la montaranoj de la Malesia e Madhe etendiĝas. Xhubleta estas jupo je formo de kampano, ondiĝinta je fundo, aparte en la malantaŭ parto.

Oni faris ĝin per multnombraj kamlotaj pecetoj kaj rimenoj, metitaj horizontale kaj interplektitaj per galonaj zonoj. Oni tenas ĝin pendite surŝultre per du larĝaj rimenoj. En XVIII jc xhubleta fariĝis multkolora, sed tiuj atingintaj ĝis hodiaŭ estas: la nigra por virinoj kaj nigra-blanka por knabinoj.

Aliaj partoj de la kostumo kun xhubleta estas: *kraholino*, *xhoka*, *kerdhokla*, *paranik*, *kallmat kaj shputat* ka.

Xhubleta devenas de pratempo. Prezentas similecon al la vesto de kelkaj neolitaj figuroj trovitaj en Bosnio, sed ankaŭ en la aliaj areoj de Mediteraneo, apartenintaj al la dua miljaro antaŭ Kristo kaj rilatas al la malnovaj civilizoj mediteraneaj.

La xhubleta de Malesia e Madhe estas evidenta heredaĵo de nia ilira kulturo. En la mistero de la xhubleta estas vico da simboloj prezentantaj la rilatojn al la religio, kredo al Dio, amo kaj beleco de la montarana virino.

La mokasenoj “oping-oj”



Konsistiga parto de la popola vesto je malnova tradicio kaj etendiĝo totalbana.

La plej simplaj specoj fariĝis el ununura ledopeco je formo de rekta kvarangulo, kies randoj faltiĝis proksimiĝanta al la piedo kaj poste premiĝis per lanaj ŝnuretoj. Depende de la kudromaniero de la pinto, de maniero kiel surmetiĝis la rimenoj kaj la langumo aŭ kiel trikiĝis la supra faco de la mokaseno kaj kiel ornamigis ĝi, oni distingis diversajn variaĵojn:

Bovinjajn mokasenojn, kun ledpecetoj, kun langumo, kun kapumoj, kun tufetoj, kun hupoj, ks

La plej praaj atestaĵoj pri la mokasenoj apartenas al la V-IV jc antaŭ Kristo kaj montras ke ili estis ja elemento de la ilira kulturo kaj evidente sin distingis disde la sandaloj de la klasika tipo greko-romia kaj pli poste de la tiuj de slavaj popoloj.

La *guna* (ponĉo)

Estas vintra vesto, je formo de pelerino larĝa el lano, kun dekorigaj manikoj (kiujn oni ne vestis) kaj kun kapuĉo por la kapo. Oni konis ĝin per kelkaj nomoj: *guno kapra* por la paŝtistoj, *guno makulita*, *tallagano*, *tamaro* ks.

Oni uzis ankaŭ kelkajn vintrajn vestojn kiel *berruco* kaj *sharko* en Laberio, *japanxha blanka* de la viroj en Kosovo, *tallagano* de virinoj en Malesia e Madhe kc.

(Cxerpita el interreto, enesperantigis Nehat Sokoli)

Ateno aŭtunofrue

Reportaĝo



Nur 65 jara mi sukcesis viziti unufoje Grekion en 2010. Tion motivigis la naskiĝo de mia unua nepino Dea. Poste mi iradis kelkfoje tien. Poste mi iradis kelkfoje tien.

Ĉiaŭtunofrue denove motivo fariĝis la naskiĝo de mia dua nepino. Kvankam je malfacilaj cirkonstancoj ankaŭ ŝi eniris la "armeon" de **averaĝe** 3000 albanaj idoj ĉiujaraj en la najbara lando, almenaŭ ekde la jaro 1993. Sed ŝi ne plu loĝos tie, samkiel 700 000 aliaj albanoj, sed tre fore, en Emirlando, kie laboras **ŝiaj** gepatroj.

La eta aviadilo per turbheliko Belleair same malfacile atingis la grekan ĉefurbon, ĉar trafis ĝin malbona vetero, dum la unua duono de la vojaĝo.

Tamen mi ne sukcesis viziti la bebon, ĉar ĝi kuŝis en la hospitalo speciala, kiel antaŭtempea ĵusnaskito, sed mi ege ĝuadis la tempon pasitan kun Dea, kiu pependis tutan tagon demandante kaj respondante same mem. Ŝi eble ne tute konscias, kiel **ŝiaj** gepatroj, kiel bone estas ke nun ŝi havas fratino..

Aliel ol en Tirana, ~~la vetero~~ en Ateno sunis la tutan semajnon. Mia boparenco plendadis ĉar ne pluvis ekde longe, por ke akvumi la domĝardenon. La homoj ankoraŭ sin vestis kvazaŭ somere. Ĉi foje mi intencis viziti la faman placon "Omonia" kie ariĝis ankaŭ albanoj, ne nur por serĉi labordonantojn. Per buso aŭ metroo tie vi povas atingi ene ~~de~~ duonhoro. Estis **vera** surprizo por mi.

Mi imagis tiun placon simpla, kun kafejoj kaj duetaĝaj domoj, sed fakte ĝi estis granda centro.

Kafumante en la restoracio de la deka etaĝo de "Condor" vi povas admiri, je unu flanko tuj apude la

Akropolon, en la **alia** flanko la verdiĝintan monteton Likavita, dum malantaŭe aliajn **blankajn** urbopartojn. Ni iris surpiede tra la strato kondukanta al la urbodomo, alvenante ĉe la Granda Merkato de viando-fiŝo, kio estis tre apartaĵa, ne nur pro la spaco ampleksinta sed pli pro la vigleco, multvarieco kaj kvalito de la produktoj, kies prezoj ĝenerale estis pli malaltaj ol en mia urbo. La vendistoj kriadis konkurante kaj invitis kvazaŭ ~~perforte~~ **trude** aĉeti ĉe ili.

De la Merkato vi povas pluiri tra la malnovaj stratetoj de Ateno, kie troviĝas etaj domoj ruiniĝantaj kaj vendejoj antikvaj, antaŭ ol troviĝi, trafi, veni en Manastiriakis, frekventinda kvartalo de turistoj, ne nur pro siaj antikvaj monumentoj (muregoj, kolonoj, **temploj**, ia etendaĵo de la Akropolo

malsupren ĝis la kvartaleta Plaka kie estas ankaŭ granda metroa stacidomo. Tie vi povas alveni rekte de la **flughaveno** haveno kaj daŭrigi ĝis Pireo.

De tie ni revenis per metroo al Agia Paraskevi, kie loĝis la filo kun sia familio. Ĉi tio estas relative nova kvartalo, pli proksime al la montetoj, **kun** multe da verdo kaj domoj- **altaj** vilaoj.

En la kvartalo estis ankaŭ bela infana ludparko kie ni iradis ofte por akompani la nepinon. Sed ankaŭ pluraj allogaj popolaj lokaloj kie ni kafumadis. En ili, ne hazarde, mi vidis **homojn** almozantajn, kompreneble edukstile, sed ankaŭ iun maljunulon bone vestitan, sveltan, ĉirkaŭ 75 jaran, iom klinitan, **kiu proponadis fajriletojn** aŭ lotobiletajn.

Ateno estis, je pli ol du mil jaroj antaŭe, ĉefcentro de la mondo, sed ĝi estas ankoraŭ granda urbo pli eŭropeca ol balkana. Estas **tiom multe** investite en ĝi, ke **oni** povas pensi ke la grekoj vane plendas pri sia **vivnivele**.

Unu boparenco, tamen, **diradis** ke ĉiuj tiuj verkaĵoj konstruitaj okaze de la Olimpiaj Ludoj **antaŭ** kelkaj jaroj, mastrumatas **ne bone**, ĝuste pro la krizo.

~~La~~ **Albanojn** vi povas renkonti ofte en la urbo, parolantajn sian lingvon unu kun la alia. Ili kutime **estas de juna kaj meza aĝo**. Bedaŭrinde, multaj el ili, inkluzive ankaŭ unu mian fraton, estas jam revenintaj patrien, post 22 jaroj, ĉar ne povas plu elteni **sin**, ne havante laboron.

Ankaŭ grekoj mem **serĉadas** novajn eblecojn por si ekster **sia** **patrolando**, malgraŭ ties tre favora klimato kaj geografia pozicio en ~~la~~-nia malnova kontinento.

Mi vidis ilin ĉiun matenon **legi la titolojn de la novaĵoj ĉe** la kioskoj afiŝantaj la ĵurnalojn.. Certe

ili interesiĝis pri la pagoj, pensioj, **novaj** maldungoj. Certe ili malbenis la **pasintajn** registarojn kiuj kondukis ilin en tiu stato. Sed ili vidis ankaŭ la titolojn de la artikoloj pri la danĝeraj agadoj de la hodiaŭaj **rondoj** ekstremistaj, kiel tiujn de la nazioj kaj la partio La Ora Aŭroro, makuliĝantaj la tradician demokratian vizaĝon de ~~la~~ sia lando.

En la parlamento leviĝis voĉoj por eksterleĝigi la naziojn, sed ili estas jam voĉdonitaj de unu miliono da grekoj kaj neniu demokratio permesus tion. *Ĉu Helado ne havas Konstitucian Kortumon?* Kiel oni faru ke Grekio ne glitiĝu al la abismo?

Dum la interparoloj kun miaj boparencoj kaj tiesamikoj, ni pritraktis temojn ~~el~~ plej diversajn. Ĉu

Albanio unuiĝos **kun** Kosovo kaj la ceteraj albane loĝataj teritorioj naturaj siaj, kiel tion postulas la movado de Koĉo Danaj? Ĉu oni nomumos alie la ŝtaton de Makedonio? Kiel oni solvos la aferon de Nova Epiro (nuntempa suda Albanio)? Multaj el ili ne estis informitaj ke Skopje estis iam (antaŭ la jaro 1963) urbo kun la plej granda nombro de albanoj en Balkanio. Tial, Makedonio neniel povas nomumiĝi Slavomakedonio, sed kial ne, Norda Makedonio. La aŭtentaj grekoj ankoraŭ ne kredas ke la antikvaj makedonoj ne estis grekoj, sed trakoj!

Kosovo nun bezonas kunlaboron pli intiman **kun** Albanio en la ekonomio, energetiko, kulturo kaj edukado, ĉar la landlimo estas praktike **aperta**. Almenaŭ ĝiskiam la internaciuloj konvinkiĝos ke la plej bona vojo estus la politika unuiĝo **kun** Albanio.

Sed por mi estis vera malkovro la renkontiĝo kun sinjoro J.M., samaĝulo, laborinta ekde pluraj jaroj por starigi kaj bonordigi la komplementigan edukadon en la albana en la tuta Grekio por ĉirkaŭ 150 000 albanaj infanoj naskitaj aŭ kreskintaj tie. Estis tio granda patriota entrepreno renkontiĝanta ofte **kun** ekstrema kontraŭstaro **de** la grekaj reakciaj **rondoj**. Mia interparolanto mem, estis ofte eĉ minacita je vivo. Li eĉ tute ne kuraĝis starigi la aferon **publike** por la vasta regiono de Ĉamerio kies loĝantaro grandparte estis masakrita kaj forpelita al Albanio junio 1944!

Tamen, **nuntempe** dum la sabatoj kaj dimanĉoj funkciadas multnombraj albanlingvaj lernejoj ne nur en Ateno sed ankaŭ en la aliaj ĉefaj urboj kaj insuloj. Bedaŭrinde la albana ŝtato sin motras tre mallerta, avara kaj **malpretema** por helpi per lernolibroj kaj **financoj**. Des pli tiun helpon notinde certigis diversaj individuoj el la albana entreprenistaro.

La organizo edukativa de la albanaj instruistoj estis bonŝance jure agnoskita, malgraŭ la klaĉoj kaj minacoj de iu deputito en la greka parlamento kiu la albanan konsideras "la serpenta lingvo".

Iu alia deputito je albanan deveno, s-ro Pango, estis redirnta al sia kolego reakciema ke la liberan Grekion alportis ankaŭ la milito kaj sango de albanoj kaj inter la 11 ĉefaj komandantoj de la revolucio greka, 9 estis albanaj!

J.M. rakontadis ke en tiaj cirkontancoj, li devis influi ~~sur~~ la grekan publikan opinion per faktoj kaj argumentoj, favore al la tradicie amikaj rilatoj kaj eterna emo de albanoj por amikeco kaj etna toleremo.

Bardhyl Selimi

(provlegite de V. Banaitis, Litovio)

Prevento kontraŭ memmortigo

Paiva Netto

La Monda Tago pri Prevento kontraŭ Memmortigo estas ĉiujare rememorata je la 10-a de septembro. Laŭ la Monda San-Organizo (MSO), mezume po du homoj sin mortigas ĉiun minuton en la mondo. Se ni kalkulas je 24 horoj, tiam la kvanto atingas preskaŭ tri mil mortojn.

Nur en Brazilo, proksimume po 25 homoj forigas sian vivon ĉiun tagon. Tio rezultas je kvanto de preskaŭ naŭ mil mortoj ĉiun jaron.

MSO montras alian alarman ciferon: flanke de ĉiu memmortigo, okazas po 20 senrezultaj tiucelaj agoj.



D-rino Alexandrina Meleiro

Laŭ d-rino Alexandrina Meleiro, psikiatro en Psikiatria Instituto de Klinikhospitalo de la Fakultato de Medicino de Universitato de Ŝtato San-Paŭlo (HCFMUSP), necesas atenti pri signoj de danĝero: “Ĝenerale, tiu homo fariĝas malĝoja, senespera. Ne vidante solvon por sia problemo, li ekpensas pri memmortigo. Foje li parolas pri tio, foje ne. Li fariĝas silentema, li ekdeziras morti. Tio evoluas al intenco ja morti. Tiu ago povas mortigi aŭ ne, eble ĝi estas nur intenca ago. ‘Ha, sed tiu, kiu vere sin mortigos, tiu ne sciigas sian intencon’. Jen malveraĵo: 90 procentoj el la memmortigintoj lasis iun sciigon. Multaj el ili, proksimume 40 procentoj, vizitis kuraciston en la lastaj 30 tagoj... estas maltrankviliga la fakto, ke oni ne perceptis kaj prizorgis tion.”

PAKTO KONTRAŬ MEMMORTIGOJ

En intervjuo al TV BONA VOLO, d-rino Alexandrina komentis pri la graveco, ke oni faru pakton kontraŭ memmortigo: “Estas ĉiam grave, ke ni interparolu rigardante la okulojn de la homo, kiu estas antaŭ ni, por ke li fidu, ke ni komprenas lian suferon, liajn angorojn. Sekve de tio, ni proponas pakton kontraŭ memmortigo, por ke ni havu tempon por inversigi tian situacion. (...) Ofte tiu pakto estas la forto, kiu kondukas lin efektive al deziro denove vivi, havi lumon, havi sanan vivmedion kaj esperon por ia nova vojo. Tion povas fari profesiulo, familiano, amiko, eĉ dorlotbestoj: “Mi ne emas lasi mian best-amikon sola’. Per tio oni faras ligan, kunsentemon, kaj oni sukcesas revenigi tiun homon al la vivo”.

NE EKZISTAS NESOLVEBLA PROBLEMO

Fronte al defioj kaj ŝajne neelteneblaj situacioj, ni devas rifuzi la malfeliĉan penson pri memmortigo, kaj plifortigi nian kredon pri iu supera potenco, kiu neniam nin forlasas. Tiu mia penso naskiĝas el ĉi tiuj vortoj de la Dia Majstro: “Pacon Mi lasas al vi; mian Pacon Mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu. Kaj jen Mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo!” (Evangelio de Jesuo laŭ Johano, 14:27 kaj 1, kaj Mateo, 28:20).

“Ne ekzistas en la mondo homo, kiu ne suferas. Ni ĉiuj trapasas momentojn plej malfacilajn en la vivo. La problemo estas, ke ni ĉiam supozas, ke nia vojo estas pli kruta ol tiu de aliaj homoj. Tamen, se ni pensas, ke ĉiam troviĝas alternativo, tiam ni perceptos, ke ne ekzistas nesolveblaj problemoj” — la psikiatro klarigis. Kaj ŝi finis: “Kio malsamas de unu homo al alia estas la maniero serĉi tiun solvon. Ofte ne troviĝas ideala solvo, sed tiu, kiu estas ebla en tiu momento. Laŭ la pasado de la tempo, vi iom post iom ŝanĝas tion, kio angoras vin. Tio estas grava, ĉar temas pri strategioj por alfronti la vivon. Ĉiuj bataloj estas penigaj, ni ŝvitas fronte al ili, sed rideto de venko post la batalo estas tre granda. Pensu pri la vivo, pri via vivo, pri tiu de viaj geamikoj, de viaj konatoj, de ĉiuj. La vivo estas ĉiam bela, kiam ni fidas pri ĝi”.

Dankon, d-rino Alexandrina, por viaj klarigaj vortoj.

SPIRITA PLIFORTIGO

Apud tiu tuta psikologia apogo kaj apud la progreso de medicino, estas esence grava — por tiuj, kiuj

pensas pri atako kontraŭ sia propra vivo — la sana praktikado de preĝado, por la plifortigo de konscio, ke la vivo daŭras post la fenomeno morto. Kiuj malprudente anticipas sian alvenon al la Spirita Mondo, tiuj vekigās ĉe la Alia Flanko de la Vivo kun siaj doloroj pliigitaj fare de la senpripensa ago memmortigi. Plej malbona miskompreno en la Homaro estas tio, ke oni plu obstinadas supozi, ke la morto ĉion estingas.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵaneiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Pri la seksperfortaĵoj en Kosovo far la serboj



Fatbardha Demi kaj sia amiko, la historiisto dr.Arif Mati

Devas ja mortis kelkaj generacioj de la albanoj, por ke oni forgesu tion kion faris la serboj al ili, “Radniĉke novine”, Belgrado, 22-an de oktobro 1913

Historie, la seksperfortado al la virinoj dum la okupaciantaj militoj, konsideriĝis “militpredaĵo” kaj “rajto” de la venkinto kaj tiel estas traktita ĝis la modernaj tempoj. “malgraŭ la pruvoj de la seksperfortado dum la Dua Mondmilito- esprimas sin Anne Marie de Brower, esploristino ĉe la universitato de Tilburg en Norvegio- la manko de la deziro por puni ĉi specon de la krimo, kondukis en la nepersekutado de la aŭtoroj en la Proceso de Nurenbergo” (1).

La saman fakton konfesas ankaŭ la juĝisto Richard Goldston, prokuratoro en la Internacia Juĝejo por la eksa Jugoslavio, ke “por la krimo de la seksperfortado, la internacia komunumo neniam estis interesita” (2).

Tamen, ekde la jaro 1948, la seksperfortado dum la armitaj konfliktoj, estis inkluzivita en la krimo de genocido (“La Konvento pri la prevento de la krimo de genocido” de la Ĝenerala Asembleo de UNO je la jaro 1948). En la tria ĉapitro de ĉi tiu Konvento (punkto “d” kaj “e”) kiel krimo de genocido inkluziviĝis ankaŭ la kunlaboro kaj la tento por genocido” (3).

En la deklaraĵoj de la reprezentantoj de la politiko kaj en amaskomunikiloj, oni insistas ke per kreado kaj riĉigado de la ŝtataj kaj internaciaj institucioj per leĝoj kaj multaj rimedoj kontraŭ diversaj specoj de la krimo, dum la pasinta jarcento, la eŭropa socio ege disvolviĝis je direkto de humanisma mondkoncepto.

Sed laŭ la oficejo de la statistikoj ĉe UNO (jaro 2000), oni atestas ke dum la XX jarcento, en la unua Mondmilito nur 5 % estis viktimoj civilaj, dum en la dua mondmilito 52 % kaj en la jaro 1991, 90 % estis popoloj kiuj ne partoprenis en la militoj. (4)

Ne nur la nombro de la viktimoj pligrandiĝis, sed ankaŭ la specoj kaj krueleco de la krimoj, kompare al la tutaj epokoj en la homa historio. Tial, la esploristoj, estas difinintaj la XX jarcenton kiel “jarcento de genocidoj” (5)



Perfortita virino apud la urbo Prizeren

La verecon de ĉi tiu fakto atestas ankaŭ la agado de la eksa jugoslava ŝtato, kiu finis lastan jarcenton per sangumita genocido kie 80% de la civilaj viktimoj en Kosovo estis virinoj kaj infanoj. (6)

La moderna eŭropa kaj monda socio, havis la eblecon vidi, ke ĝis kiu degradiĝo homeca povas atingi unu ŝtato kaj unu popolo. Mi diras “ebleco” ĉar en la eŭropa kaj monda opinio, malmulte estis farita por diskonigi tion kion estis okazinta, aparte rilate al la albanaj virinoj. “La atestaĵoj de la vivaj viktimoj” (sed ankaŭ mortintaj aŭ malaperintaj) faktegas ke ankaŭ post 68 jaroj de la kapitulacio de la nazismo, la ties ideologiaj kaj instituciaj radikoj, daŭre survivas en la Eŭropo de la XXI jarcento.

Kosovo atestas

R.N. el Prishtina, je la militofino, estas trovita ligita, en la ejo de la Jura fakultato. Ŝi rememoras: “Unu el la policistoj manfrapis min kaj tuj krevis ĉe mi la sango el la ardiĝintaj lipoj. La alia surmetis la fingron ĉe miaj lipoj, trempis ĝin per sango kaj diris: “Verŝajne ĉiuj albanoj havas dolĉan sangon kaj mi per ĉi tiu tranĉilo elgustumos ĉiujn...Mi, Nenad Stojanoviĉ, postlasos vin memoraĵojn por la tuta vivo. Li proksimigis la cigaredon ĉe miaj mamoj kaj estingis ĝin tie. Pli ol pakedon da cigaredoj li estis estinginta sur la mia korpo dum kelkaj horoj...Mi ne scias kiom da viroj estas ludintaj sur mia korpo, mi havas “centojn da cigaredvundoj kaj tranĉilvundoj. (7)

Ahmet Grajĉevski (prezidanto de la asocio por esplorado de la krimoj kaj de la malaperintaj homoj dum la milito 1998-1999): En la ejoj de la fabrikoj, en la hejmoj, kortoj, en la hospitalo de Prishtina oni plenumis murdojn, perfortaĵojn kaj la atestantoj parolas ankaŭ pri aŭtopsoj kun vivaj homoj. Je 27-an de marto 1999, Servete Halimaj el la vilaĝo Shkabaj Dardhiç, graveda kun du ĝemeluloj estis naskinta la unuan bebon kiun nomis Fitore (Venko). Tiun tempon eniras la krimuloj por forpeli kaj vidas ŝin naskante kaj diras ke vi ne naskos...Ŝi respondis ke naskos miaj fratinoj...ŝian korpon oni trovis masakritan kun amputitajn manoj. Ni ne scias kio okazis al la ĝemeluloj. (8)

Je 25-an de januaro 2001, dum radiofonia elsendo de dokumentaro en la Publika Nacia Radio de Usono, titolita “La Kaŝo de la krimo”, oni montris ke la serbaj kaj jugoslavaj fortoj transportadis sistemece la korpojn de la mortigitaj albanoj en la komplekson de la minejoj de Trepĉe apud Mitrovica, kie ili transformiĝis en cindron. Laŭ la raporto kiu citis la serbajn soldatojn kaj “oficialulon bone informitan de la serbaj sekretaj servoj”, en Trepĉa estis kremiitaj 1200- 1500 kadavroj..Viroj suspektitaj por rilatoj kun UÇK, mortiĝis surloke. Tia suspekto povus baziĝi iamfoje simple en la fakto, ke kelkiu havis la aĝon de iu batalanto. (19)

Shaip Vrellaku, kaptita de la serbaj fortoj konfesas; “Propraokule mi vidis policiston bruligante la knabinojn perfortitajn en la stacidomo en Gillogoc. Ankoraŭ hodiaŭ mi aŭdas terurajn kaj tristajn kriojn de la bruligitaj knabinoj”. (10)

Kial la seksperfortado de la albanaj virinoj estas ja la plej krimeca ago de la milito en Kosovo?

Unue, ĉar ĉi tiu ago de la serbaj fortoj, ne estis la sola ekzercita sur la viktimoj, sed akompanata per aliaj agoj nomumendaj kaj punendaj de la Internaciaj Konventoj kiel “Militkrimo” kaj “Krimo kontraŭ la Homaro”. Tial, la aŭtoroj, la ideantoj kaj la kunlaborantoj en la krimo de la seksperfortado devas ne nur traktiĝi enkadre de la militkrimoj, sed porti ankaŭ la plej grandan ŝarĝon de la puno, pro la celo kaj maniero de la ties plenumo.

Due: tio estis servinta kiel militrimedo dum la tempo de la konflikto. La eventoj okazintaj en Kosovo atestis ke la seksperfortado de la virinoj uzatis kiel unu el la armiloj de la pereigo kaj amasa forpelo de la civila loĝantaro, tutegala al la militista armilaro, kemia kaj de la aliaj specoj. (Angela Minzoni Deroche nomumas tion “unu maniero de la batalado”) (11).

Ankaŭ la Internacia Organizaĵo por la Homrajtoj (Amnesty Internationa) estas konfirminta ke la seksperfortado hodiaŭ uzatas intence, kiel militista strategio, kompare al la samaj kazoj el la pasintaj jarcentoj. (12).

Kiel tion atestis ankaŭ Bosnio, la seksperfortado dum la militista konflikto estis ordonita de la serba komandejo kiel parto de la strategio de la etna purigado, por devigi la loĝantaron foriĝi disde la lando kaj ties loĝejoj. (13)

La serbaj krimuloj ekspluatis la seksan perfortadon kaj la murdon de la viktimoj, eĉ ankaŭ per la venenigo de la putoj. “En iu vilaĝo en la regiono de Drenica oni perfortis, murdis kaj enĵetis en la putoj ok virinojn” (14).

Trie: Ĝi estas uzita prikonsiderinte ankaŭ la sekvaĵojn (por kiuj estis jam planita) ankaŭ post la finiĝo de la milito. La viktimoj (la patrinoj, la fratinoj, la knabinoj, la infanoj) daŭre travivas kun la krimeco kaj la ties sekvaĵoj fizikaj kaj psikaj. Ili perdas la kapablecon por vivi normale, influante rekte en la mensa kaj fizika sano de la estonta generacio, familia rondo kaj malaltigas la moralon kaj la forton por alfronti la sekvaĵojn kaj por ilia vizio pri la futuro en la socio kie vivas. Frapinte la albanan virinon, oni estas frapinta ne nur la Kosovon de la milito, sed ankaŭ la ŝtaton de Kosovo postmilito.

La seksperfortado, estante konata fenomeno de la socio ankaŭ dum la paca tempo, estas esplorita per multaj studoj pri la ties kaŭzoj kaj sekvaĵoj, kiel krimago. La studlaboraĵoj estas montrintaj ke:

- 1/3 de la viktimoj trafitas de peza depresio dum certa tempa periodo kaj 17 % el ili sin mortigas.
- Ili konservas ene de si la ribeliĝemon kaj travivas la sentimenton de la honto kaj la memkulpiĝo kiu malhelpas ilin rakonti pri tio okazinta kaj ricevi la necesan helpon medikoleĝan.
- Elmontras mankon de la deziro por daŭrigi la socian vivon kaj sentas malfacilaĵojn dum la laboro.
- Havas problemojn je naturo de seksaj rilatoj ktp.

Kun la paso de la tempo kaj sen la necesa helpo, la sekvaĵoj fariĝas nekuraceblaj kiel : la angoro, maltrankviliĝoj dum la manĝado, nedormeco kaj retravivaĵo de la eventoj, peza sana stato aŭ malsanoj je naturo psika, la hontemo kaj eterna timo, ktp.

Dum la milita tempo, la seksperfortado havas multfoje tre pezajn sekvaĵojn ol la dum la paca tempo. La kaŭzo estas ke la viktimo krom la turmentado kaj murdo, estas travivinta la pezan psikologian ŝokon, ĉar la seksperfortado estas farita de grupo de agresantoj, je la ĉeesto de la plej proksimaj homoj kaj la medio kie ili loĝas kaj ofte estas ripetita dum la tempo.

La krimo kontraŭ ili estas akompanita per la tragedio de la murdo aŭ turmentado de la infanoj kaj ilia familio kaj en malfacilaj kondiĉoj de la surviveco. Pri ĉiuj pezaj sekvaĵoj por la homo, unuafoje, la Internacia Tribunalo (pri la krimoj de la milito en Ruanda de la jaro 1998) kondamnis la akuziton (Jean Paul Akayesu) por genocido, dum la ekzercado de la krimo de la seksperfortado dum la tempo de la armita konflikto, rezonante “por la detruigo de la animo kaj deziro por vivi kaj mem de la vivo!” (15).

Ahmet Grajčevski, atestas ke ĉiu virino kun kiu li estas renkontita, fine estas dirinta: “Pli bone ke mi estu mortinta ol restu viva!..Estis okazinta multaj sinmortigoj dum la milito” (16).



La kovrilo de la libro Sen apologio

Deviriĝo de la socio kaj de la albanaj institucioj

Por albanoj la deviriĝo rilatas al la ties HONORO kaj laŭ la miljara tradicio “la honoro de la virino estas parto de la honoro de sia edzo” (ĉapitro II de la Penala Kodo en la Kanuno, punkto b,a, seksperfortado de la virino)

Ĉi tiu kodo, kiu gvidis dum la jarcentoj la albanan nacion ankoraŭ hodiaŭ mirigas nin per la justeco kaj nepartieco en la esplorado de la punindaj agoj ene de la gento kaj ekster ĝi. Kian puno antaŭvidiĝis en la Kanuno, por la seksperfortado al la virinoj? “Se oni aŭdis ke iu virino estis seksperfortita, la seksperfortinto persekviĝis kaj puniĝis. Frue aŭ malfrue, la perfortinto devus pagi, per sia propra sango, por sia ago” (17)

La mortkondamno ne estis donita simple por la momenta ago de la “maskla instinkto” de la aŭtoro, sed por la fakto ĉar tiu ago estis plenumita kontraŭ virino, fratino kaj knabino, ĉi tiuj figuroj “sanktaj” por albanoj.

Laŭ la esploristo Zef Ahmeti, “La Potenco de la honoro por la albano estis super la potenco de preĝejo kaj de la ŝtato...La honoro estigas la hejmon, oni diras en la Kanuno..” (samloke)

Kial hodiaŭ mi akuzas (ne ĝeneraligante) la socion de la albanoj de Kosovo por “deviriĝo”? Ĉar hodiaŭ ili malestimas kaj forlasas la miljaran tradicion de “la vira honoro”, sed ankaŭ la idealon de la ‘humanismo’ gvidantaj la plej progresivajn sociojn eŭropajn. Ili forlasis ankaŭ la patrinon de siaj infanoj, la fratinojn, la proksimajn virinojn kaj ĝenerale la virinojn, viktimojn de la seksa krimo de la serbaj hordeoj kaj la ties kunlaborantoj.

Kiel eblas, ke al socio kiu sentis dum jarcentoj la genocidon, malestimon kaj la neadon de digna vivo surdorse, nuntempe ĝuas la civitanan liberon, sed malestimas la inajn viktimojn samsangajn?

La senlaca aktivistino helpe al la viktimoj de la seksa perfortado, Behide Hasanaj, sendis al mi kortremigan atestaĵon de unu el ili. “Mi estas perfortita de la serbaj fortoj dum tri sinsekvaj tagoj, mia fratino same. Post kiam oni forpelis disde niaj hejmoj, oni forkaptis nin disde la homvico kun multaj inoj aliaj...Kiomfoje ni kontraŭstariĝis kaj sindefendis, oni demetis niajn dentojn kaj ungojn, unu post unu. Devigis nin ridi perforte, tranĉis nian korpon kaj minacis ke eltirus ankaŭ la okulojn. Estas ili masakrintaj vivajn, kiel plej malbone. Estas ili tranĉintaj la bruston kaj la mamojn..Dio mia, ne povas ni kredi al kelkiu, ne povas konfesi al kelkiu. Kiu helpus nin? Kiu subtenus nin? Kiu komprenus nin?”

Kiam mi diras al Behide ke sufiĉas ja la atestaĵoj kiujn ŝi sendis al mi, ŝi diras ‘Atendu! Aŭskultu ankaŭ ĉi tion. ankaŭ ĉi alian, havas mi tiom multe da kozo por konfesi kaj kiujn mi tenas ene de mia koro. Vi ne povas imagi kion mi devus elteni kaj neniu aŭskultas min, nek vidas”.

Nur la neregistara organizaĵo de la virinoj “la Vivo en Kastriot” gvidata de Luljeta Selimi, prizorgas 2016 albanajn virinojn, seksperfortitaj de la serbaj fortoj. 124 el ili havas vidindajn vundojn en la korpo (tranĉitajn mamojn, amputitajn fingrojn, naŭ restis kun unu okulo kaj 16 havas malfermitajn vundojn sur la vizaĝo), kiuj estas en peza psika sanstato. (18)

En la elsendo “Serĉante la perdintajn homojn”, marte 2013, nr 13, Nazlie Bala, aktivistino por la virinaj rajtoj ekde 23 jaroj, konfirmas ke “ĉiuj institucioj havis siajn pordojn fermitajn por ĉi tiu krimo eĉ ke la viktimoj estas vivaj inter ni. Mem la ŝtatgvidantoj en Kosovo tion traktis kiel hontemon”.

“La honoro,- akcentas la esploristo Zef Ahmeti - en la albana morojuro estas la kontraŭo de la hontemo. Se oni komparas la “areojn” de la honoro en la Kanuno, “rezultiĝas” ke la spaco de la honoro estas tre malvasta kaj ene de ĉi tiu spaco la albana homo devas krei sian individuecon. Tio ĉar la Kanuno postulas longan vicon de malpermesoj kaj tabuoj, kiuj protektas la homon de la “areo de la hontemo”. Socio indiferenta al sia inaj viktimoj pro la seksperfortado, kiu ne kondamnas la aŭtorojn laŭ la leĝoj, ne plu de la Kanuno, sed de la sia propra ŝtato kaj Internacia tribunalo, kiu rigardas malatenteme kiel ili suferas dum la survivado, kiu ne taksas ilian heroecan agon de la travivaĵo de la krimo plej peza de la milito kaj insistemo por returniĝi al la normala vivo, tia socio troviĝas ĝuste en “la areo de la hontemo”!

Ĉi tiun fakton atestas la kazoj de la virinoj seksperfortitaj dum la lasta milito en Kosovo, loĝantaj en la okcidentaj landoj. Kiel eblas ke ili, ĉe la fremduloj estas trovintaj respekton, estimon kaj ĉiuf flankan subtenon, dume kiam estis neigitaj de la samfamilianoj (sen ĝeneraligante), de la sociala cirklo kaj aparte de la institucioj de la propra ŝtato por kiuj ili “pagis” plej kare ol la siaj samnacionoj maskloj.

Ahmet Grajĉevski: mi starigis ĉi problemon en la registaro. Kial oni ne fondas centron kun psikologoj okupantaj per ĉi tiuj kazoj, ni en Mitrocica havas tian centron, je malgranda buĝeto, kun legejo, manĝejo. Neniu estis irinta tie por vidi. La kamaradoj diras ”lasu ĉi tiun aferon ĉar vi ne devas okupiĝi per tio”. Ili forgesas ke, sur la seĝo kie ili sidas estas ja la sango kaj la ostoj de la viktimoj. (19)

La juristino Sadie Bekiçi, ribelema, sin esprimas: “Se la maskla mondo: la edzoj, la patroj kaj niaj fratoj, ne povis protekti nin de la seksperfortaĵoj dum la milito, kiel eblas ke ili protektu nin post la milito?” (20)

La hontemo kaj plej alta nerespondeco, aperanta hodiaŭ en la Kosova socio estas la Kaŝo de la krimo. Tiu ago frapas la fizikan kaj psikan sanon de la inaj viktimoj, ĉar ne ebligas al ili ricevi la multflankan helpon, sen kio la “posttraŭmaj” sekvaĵoj, kiel tion akcentas la kuracistoj, fariĝas pli pezaj kaj pli nekuraĉeblaj. La silento lasas liberaj la aŭtorojn kiujn la moderna socio rigardas kiel potenciala danĝero por la ripetado de la tiaj krimecaj agoj. La kaŝo de la krimo de la seksperfortaĵo, bazita sur malsana moralo, de la albana socio kaj de la institucioj de la ŝtato de Kosovo, nenian rilaton havas al la Kanuno, kie oni kondamnas la aŭtoron kaj ne la viktimon.

Je nekonscia maniero, tio igas kunlaborantojn de la strategio de la militista maŝino serba de la milita tempo, ataki la albanan popolon kaj la ŝtaton de Kosovo, post la finiĝo de la milito. Same danĝera, por la albanaj viktimoj, estas la ago de neinkludo en la dokumentaro pri la militkrimoj, deflanke de la Instituto starigita tiucele, de la krimoj de la seksperfortaĵo pri kiuj sciis ankaŭ la okcidentaj ŝtatoj.

Sciigojn pri la ekzisto de la tendaroj de la perfortaĵoj en Kosovo estas donitaj ekde la militagoj de la registaro de USONO, de la registaro de Britio kaj NATO-o (21).

Oni silentas ne nur pri la seksperfortaĵo de la albanaj inoj dum la milito, sed oni ne mencias ankaŭ tiun de la maskloj. En iu studlaboraĵo de Lara Stemple (2009) (“Male Rape and Human Rights”, Hastings laë Journal 60 (3): 605. URL consultato in data 17 Iuglio 2011) oni atestas ke 80 % de la masklaj enprizonigoj en la tendaroj de Sarajevo estas seksperfortitaj aŭ turmentitaj. La aŭtorino sin esprimas ke “la manko de la atento al seksaj troiĝoj de la maskloj dum la konfliktoj, estas aparte maltrankviliga, pri iu fenomeno ege disvastigata” (22)

Do, oni ne ŝparis eĉ la albanajn masklojn, far la armeo perdinta iun ajn humanan karakterizaĵon. Estas brava ago kaj je la honoro de ĉiu albano (ino aŭ masklo), atesti pri la krimecaj agoj travivitajn sur sia korpo aŭ kiel atestantojn de ĉi tiuj agoj, por ebligi la punon de la aŭtoroj, je la nomo ankaŭ de tiuj kiujn ne plu vivas aŭ estas malaperintaj senspure.

Sekve de neengaĝiĝo, flanke de la ŝtataj institucioj de Kosovo, aparte de la Respubliko de Albanio, membro de UNO kaj subskribinto de la Konventoj pri la rajtoj de la Minoritatoj kaj pri la Militkrimoj, la internaciaj organizoj ne agnoskas kiel genocidon (kie inkluziviĝas ankaŭ la seksperfortaĵo, la krimojn al la albana loĝantaro en Kosovo. Ĉi tiu genocido kontraŭ la albanoj estas ekzercita ne nur dum la lasta sanguma milito de la serba ŝovinismo (1989-1999), sed ankaŭ dum la tuta XX jarcento, sur la spaco de la kvin balkanaj ŝtatoj.

Hodiaŭ, je plano jura, flanke de la internaciaj organizoj de UNO, estas agnoskitaj kiel genocidoj de la XX jarcento: la masakrado de la armena loĝantaro, far la Otomana Imperio (1915- 1916), la etnopurigado de ĉeĉenoj ordonita de Stalin (1944), de hebreaĵoj far Nazioj (1945), de la loĝantaro Tutsis en Ruanda 1994, de la muslima loĝantaro en Serbrenico, far la ŝtato jugoslava (2004)’ (Genocide- Wikipedia).

Jen kial oni devus silenti! La enverŝita sango dum la XX jarcento, kies lasta ago okazis en Kosovo DEVAS AGNOSKIĜI de la monda opinio.

Perfortita ino dum la milito en Kosovo estas martiro, far la malhelaj kaj krimecaj fortoj, kiuj daŭre minacadas kaj danĝerigas la pacan futuron de Balkanio. “Por ke ne ripetiĝu la pasintaj krimoj kaj certiĝu paca vivo inter la popoloj, oni devas kondamni la ideintojn, kompilitojn kaj ekzekutintojn de la strategio de pereigo kaj rasismo.

Ĉi tiun “Zeŭsan potencon” havas en sia mano la Tribunalo.

La militkrimoj en Kosovo kaj la Internacia Tribunalo

Mi diras “La Internacia tribunalo” ĉar fakte la 14-jaran biografion de la ŝtato de Kosovo, bone malbone, stampigis la internaciuloj. Mi ne kredas ke ekzistas tiom dankema popolo, por la helpo donita de la fremdaj militistaj fortoj, ol la albanoj. Ĉi tiu dankemo laŭtradicie, estos kondukata de generacio al generacio kaj okupos notindan lokon en la historio de nia nacio, pro la fakto ke unuafoje, dum la lastaj du jarcentoj pasintaj, la albanoj ĝuis ankaŭ la helpon de la Grandaj Potencoj en sia batalo kontraŭ okupaciantoj.

Mi same kredas, ke ne ekzistas pli signifa esprimaĵo, kiam “la tranĉilo estis alfiksite ĝisoste” ke albanoj akceptis ankaŭ la sakrificon de la samnacioj civilaj misbombarditaj de la NATO-aj aviadiloj dum la milito. Kiel oni estis substrekintaj en iu raporto de la Human Rights Watch el februaro 2000, titolita “La mortoj de la civiluloj dum la aera kampanjo de NATO-o”, la bombardado far NATO-o kaŭzis en la tuta Jugoslavio ĉirkaŭ 500 civilajn viktimojn, el kiuj 55-60 % estis el Kosovo. (23)

Ĉiujn sakrificojn la albanoj estas akceptintaj fiere, nur por akiri la samajn rajtojn kaj liberojn kiel la ceteraj eŭropaj popoloj. Je la nomo de “Homrajtoj” la albanoj postulas la kondamnon de la aŭtoroj, kiel por ĉiu krimeca ago kontraŭ la homa vivo (kie oni inkludas ankaŭ la seksperfortan krimon), postulo staranta sur la fundamentoj de ĉiu konstitucio de la membroŝtatoj de EU. Hodiaŭ, la albana popolo kaj la viktimoj survivintaj la sanguman militon, samtiel la analizistoj internaciaj, akceptas ke je tiu direkto, la jŭgeja sistemo en la ŝtato de Kosovo disfalis. La leĝuloj kaj diversaj analizistoj envicigas aron de kialoj administrativaj, politikaj kaj la cirkonstancojn de la tempo.

Ĉar la pritraktata temo, rilatas al la plej peza fenomeno en Eŭropo, de post la Dua Mondmilito, ne plilongigante, mi koncentriĝos ĉe la raporto “Malhumana Traktado de la personoj kaj neleĝa trafiko de la homaj organoj en Kosovo” (Dok. 12462, la 7-an de januaro 2011) de la prokuratoro Dick Marty, je la nomo de la Komitato pri la Juraj Aferoj kaj Homrajtoj.

Kial ĉi tiu raporto reprezenats la disfalon de la justeco en Kosovo kaj sekve la nepunadon (inter la aliaj krimoj) de la seksperforto al la albanaj inoj, prikonsiderante la dimensiojn de tiu krimo kaj ties sekvaĵojn?



Dick Marty



Carla del Ponte

Ĉar ĉi tiu leĝa dokumento de iu Internacia institucio, respegulas kelkajn emojn en la eŭropa sinteno, agado kaj ideologia rilate al la “Albana afero”, kiu gvidis la agadon de la juĝistaro en Kosovo, tra UNMIK kaj hodiaŭ EULEX.

Mi ne scias kial la salono plenplena el politikistoj kaj ŝtataj reprezentantoj de la plej evoluintaj landoj de Eŭropo, akceptis aŭskulti raporton bazitan sur ideologia rasisma platformo pri la ŝtato de Kosovo, ties liberiga armeo kaj la panormaro de la eventoj dum la milito. Kiel atestas mem la prokuratoro Dick Marty, lia iniciato motivigis pro la eldono de “La memoraĵoj” de la eksa ĉefprokuratorino de la Internacia Tribunal pri la militkrimoj en la eksa Jugoslavio, Carla del Ponte (“La caccia- lo e i Criminali di Guerra”, aprile 2008) pri la “organtrafiko” de la serbaj kaptitoj.

Post kiam ŝi evidentigas la “eraron” de la NATO-a bombardadoj, ŝi akuzas ke : “la klopodoj por evidenti kaj puni la militkrimojn estis koncentritaj precipe en unu direkto, apogite sur la subkompenita presumiĝo ke unu flanko estis la viktimo, kaj la alia ekzekutisto”.

Laŭ tiu ĉi logiko de la internacia prokuratoro, ankaŭ la Tribunalo de Nurenbergo, kiu juĝis la krimojn de la nazismo, estas laborinta nejuste, “nur en unu direkto”, en la punado de la nazioj. Ĉar apenaŭ videblas ia diferenco inter ambaŭ agresoj, laŭ la celoj, uzitaj rimedoj kaj ties sekvaĵoj, krom la geografia spaco kaj ke la konflikto okazis ene de la komunumo de la ŝtatoj, sub la nomo “Jugoslavio”.

Kie estas la mispaŝoj de la sinjoro Dick Marty?

Unue, laŭ la prokuratoro: “La Tribunalo Internacia pri la Militkrimoj en la eksa Jugoslavio kompetentis pri la persekutado kaj juĝado de la krimoj plenumitaj ĝis junio 1999. La agoj per kiuj ni hodiaŭ okupiĝas, oni pretenda ske estas okazintaj precipe komencante de la somero 1999”. Do, la plejparto de la “Akuzoj” inkluzivitaj en la raporto, ne povas difiniĝi kiel “militkrimoj” sed “krimoj dum la paca tempo”, de iu albana organizo sub la observado de la internaciuloj. Ĉi tiu “mistraktaĵo”

en la difino de la tempoperiodoj de la plenumiĝo de la “krimoj” flanke de la prokuratoro, malfermas la vojon por ŝveligi la raporton sian per ĉiuj agoj de la krimeco kiuj regas ĝis hodiaŭ, ne nur en la balkanaj landoj, sed ankaŭ en tiuj eŭropeaj kaj pli vaste, kiel la korupcio, homtrafiko kaj la krimo9jn de la sekslaboristoj, krimeca riĉiĝo, mafia aktiveco, politikaj murdoj ktp.

En la speciala raporto prezentita en la Eŭropa Konsilio (17/05/2013) “Pri la organizita krimeco, korupcio kaj recikliĝo de la mono” (A7-0175/2013- Salvatore Lacolino) oni rimarkas ke 74 % de la civitanoj (de EU) konsideras la korupcion sian, fundamentan problemon por sia lando, samtiel ankaŭ je la internacia nivelo kaj ke la fenomenoj de korupcio rimarkiĝas en ĉiuj sektoroj de la socio...(24).

La agoj de grupo de unuopuloj (eĉ je militista biografio) ne povas kriminaligi heroecan militon de la sklavigita popolo.

La ironio, misinformiĝo kaj la malestimo de la prokuratoro Dick Marty, sentiĝas dum la tuta “historiko” pri la milito de UÇK (Naciliberiga Armeo de Kosovo), kie la batalantoj, kiel “soldatoj por la kaŭzo de patrio ne konsistigis devige la plimulton”, Adem Jashari “iu kamparana komandanto de UÇK”, “multaj varbitoj konsistigintaj kamparanan armeon. estas transpasintaj en Kosovon kontrabandajn armilojn”, “ĉi tiu komenca formo de UÇK definitive kolapsis kaj eniris en la folkloron kiel romantika esprimaĵo por la liberigo de Kosovo”, “ke la strukturoj de la unuoj de UÇK estis adaptiĝintaj...al aro da reguloj konataj sub la nomo Kanuno”, ktp...

La distingo inter la popoloj “evoluintaj, civilizitaj kaj fortaj je militaspekto” kaj la popoloj “kamparanaj neevoluintaj” staras sur la fundamento de la rasismaj tezoj.

Due, kial por ĉiuj malaperintoj de la serba etnio oni kulpigas UÇK? En la dosiero “Pandora” oni atestas la nomojn de la personoj kiuj estas ordonintaj la komandojn (krimecajn) por neniigi la kontraŭulojn (albanajn) sed ankaŭ siaj servantajn kunlaborantojn..(25)

Trie, kial la sinjoro Dick Marty ne klopodis interesiĝi pri la daŭrigo de la genocido serba ankaŭ post la milito en Kosovo, ĉar li pretendas internacian justecon “por ĉiuj krimuloj”, sed estas preferinta teni la direkton de “la kondamnaj Zeŭsaj fulmoj” je flanko albana, sur kiu li kontinuas ankoraŭ la milita genocido? En la postmilita Kosovo, estas sufiĉa dokumentaro pri la faktoj je ĉi tiu naturo.

La dosiero “Pandora”, datiĝinta je 14-an de marto 2006, priskribas la skemon de la funkciado de la serba polico (MUP) aganta hodiaŭ en Kosovo, “kiu konsistas kaj gvidiĝas de la samaj personoj, kiujn la dokumentoj konfidantaj de NATO-o konsideras krimulojn, bandokapoj kaj de la organizita krimo en la norda Kosovo, ekde la finiĝo de la milito, en la jaro 1999.

Tuj post la milito, inter la noktoj 3 kaj 4 februaro de la jaro 2000, 10 albanoj murdiĝis de la partoprenantoj de la serbaj formacioj, dum 1564 albanaj familioj kun entute 11364 personoj perforte forpeliĝis disde siaj loĝejoj en la norda Mitrovica. (26)

Por ĉi tiujn murdojn kaj la etnan purigadon, nenia juĝproceso loka aŭ internacia okazis. La plej granda miro estas ke, kiel tion konfirmas Halit Barani, la ĉefo de La Konsilio de la Rajtoj kaj Protekto de la Libero de la Homo) en Mitrovica- ĉiuj ĉi tiuj murdoj estas faritaj je la ĉeesto de la francaj soldatoj de KFOR kaj de la internacia polico. “De kiu ni atendu por estigi la esplorojn, kiam ili mem nenion faras por preventi ĉi tiujn murdojn?”- demandas Barani. (samloke)

Kvare, kial la prokuratoro danke al la ”justeco por kondamni krimon” ne inkludas en sia raporto, la genocidon de la ŝtato de la eksa Jugoslavio dum la jaroj 1981-1989? La sanguma milito de la jaroj 1989-1999 estis nur la fina akto de la ŝtata agado serba kontraŭ la albana loĝantaro. Ĉu ne okazis la

venenigo de la miloj albanaj infanoj per venena militista gaso, ne menciante la aliajn aktojn de la perforto kaj genocido?

Kvine, pri la akuzo de la “ĉasado de la perfiduloj” mi volas rememorigi al la prokuratoro internacia, unu esprimado de Kristo en la Nova Testamento. Kiam la homamaso volis mortigi per ŝtonoj iun akuzitan virinon pro la malrespekto al la honoro, li alparolis ilin per ĉi tiuj vortoj : “Kiu el vi havas nenian pekaĵon, ĵetu la unua ŝtonon kontraŭ ŝin”” (Giovanni 8,7) (27).

La prokuratoro konvinku nin per faktoj, ke dum la Dua Mondmilito kaj post la ties finiĝo, la partizanoj kaj la franca, itala, rusa kaj alilanda popoloj, ne estas mortigintaj kaj ne estas venĝintaj al la agresintoj kiuj estis ŝmirintaj siajn manojn per sango, samtiel al la ties kunlaborantoj.

Mi ne plu plilongigas, ĉar ne estas la celo de ĉi tiu skribaĵo la kompleta analizo de la raporto de la prokuratoro internacia, Dick Marty kaj nek de la “analizoj” de kelkaj kvazaŭ albanaj intelektuloj kaj la skribaĵoj en la fremda medio, kiuj bruigas (“danke al la vero”!!!) apogante ties pensojn.

Ŝajnas ke mi foriĝis de la temo, sed fakte, ĉi tiu Raporto de la Internacia prokuratoro, atestas ke la rasisma ideologio altrudita al la justecaj organoj, ne povus kondamni la serbajn aŭtorojn por la malhumanaj krimoj de la seksperfortado.

Luljeta Selimi en sia libro “la konfesoj de la virinoj perfortitaj dum la milito en Kosovo” diras: Mi komprenas la kosovanojn kial ili ne parolas, ne skribas kaj nenion faras por malkovri la perfortaĵojn! Sed mi ne komprenas la internaciulojn agantaj en Kosovo kaj scias ke ili ricevas grasajn donaciojn por tiu ĉi laboro kaj nenion faras por malkovri la perfortintojn, nek por helpi la perfortitajn virinojn..

La alia kialo kiu instigis min eldoni ĉi tiun libron kun korŝiritaj konfesaĵoj de kelkaj perfortitaj virinoj estas la nepermesbla konduto de tiuj alvokitaj por fari ion en tiu direkto! Ili kondukas kvazaŭ ĉi tie ne okazis milito, nek murdoj, nek bruligoj kaj forrabo, nenio. Aŭ pli malbone, ili kondukas kvazaŭ la perfortaĵoj estas okazintaj ie alie kaj ne ĉi tie, antaŭ niaj okuloj kaj antaŭ la mondo!!! (28)

Fatbardha Demi

25.07.2013

Bibliografio

1- Anne-Marie de Brouëer, [Supranational Criminal Prosecution of Sexual Violence](#), Intersentia, 2005, 5–7. ISBN 9050955339, it.wikipedia.org/wiki/Stupri_di_guerra

2- Simons, Marlise -giugno 1996. “[For first time, Court Defines Rape as War Crime](#)” it.wikipedia.org/wiki/Stupri_di_querra

3- Prevent Genocide International info@preventgenocide.org

4- “Tratto da *The world's women 2000. Trends and statistics*”, a curadell’UfficiostatisticodelleNazioni Unite, Neë York 2000. Versione italiana a cura della Commissione nazionale per la parità e le pari opportunità.

5- it.wikipedia.org/wiki/Genocidio

- 6- "Tratto da *The world's women 2000. Trends and statistics*", a curadell'UfficiostatisticodelleNazioni Unite, New York 2000.
- 7- www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=139
- 8- "Ne kërkim..." Episodi 16 TV Kosova
- 9- [PDF] [Michael S. Miller - Human Rights Watch](http://www.hrw.org/sites/default/files/reports/Under_Orders_AI_Combined.pdf)
www.hrw.org/sites/default/files/reports/Under_Orders_AI_Combined.pdf
- 10- 22. 05. 2013 [pashtriku - krimet - fetnteteramosaj: përdhunimet si krimelufte](http://www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=1630) www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=1630
- 11- Angela Minzoni - Deroche. [Rape as a tactic of war – Advocacy Paper \(PDF\)](#). Caritas France, novembre 2005
- 12- Laura Smith-Spark, [How did rape become a weapon of war?](#), BBC News, 8 dicembre 2004. URL consultato in data 28 luglio 2008, it.wikipedia.org/wiki/Stupri_di_guerra
- 13- [Human Rights Neës Bosnia: Landmark Verdicts for Rape, Torture, and Sexual Enslavement: Criminal Tribunal Convicts Bosnian Serbs for Crimes Against Humanity 02/22/01](#)
- 14- [PDF] [Michael S. Miller - Human Rights Watch](http://www.hrw.org/sites/default/files/reports/Under_Orders_AI_Combined.pdf)
www.hrw.org/sites/default/files/reports/Under_Orders_AI_Combined.pdf
- 15- it.wikipedia.org/wiki/Stupri_di_guerra
- 16- "Ne kërkim..." Episodi 16 TV Kosova
- 17- "E drejta penale ne Kanunin e Leke Dukagjinit" Zef Ahmeti ,Univ St.Gallen, Zvicër - www.forumishqiptar.com/threads/88484...i.../page9
- 18- 22. 05. 2013 www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=1630
- 19- "Ne kërkim..."emisioni 16 TV Kosova
- 20- « Tribuna :Krimet e heshtura te Serbise » e organizuar nga levizja Vetvendosja me rastin e 8 marsit. <http://www.youtube.com/watch?v=1FUhKHNHpzk>
- 21- 22. 05. 2013 [pashtriku - krimet - fetntete ramosaj: përdhunimet si krime lufte](http://www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=1630) www.pashtriku.org/?kat=63&shkrimi=1630
- 22- Stemple, p. 612. dhe Will Storr, [The rape of men](#), 17 luglio 2011.it.wikipedia.org/wiki/Stupri_di_guerra
- 23- sq.wikibooks.org/wiki/NËN_PUSHTETIN_E.../13
- 24- www.europarl.europa.eu/sides/getDoc.do?type=CRE&reference=20130611&...
- 25- dosja Pandora pashtriku.org
- 26- [Dokumenti sekret i NATO's që inkriminon Oliver Ivanoviçit](http://www.lajmeshqip.com/) <http://www.lajmeshqip.com/>

27- [La pena di morte www.raffaello sanzio.ct.it/progettolegalita/2M.pdf](http://www.raffaello sanzio.ct.it/progettolegalita/2M.pdf) · Fichier PDF


28- [Rrefimet e femrave të dhunuara gjatë luftës në Kosovë – videoweb.kosovalbaner.com](http://videoweb.kosovalbaner.com) › [Hyrje](#) › [Lajmet](#) › [Reportazhe](#)

Jen filmeto surbaze de la libro de Luljeta Selimi

http://www.youtube.com/watch?v=RTZZ8vx10_M

La lasta rifuĝejo de la friponaĵistoj

[ISMAIL KADARE](#)¹



Dum la tuta jaro 1999, unuafoje en mia vivo, pro la milito en Balkanio, mi tenis senĉese notojn. Sub la titolo “Trafis ĉi tiu morto kaj ni revidiĝis”, la notoj, je formo de la tagkajero, estas eldonitaj kiel memstara libro en la albana kaj en kelkaj eŭropaj lingvoj. La tagon de la 31-a de majo 1999, en la kulmino de la bombardadoj far Nato-o, la taga noto temas iun disputon inter la albanoj en la ĵurnalo “Illyria”² de Novjorko. Motivo estis la skribaĵo “Skanderbeg havis slavan patrinon” (je aŭtoro Fatos Lubonja³) publikigita kelkajn tagojn antaŭe en la “Courrier International” de Parizo.

¹ Eminentia nuntempa albana verkisto

² Albanlingva ĵurnalo en Usono

³ Politika analizisto nuntempa, eksa politika prizonulo, filo de altranga kompartiano



Fatos Lubonja

La albana aŭtoro de la skribaĵo kulpiĝas per lingvaĵo tro severa, por kontraŭalbana kaj samtempe kontraŭeuropeca sinteno. Do, estas la 31-a de majo de la lasta jaro de la dua miljaro. La esprimaĵo “malbona horo”, pli ol metaforon, estas la ĝusta difino de la horo por Kosovo. Ĝi apenaŭ enspiras sub la serba masakro, unu el la plej sovaĝaj de la jarcento. Nato-o estas bombardante Serbion, pro la albanoj de Kosovo kaj la albanoj estas pagante la imposton.

Mallonge, por puni Serbion, Nato-o estas disponiginta la pilotojn kaj avidadilojn plej modernajn siajn, dum Kosovo estas disponiginta la plej malnovan aĵon enmondo, en ĉi tiuj kazoj: la sangon. La libero postulas nepre tiun malnovan fuelon kaj la albanoj scias tion. La serba venĝo atingas sian kulminon: raspado de la beboj, seksperfortado de la knabinoj kaj virinoj, bruligado de la domoj, blinda murdado, forpelado, teruraĵoj.

Vi ja volis la interventon de Nato-o! Jen Nato-o. ĝoju tion! Kosovo estas en plej malbona stato. Ĝi preskaŭ estas mortante. Kaj ĝuste, meze de tiu inkubo, en unu el la plej influaj revuoj eŭropaj, unu renegacianto albana publikigas ĉi tiun skribaĵon, por kio lia konscio, laŭ la kulpigantoj, devus respondi poste. La skribaĵo nomiĝus, pli malpli, tranĉilo surdorse kontraŭ Kosovo.

Ĉu estis iom hasta tia akuzo? Ĉu tiu skribaĵo estis hazarda misrezonaĵo, kontraŭnacia orgojleco, snobismo, soifo por sin evidentigi moderna? Cu tio estis ia miksaĵo de ĉiuj, eĉ io pli peza? La skribaĵo antaŭ ĉio, koncernis disputon el la plej severaj en la postkomunisma Albanio. En la centro de la interbatiĝo (ia pli preciza vorto por ĉi kazo), estis Gjergj (Ĝerĝ) Kastrioti, sed kiel ofte okazas kun s-ro Gjergj K., kiam li eniris en la scenejo, ĉiuj grandiozaj aferoj de la albana nacio, la Renesanco, la albana lingvo, la ilira deveno de la albanoj, la raporto de la mito al historio, mem la malmitiziĝo per la falsaj albanaj mitoj, estus komplikiĝontaj ĉirkaŭ li.

La du grupiĝoj interbatantaj, “la junaj albanologoj”, aŭ la renegaciantoj kiel oni nomis ilin mallonge kaj la naciistoj, iliaj kontraŭuloj, uzadus unu kontraŭ la alia ĉiujn minejojn de la albana lingvo, kio estus festo por la kompilantoj de la vortaro, se ankoraŭ ekzistis tiaj.

La diraĵo “la patriotismo, la lasta rifuĝejo de la friponaĵistoj”, estis tio, kiu pli ol ĉio alia, uzadus en la albana kroniko. Sendepende de fakto ke la ties aŭtoro foje deklariĝis Djeferson, foje Sokrato, foje la patrino de Ĉurĉilo, Voltero aŭ Djon Lenon, tio tute ne malhelpis ke ĝi fariĝu la plej konata diraĵo enlande.

La kulpigoj de ambaŭ flankoj, je krueleco, similis kiel du akveroj. Reciprokece, tiel kiel oni atendis, ili nomiĝis perfiduloj, parakaj reakciuloj, naciistoj, kontraŭalbanoj, faŝistoidoj, patrinoterezistoj,

Kanunemuloj, ĝis “laci faci” (vlahoj- noto mia B.S.) kaj “ŝule” (etnomakedonoj-noto mia B.S.) kaj nature ylberistoj, (samseksanoj- noto mia B.S.) kio estis sciite kion signifus.

Printempe de la jaro 1999, al la aŭtoro de la skribaĵo ĉe “Courrier International” uzadus almenaŭ la duono de ĉi tiuj adjektivoj. Por la rifuĝantoj, diri ke la patrino de Skanderbeg estis serba, kaj precipe diri tion ĝuste maje 1999, estis la plej preciza pruviĝo ke vi laboris por la serboj. Esence, la akuzo sonis groteska. Kun slava aŭ neslava patrino (kio povus esti vera por Vojsava Tribalda, slavino, verŝajne edzinigita al Gjon kastrojoti, la patro de Gjergj, laŭ la mezepokaj moroj, kiam la bienuloj en siaj amikaro pro geedzeco imitis la reĝojn), Gjergj Kastrioti restis la sama.

Eĉ se li havus ankaŭ la patron serba (alvenus la vico ankaŭ al ĉi tiu), denove tio nenion ŝanĝus. Li estis la unua heroo de Albanio kaj de albanoj, konata de la tuta mondo kiel tia kaj nur kiel tia, kaj tio ne povus ŝanĝiĝi iam ajn, en iu ajn cirkonstanco, de iu ajn.

Sed la rifuĝantoj ne kapitulaciis facilmaniere. Ili estis komprenintaj ke estus pli bone uzadi malpli da insultoj kaj pli da logiko. Tiel, anstataŭ kompreni ke ili estis skuigante la mondon, proklamante kiom skandaleca estis la patrineco aŭ la falsa patreco de Skanderbeg, komencis trabori kelkajn dokumentojn kaj kelkajn arĥivojn, tion kio estis permesita, nature al ili la troa disputebla impeto.

Unue, ili komprenis ke devus konvinki la menson de la ceteruloj, pri la fakto kial malbonis la skribaĵaĉo en la “Courrier International”, la lastan tagon de la monato majo, en la lasta jaro de la dua miljaro. Ili malkaŝis ke la albana “demitiganto” tute ne estis originala, kiel ili estis pensintaj. La tezon pri la serbaj gepatroj de Skanderbeg, li estis luinta de iu alia kaj ĉi tiu alia estis ĝuste la malbonfama, laŭ ili, Vuk Draŝkoviĉ, unu el la ministroj de Miloŝeviĉ, sekve unu el la responsuloj pri la masakro en Kosovo.



Vuk Drashkovic

Due, ĉi tiu tezo estis publikigita en la jaro 1987, do dekdu jarojn antaŭ la masakro, en la franca ĵurnalo “Le Monde Diplomatique” kaj konsistigis la tezojn kiuj devus pretigi la translokiĝon de la albanoj disde Kosovo.

Trie, nek Draŝkoviĉ estis originala, sed li ripetis en sia skribaĵo la malnovajn serbajn tezojn, de Radonici, el la jaro 1942, ankaŭ pli malnovajn tezojn de Vladan Ĝorĝeviĉ, Garaŝanin, Ĉubriloviĉ, Miloŝeviĉ, parolintaj ne nur pri la deveno de Skanderbeg, sed, ĉefe, ligis ĉi tiun devenon per sia insistemo ke Kosovo estis kaj restis lulilo de la serbismo, tial la serboj neniam ellasus ĝin.

Kvare, la rifuĝantoj malkaŝis ke la plejmulton de la argumentoj, jen pri Skanderbeg, jen pri la radikeco de la albanoj en Balkanio, la negaciantoj estis ricevintaj el la malbonfama, laŭ ili, la serba Akademio de la Sciencoj.

Returniĝo al “Courrier International”,

La 31-an de majo 1999

Estas terure en Kosovo. Estas la kulmino de la krimeco, de la translokiĝo, de la seksperfortado de la knabinoj kaj virinoj, mallonge, de la meskina venĝo serba kontraŭ albanojn. La serba propagando, per sia lasta spiro, volas pravigi la masakron, tion pro kio estas ĝi punata de Eŭropo kaj la Atlantika Alianco. Ĝi volas pravigi precipe la malbonfaman “etnan purigadon”, ĉar ĉi lasta rememorigas al la tuta mondo la holokaŭton kontraŭ hebreojn.



La milito en Kosovo

Oni estas elpezintaj ĉiujn argumentojn, tial klopodas reveni ĉe al la plej malnova, al tiu de kiu havis ĉiam bonsorton: Kosovo - lulilo de Serbio kaj la serbismo. Ili esperas ke ankaŭ ĉi foje ĉi tiu historio ne lasos ilin en la koto. Se ne pravigos komplete, almenaŭ tio mildigos iel la koleron eŭropo- usonan, nur tio povus servi, la historio de la serba lulilo. La lulkantoj kun la lulilo kaj beboj` estis ĉiam taŭgaj por allogi kompaton. Ili rememorigis al ĉiu ke estis facile bombardi Serbion, sed oni devas klopodi por kompreni la ties animon, la jarcentan ĉagrenon, la memoraĵojn, ties doloregon. Estis malfacile por la balkaniano disiĝi de sia historia lulilo. Des pli por la serbo.

Tial oni estis farintaj erarojn, por io kiu konsideriĝis sankta estis ja faritaj tiuj eraroj, por la malnovaj memoraĵoj, nostalgio, granda doloro. Kaj la historio, menciita centoj da fojoj, ripetiĝas. Kosovo estis nemortebla animo de la serbismo, la koncepto, simbolo, Jeruzalemo, doloro, venko, funebro, mallonge, la nodo kie ĉio komenciĝas kaj samtiel finiĝas.

En sia skribaĵo Vuk Draškoviĉ, verkisto kaj ministro pri la eksteraj aferoj de Serbio, parolas pri tute ĉi tio. La aŭtoro de ĉi tiuj vicoj havas plian memoraĵon pri tiu teksto, simple ĉar la teksto de Draškoviĉ estas skribita je la formo de la malfermita letero, direktita ĝuste al la “kolego” Kadare. Post la ties apero en la serba preso en la jaro 1987, la malfermita letero estas publikigita en “Le Monde

Diplomatique”, sojle de la festado de la sesjarcenta datreveno de la Batalo de Kosovo⁴, tie kie Miloŝeviĉ ellasis la minacantajn fulmojn kontraŭ albanojn. Ĝi estas republikigita, en la sama ĵurnalo, dekdu jarojn pli poste, en 1999, kiam Kosovo flambuliĝis, ĝuste pro ĉi tiuj fulmoj.

Draŝkoviĉ, en ambaŭ kazoj, turniĝis al mi kiel kolego al kolego, rememorigis min la sanktecon de la arto, alvokis min forlasi la naciismajn viziojn albanajn kaj kuniĝi al li (pri la afero de la lulilo, nature) kaj tion li diris kun la koro enmane, havante kiel atestanton Francion, en la kies ĉefurbo li proklamis ĉi ravigan sciigon. Estante mem facile atakebla, kiel kutime estas la verkistoj, Draŝkoviĉ turniĝis al mi per kolega bedaŭro, rememorante, interalie, la tutan kronikon de la “lulilo”, la historion, la memoraĵojn, la monahxejojn, la Batalon de Kosovo kaj la martiriziĝon de la princo Lazaro, mallonge, ĉiuj signojn kaj surteraj kaj diinajn stampojn, atestintaj, laŭ li, pri la serba aparteneco de Kosovo.

Dume, ĝuste en la vico de ĉi tiuj stampoj, li aldonis ion, kio kvankam menciita ankaŭ antaŭe tie- ĉi tie, ĉifoje akiris simbolecan ŝarĝon unuarangan: la serban devenon de Skanderbeg. Alivorte, ne nur Kosovo, kun la tomboj, monaĥejoj, vilaĝoj, doloroj kaj ĉio alia supera, estis tute serba, sed ankaŭ mem la albana ĉefheroo, Gjergj Kastrioti- Skanderbeg estis tia.

Alidirite, Kosovo, krom la lulilon, pretendis nun ankaŭ la kronon. En sia letero, Draŝkoviĉ, post kiam malfermis sian koron, kiel okazas inter la kolegoj, rememorigis ke mi estis devastiganto de la kontraŭserbaj ideoj de Vatikano kaj katolika Aŭstrio, ĉiam kiel la kolego al la kolego, skribis bedaŭrinde ke mi estis en la erara flanko, tio estas, laŭ li, en la flanko de la murdisto de Arkimedo, de tiuj kiuj bruligis Ĝordano Bruno-n, tiuj kiuj senvivigis per duelo Puŝkino-n, eĉ kiuj turmentadis dudektri fojojn sinsekve Kamapanelo-n!

Ĉi tiun tekston estas kopiinta la eta malmitiganto albana F. Lubonja, maje de la jaro 1999, en la tempo kiam Kosovo, pro tiaj tekstoj, masakriĝis kaj perfortiĝis. La skribaĵo sur “Courrier International”, por ĉiu tempo, sed precipe por la tempo kiam estis skribita, estis laŭ la rifuĝantoj, ia donacaĵo por la serboj. Sed la historio de la lulilo ne finiĝis per tio.

Laŭ la rifuĝantoj, danke al la serba diligenteco kaj danke al la volontulaj albanaj servutuloj, kies interveno havis apartan valoron, la inventaĵo kontraŭ Skanderbeg estis farita kelkajn fojojn parto de la politikaj pasioj nuntempaj en Eŭropo.

Por doni nur unu el la multaj ekzemploj, povus menciati la politika programo de la estro de DPO (Konservativa Ekstremista Aŭstria Partio), Heinz- Christian Strache, amiko de Serbio kaj kontraŭalbano, kie, interalie, je miro, oni parolas pri la afero de Kosovo, ligante tion kvazaŭ kun la serba deveno de Skanderbeg. “Kosovo estas antikva serba regiono..Krome, la nacia hero de la albanoj, Gjergj Kastrioti- Skanderbeg, vivinta de la jaro 1403 ĝis la jaro 1468, estis envere serbo, kun patrino kaj patro serba.”

Ĉi tiuj vortoj estas diritaj en Vieno, en la jaro 2008, kiam Miloŝeviĉ, la ekzekutisto de albanoj, tiu por kiu ĉi tiu aŭstra faŝisto elverŝigas larmojn, bolas akra disputado ĝuste pri Skanderbeg, pri la mitoj kiuj kvazaŭ estas kreitaj por li, kiuj devas malmitiziĝi, do ruiniĝi urĝe. Kaj inter ĉi tiuj mitoj, tiu, vidite pli supre, staranta preter la afero de Skanderbeg estas ja la radikeco de albanoj, tio kio en la historio agnoskiĝas kiel ilia ilira deveno.

Kiuj estas la friponaĵistoj kaj kiu estas la rifuĝejo

⁴ Okazis junio 1389 en Kosovo inter la koalicio balkana (serba, albana, bosnia, hungara, bulgara ktp kaj la otomana armeo), finiĝis per la disfalo de balkanioj

La nova historio kun Gjergj Kastrioti estas pli malnova ol videble. Ĝi komenciĝis tuj post la falo de komunismo. Mallonga romano, titolita “Mekami” de iu verkisto konsiderata problemeca, K. Trebeshina⁵, publikigita en dubindaj cirkonstancoj en Kosovo ankoraŭ sub la serba jugo, notas la komenciĝon de la sovaĝa kampanjo kontraŭ la personaĝo.

En tiu libro, la unua heroo de la albanoj, traktiĝas pli malpli kiel ĉevalŝtelisto kaj agente de Italio. Mem la aŭtoro, ardiĝinta pro sia atako, deklaras sin turko. Dume, la aŭtoro de la libro pretendas konsideriĝi disidenton. Al la demando, pro kiuj meritoj? La respondo estas senekuivola: pro Promemorio sendita al Enver Hoxha en la jaro 1953. Laŭ ĝi, li estas eble la unua verkisto en Albanio, kuraĝinta alskribi al diktatoro: ci kaj cial kamaradoj estas murdistoj, kiuj ne nur murdos poste unu la alian, sed ankaŭ dronigos la landon en la sango!

Sonoras iel nekredebla por iu ajn, sed aparte por la rifuĝantoj. La dubo pri la Promemorio duobliĝas kiam oni rememoras la beletran pasinton de la personaĝo: Verkisto kiel multaj aliaj, per laŭdoj por la komunismo kaj la kulmino, ĝuste marte 1953, iom da tempo antaŭ la Promemorio, per la plej himniganta poemo, dediĉita al Stalin, en la mortotago lia. Ĉi tiuj korŝiraj memoraĵoj tute ne ŝanĝas la statuson de la personaĝo. Eĉ, li ne ŝanceliĝas, nek kiam la rifuĝantoj, ĉi foje forte kolerigitaj, malkaŝas ke la kvazaŭ disidento, aŭ la kvazaŭulo, ne nur ne estis kontraŭ la reĝimo, sed estis oficiro de la malbonfama Ministerio de la Internaj Aferoj, do parto de la sanguma kerno de la ŝtato. Estis la homo kiu ĝuis kaŝitan protekton, tio evidentis. Turbula estis la kaŭzo.

La protektado etendiĝis en ambaŭ reĝimoj: en komunismo kaj en postkomunismo. De la ambaŭ brakoj de la politiko: de maldekstre akj de dekstre. Spontane oni starigas la demandon: disidento kontraŭ kiu estis envere la kvazaŭulo? Kiel rezultiĝis, lia disidenteco plej evidenta estis kontraŭ Skanderbeg. Tio kontraŭ la reĝimo, restis por pruviĝi. Ne pasus multe da tempo, post Kastrioti, oni elĵetus malbonan ombron pri tio, konsiderita la plej lumigita period de la albana historio kaj rekta filino de la iluminismo eŭropa- nian Nacia Renesanco.

Kaj post tio, sur ĉio proklamita kiel morala kaj kultura valoro de la nacio: pri la albana lingvo, pri la ilira deveno ĝia kaj de ĉiuj albanoj, pri la fondinto de la albana ŝtato en la jaro 1912, ĝis ankaŭ pri patrino Tereza, kiu dum la solenaĵo de la premio “Nobel” en Oslo, estis montrinta neelegantecon menciis sian albanan devenon. La rifuĝantoj, supozeble, perdis iun ajn paciencon. Post la troa elspeziĝo de la epiteto “kontraŭalbana” ili igis iel pli multvarian la liston de la insultoj. Oni rememorigis al la negaciantoj ilian nomenklaturan devenon, ne forgesante kompari ilin al la serpentaj ovoj, kiuj volis protekti la krimoj de siaj patroj, kio estis akceptita bone de la publika opinio.

Silenta etiko fariĝis dominanta, dume, en Albanio, ke tiaj kozoj oni ne rememori.

Tradukis Bardhyl Selimi

Aŭgusto 2013

Aldono: filmo: <http://www.youtube.com/watch?v=6q-vf3yd0gs>

⁵ Verkisto albana, suferinta longajn jarojn en politikaj prizonoj, disputantaj multe kun ismail Kadare, reciproke akuzante unu la alian.

Intervjuo kun la francaj amikoj Pol kaj Mirej



En la valo de Valbona, norda Albanio

(La duan parton de junio 2013 vizitis nian landon la paro de la francaj amikoj Pol kaj Mirej. Ĉikaze ni petis de ili la jenan intervjuon)

D: Saluton, vi ĵus revenis el la dusemajna ekskurso tra Albanio. Kiel naskiĝis ĉe vi la ideo viziti ĉi tiun malgrandan balkanan landon?

Antaŭ 3 jaroj, okaze de franc-germana renkontiĝo, enpartoprenis ĝin nia albana samideano Bardhyl Selimi. Lia prezento de la lando estis tiom interesa kaj konvinka, ke ni havis tuj la deziron malkovri la landon, kiu ĝis nun ŝajnis al ni ŝlosita je la turismo.

D: Kiajn preparojn vi faris antaŭ ol alveni ĉi tie? Ĉu sufiĉis la informacio donita de la gvidlibroj, artikoloj ktp.?

Ni acĉetis la unikan franclingvan gvid-libreton, "le petit futé", kaj landkarton por malkovri kulturon kaj valoraĵojn de Albanio. Sed ĉar tiu gvid-libreto ne estis racie konceptita, mi esploris en fadokumentaro de pluraj vojaĝagentejoj itinerojn kaj vizitindajn lokojn, kun la celo ricevi bonan ideon de turism-alloĝaĵoj.

D: Kion vi vizitis en Tirana kaj ties ĉirkaŭaĵoj kaj kiaj estis viaj unuaj impresoj pri la lando kaj la homoj?

Bardhyl amplekse implikiĝis koncerne la organizadon de nia restado, ĉefe por ke ni aprezu la ĉefurbon laŭ ĉirkaŭaĵojn, piede aŭ veturile, kaj tio dank' al Artur nia elstara ŝoforo!



Artur, la taksisto

Tial ni malkovris nepre vizitindajn lokojn, inter alie la tre riĉan, nacian muzeon de historio kun ties superbaj mozaikoj, kaj la muzeon de la bel'artoj, temo, kiun ni aparte ŝatas. Pli ol plaĉis al ni malkovri pentraĵojn de la albanaj impresionistoj kaj la originalecon de la kolekto pri pentraĵoj kaj skulptaĵoj de la epoko ligata al la socialista realismo.

Okaze de nia ekskurso ĝis la *monto Dajti*, kiun ni ŝuldis al la magio de la telfero, ni ĝuis belegan panoramon super la tuta regiono, punktita de kvietaj ripozo kun refreŝiga trinkaĵo!



En la kafejo La Akvofonto de Feino en la monto Dajt

Cetere, surprizis nin la religia fervoro, kiu incitas je la 21a jarcento al starigo de novaj kaj multekostaj konstruaĵoj, kiel ekzemple iu katedralo honore al "Mère Teresa", kiu naskiĝis en Albanio, kaj tio fronte al tiom da fendaĵoj, kiuj faciligus la tagan vivon de ĉiuj ... La fasadoj je mil koloroj, kiuj "gajigas" la urbon je originala kaj neatendita maniero ravis niajn okulojn. Memkompreneble ni pli ol ŝatis la vidon je 360° super la urbo, post suprenatingo lifte de moderna rotacia restoracio. Nu, pli ol ĝinde ankaŭ, promenadoj vespere, en tuta kvieteco, tra la parkoj kaj longe de larĝaj avenuoj, kiel la albanoj, frandante la revenintan freŝecon !

Dum la urbo kaj la tuta lando spertis ian "agitadon" pro la balotado cele renovigon de la Parlamento, ni miris, konstatante kiom la urbanoj kondukis tre agrable al ni, kaj pretis informi nin kaj eĉ enpartopreni babiladon! Ŝajnas, ke la albanoj tre feliĉas renkonti turistojn kaj estas scivolemaj pri ilia nacieco.

D: Ĉu vi povas priskribi aliajn turojn viajn tra la lando, menciante la plej interesajn lokojn vizititajn?

Dum 14 tagoj ni sukcesis esplori la ĉefaĵojn de Albanio koncerne turismon. Memevidente necesus pli da tempo por malkovri ĉiujn facetojn de la lando, kaj ĉefe de ties loĝantoj, sed ĉio kion ni vidis, pleneplene interesis nin! Ĉar Albanio, kiel ĉiuj landoj de la mediteranea ĉirkaŭo, spertis sinsekvajn invadojn far grekoj, romianoj, otomanoj, turkoj, popoloj el Italio, eĉ foje francoj kaj multaj aliaj, ne mirigas malkovri multnombrajn restaĵojn de tiuj pasintaj epokoj.

Por eviti eventualajn ripetaĵojn, mi tajpos "liter-grase" lokojn kaj faktojn preferitajn. Alveno la 18an de junio. Malkovro de Tirana kaj de monto **Dajti** dum la du sekvantaj tagoj. Ĵaŭdon la 20an, interesoplena babilado kun Ylljet Aliĉka, iama ambasadoro en Parizo. Poste vizito en la monaĥejo de la monaĥoj **Dervish**. Unu el ili afable informis nin pri la tiea vivo. Fine ni aprezis inviton de **Shaban Hasani kaj edzino**, tostante per apartaj trinkaĵoj, dum babilado - en esperanto!- pri diversaj temoj.



En la hejmo de la prezidanto de la Albana Esperanto Asocio

La 21an, unua vizito "ekstere" en *Krujë*, kie ni malkovris rimarkeblan **etno-muzeon** en riĉa domo de iama eminentulo (1794), konstruita sine de ĉirkaŭmuro de la kastelo, en kiu troviĝas ankaŭ la muzeo de Skanderberg, nacia heroo, kiu sukcesis forpeli la turkojn transe de la landlimoj. Sekvas itinero al *Durrës* kun halto ĉe la kastelo de *Preza*, ebligante ĉirkaŭvidon je 360°!



La amfiteatro de Durres

Multnombraj restaĵoj el la romia epoko, ĉefe amfiteatro por 20 000 spektantoj. Cetere, **abunda kaj varia fiŝaĵo**, ege bongusta, en plaĝ-restoracio, kun kafo gustumita ĉe lasta etaĝo de dom-turo, kiu aldonis plezuron pli "nuntempan", kun alloga observo de aktivaĵoj de la var-haveno kaj de la mar-strando.

Sabaton la 22an, jen *Berat*, kie atendis nin pluraj vidindaĵoj, la "kalaja" ("kastelo" albanlingve ...) memevidente, ankaŭ bela etno-muzeo sed ĉefe **aro da domoj**, el kiu originas la nomo "*urbo de la mil fenestroj*".



Karakterizaj domoj de Berat

La ege malnovaj glitigaj pavimaroj, elprovis la lertecon de nia ŝoforo, kiu sulcesis suprenveturi la ŝoseon ĝis la citadelo, kie kelkaj privilegiuloj, daŭre ĝuas kvietecon kaj freŝan aeron en loko "ekster la forpasanta tempo". Trans iu malnova ponto (1780), tagmanĝo en "castle park", kie ni pli ol aprezos **tipe albanan pladon je fiŝajo** ! Reveno per sama vojo, ĉirkaŭata de montoj, kiuj ofertas novajn bildojn kontrastante kun marbordo kaj kultivitaj ebenaĵoj. Lasta halto sude de Durrës elmontras "galopantan" disvolviĝon de domkonstruado iom senorde, de tiu marbordo jam certagrade trookupita !

Jen agrabla vojo tra la kamparo por reatingi Tirana-n, en kiun ni enveturas tra industria kvartalo, alia bildo de la urbo, kiu tiumomente troviĝas en ia "febra agitado" pro la morgaŭa balotado. Hupadoj, petardoj, veturiloj ĉirkaŭitaj je rubandoj, kun pasaĝeroj svingantaj flagojn je la nomo de proponitaj kandidatoj!

3

Dimanĉon, la 23an, "ripoztago". Ni vizitos la kastelon de *Petrela*, je kelkaj kilometroj for de la urbo, kiu ankaŭ proponas vidaĵojn de la ebenaĵo ĉirkaŭita de spronoj. La vojo trairas verdajn kaj freŝajn pejzaĝojn. Fulma halto apud banejo en plezur-parko sed tie kvieteco ĉar la allogaĵoj estas enurbaj, kie daŭre invitas la voĉdonejoj.

Lundon, la 24an, jen elektita dutaga ekskurso sud-okcidente, al *Saranda*, la "Albana Riviera", pri kiu fieras la lando.



En la restoracio de Orikum, Vlora

Sed ni unue travivos densan programon. Halto ĉe la laguno de *Karavasta* kun ĝiaj pelikanoj, lokon kiun ni malfacile malkovros pro manko de voj-indikoj. Dank' al muskolaj brakoj de plaĝantoj ni eliros el iom malica sablo kaj senprobleme atingos *Ardenica*, lasta monahxejo ankoraŭ okupita. Sed jen *Apollonia* kun imponaj romiaj ruinoj, kiuj najbaras horizonton kaj ĉieestan maron ...



Antikva urbo de Apolonia

Post tagmanĝo en alloga strand-restoracio, ekas suprenveturado, ne al infero sed al paradizo, ĉe la *pasejo Llogara*, 1027m, kie oni sentas la deziron "birdiĝi" kaj lasi sin ŝvebi ĝis la maro, malsupren!...



Survoje tra la Albana Riviero

Kiom rava, superba ! La mont-vojo, je ĉiu kurvo, ofertas al ni novan surprizon, novan okul-frapan, mirindan naturlokon! Sed ni devas malsuprenveturi ĉar atendas nia hotelo en Saranda. Tie ni retrovos la agitado de la ban-urboj, tute simila al tiu de ĉiuj turismaj urboj rande de maro ... Nu, ni ekdormos, "lulitaj" je multifacetaj bildoj!

Mardon, la 25an, akceptas nin miriga panoramo en la "**kalaja**" de Saranda ! Kia ajn estas la angulo, kien ni okulumas, ĉio malsamas, filmas senhalte ĉiuj fotiloj, oni vidas la golfeton de Saranda ... plenplene "bolanta" ! Konstruiĝas senbride, en perfekta anarkio, ĉiustilaj dom-ensombloj, kun la celo igi "turism-uzina" tiun etan angulon de paradizo... Kiom bedaŭrinde! Ĉirkaŭe, etendas siajn "branĉojn" la mont-ĉenoj, divers-specaj kultivitaj kampoj koloras la pejzaĝon, horizont-funde la maro, kaj, tie, tute proksime *Corfou-insulo*, kiun oni verŝajne volas imiti, kun feri-klubo por gastoj ne tro mon-dotita. Sed ĉiuj tiuj valutoj bedaŭrinde ne profitas al la aŭtoktonoj ! Tiun ĉarman lokon ni devas forlasi por atingi tute sude, kelkajn kilometrojn de la landlimo kun Grekio, unu el la plej rimarkeblaj vizitindaj lokoj de Albanio, **Butrint** kun la sennombraj restaĵoj de sinsekvaj epokoj kaj civilizacioj ek de la 8a jarcento antaŭ nia erao! Ekde 1920 arkeologiaj esploroj daŭre malkovras novajn elementojn, kiuj riĉigas la lokon, agnoskita de Unesko ekde la jaro 1992.



En Butrint, Mirej kaj Artur

Ni poste laŭiros la vojon ĝis *Gjirokastër*.



Strato en Gjirokaster

Serpenta itinero tra montaro ... Ni lastsekunde evitas nesingardeman testudon, kiu kviete trairas la ŝoseon! Je kelkaj kilometroj ni haltas en kurioza loko, "**la blua okulo**". Temas pri subtera -45 metrojn- akvofonto, kiu tute ne timigas junajn riskemulojn salti enen ek de rok-elstaraĵo. Alveno en la valon de la *Vjosa - riverego*, kies akvo-fluoj jam el Grekio, devas printempe torente aperi. Sed fine de junio ili ne tiom imponas kiom la strat-laboroj efektivigitaj por atingi la urbon *Fier*. Akra polvo penetras ĉien kaj fak-maŝinoj aktivigas plurloke por transformi difektitan ŝoseon, en belegan aŭtovojejon, kiu faciligos venonte komercajn kaj turismajn ligojn kun la interna regiono. En la tuta lando svarmas tiaj laboroj sturmtraktitaj, por "liberigi" urbojn lokitajn for de la maro. Oportuna halto en *Gjirokastër* por memkompreneble atingi la citadelon, -memevidente uzante samajn, superbajn glitajn pavimarojn, militposteno por kontroli la valon. El tie, okulfrapa malkovro super la urbo, malnova aŭ nova, kun grizaj tegmentoj laŭ otomana stilo.

Antaŭ reatingi la mar-randon, la vojo boras al si itineron tra seka kaj montara kamparo. Iom lacigitaj ni finos tiun esploradon sub temperaturo pli alta ol 30°! Sed por satigi nian scivolon, ni ja deziras malkovri plej amplekse tiun simpatian landon, jen ni denove pretaj por du ekskurso-tagoj sud-orienten. Por atingi *Elbasan*, unua halto, ni uzos la freŝboritan tunelon sur la ellaborata bela aŭtovojo, kiu ebligas baldaŭ ligi Tirana al *Korça*, ankaŭ kun superba panoramo. Industria urbo, Elbasan enhavas ankaŭ ruinojn de la malnova fortreso, ĉar la urbo lokiĝas sur la fama *via Egnatia*, unu el la ĉefaj romiaj vojoj, ebligante sekuran halton.



En la citadelo de Elbasan

Suprenveturante la valon *Shkumbin* ni atingos la *pasejon de Thana*, kie ni ĝuos denove belegan rigardon, ĉifoje al la lago *Ohrid*. Rava malsupren- veturado sen iu ajn obstaklo por la fotilo, kaj ni povos aprezi vidaĵon de la alia rando, en Makedonio kaj la insuleton *Lin*, kiun ni vizitos dum la reveno. Ĉe la pinto de la lago jen *Pogradec*, kie ni tranoktos. Ĉu pro iama somer-ripozurbo de la diktatoro, la urbeto aspektas iom pli modernigita ol la aliaj pri urbanismo, eĉ se kelkaj konstruaĵoj aŭ la granda ombrumita aleo elvokas iom la eks-sovetan stilon.

... Plaĉas ege al ni la etoso, tiom pli ke ni havas bonŝancon renkonti esperantistan veteranon, *Gjergji Gusho*, kiu plezure gvidos nin tra la urbo, cele malkovron de tipaj kvartaloj.



En Pogradec kun esperantisto Gjergji Gusho

Pogradec profitas pluson, ĉar lokita piede de montaro kaj rande de la granda lago, kiu ebligas enteni agrablajn temperaturojn longe de la jaro. Ni frandos la faman **Koran**, endema fiŝo de lago, kiu dum pra-epoko estis maro ... Jen salmaĵo sed ankoraŭ pli bongusta ! Rapida ekskurso ĝis la plilgrimejo multe vizitita *Sankta Naum*. Sed ne eniras Makedonion, kiu deziras! Halto ĉe la landlimo-giĉetoj postulos unu horon da atendo! Okulumo ĉe la alia rando divenigas, ke necesos surveturi montvojon verŝajne ankaŭ belegan por atingi Pogradec.



La mirinda lago de Pogradec- Ohrid

Frumatene, la 27an, post solida matenmanĝo en la internacia hotelo, ni prunteprenas vojon al *Korçë*, kiu facile trairas la vastan ebenaĵon, sed ni surprize malkovras domaron tute apartan de tiuj, kiujn ni vizitis ĝis nun. Regas etoso duon-komunista, duon-orienta kaj la ampleksa plenaera bazaro sur la vasta placo plifortigas tiun impreson.



La malnovaj gastejoj en Korça

Ni dediĉos tempon por trairi tiun enorman stokon da diversaj varoj, kiuj koncernas dom-mastrumadon kaj profesiajn taskojn! Artur tute senpene aĉetos baterion por sia poŝ-telefono... inter centoj da ili! Plua vizito de najbara antikva karavanejo ... Oni facile imagas la etoson, kiu regis tiuepoke, kiam komercistoj renkontiĝis kun vendendaĵoj el ĉiuj anguloj de Eŭropo aŭ Azio. Tiu spektaklo forte memorigis al ni Uzbekion ! Oni ankaŭ fulme piedumas ĝis tombejo, kie ripozas francaj soldatoj, kiuj militis por akceli ian liberecon de la albanoj.



La tombejo de la francaj falintaj soldatoj

Tiu evento iĝas tiom neatendita, ke ĝi meritas esti konata ! Vizito de la nova ortodoksa preĝejo, de la "orienta" muzeo riĉa je diversaj trezoroj, tapiŝoj, pentraĵoj, brodaĵoj, ktp ... sed kiu plej interesis nin estas malkovro de la muzeo de la latina alfabeto, skribliteroj instruataj ek de ... 1887! Diversaj dokumentoj de la sama epoko elvokas laboron de la iamaj lernantoj! Lasta eta halto piede de la malnova moskeo, kies videblaj fundaĵoj postulos monatojn da laboro antaŭ retrovi sian iaman aspekton certe okulfrapan ...

Nu, ek al *Voskopojë*, altitudo 1200 metrojn, kiu famiĝas pro siaj preĝejoj. La vojo enŝoviĝas tra la montaron sed pluvo pli kaj pli densa vualas pejzaĝojn certe vidindajn kaj ni malkovras neatendite, je la horo de tagmanĝo, vilaĝon en plenplena renoviĝo. Ni profitas gastigon de freŝmalfermita, tipa restoracio, kie mirinda ŝafaĵo satigos nian apetiton ! Daŭre densiĝas pluvo, kaj Artur lerte manovras sian stirilon por veturi sur tute difektita ŝoseo... Spite vanan serĉadon de emfazita monasterio kaj de preĝejoj entenantaj unikajn freskojn, ni rezignos kaj retroveturos por retrovi Tirana-n ! Eta halto ĉe rando de la lago *Ohrid*, kie finfine reaperas suno, kiu akompanos nin ĝis la hotelo!

Vendredon la 28an – Du urboj en la vizit-programo, *Lezhë* kaj *Shkodër*, ambaŭ nord-okcidente, ĉe la landlimo de Montenegro kaj sude de la plej alta montaro de Albanio, 2694 metrojn ...



El la kastelo de Shkoder

Suprenirado ĝis la kastelo de la unua ofertas, kiel supozite, revan rigardon super la ebenaĵo, la urbo, la maro kaj la montaro de la ĉirkaŭaĵo. Sed, kiel en Saranda, la impet-dezire konstrui domaron ne konas limon, kaj stariĝas feri-apartmentoj en granda malordo ... kiel antaŭ 50 jaroj ĉe la hispana *Costa Brava*, apartmentoj, kiuj hodiaŭ ne plu trovas aĉetantojn! Ni bondeziru sukceson al tiuj konstruaĵoj! Sama fenomeno ekzistas en pluraj landoj eskapintaj el la komunismo, kiel ekzemple en Bulgario rando de la Nigra Maro. Shkodër ĉarmos nin pro la impona fortreso kaj la tute **nova alloga centro por piedirantoj.**

Je la 10a matene, sabaton la 29an, ni pli ol plezure enbusiĝas kun nia fidela amiko Bardhyl, deĵoranta ĉiĉerono, kiu akompanos nin por densa malkovro de vizitindaĵoj, direkte al *Bajram Curri*, nord-oriente, ĉe la limoj de Albanio. Pro ne komfortaj monto-vojoj, pli oportunas laŭiri superban aŭtovojon ĝis *Prizren*, en la najbara Kosovo, kaj de tie traveturi la ebenaĵon antaŭ re-eniri Albanion pli norde, atingante *Bajram Curri* laŭ la plej bonaj kaj la plej rapidaj kondiĉoj.



Nova aŭtovojo en Kosovo

Sed denove pluvo akompanos nin en tiu impresa ĉirkaŭaĵo. Tiom pli ke ni konscias pri la gigantaj laboroj postulataj por konstrui tiun superban aŭtovojon kaj tunelon meze de turmentita reliefo... Necesis ja energio kaj kompetenco. Ĉi-foje ni fulme transiris la landlimojn, kaj traveturado de Kosovo ne surprizis nin. Ĉar tiu lando, ke kelkaj nacioj persistas ne "agnoski", tiom pli ke ankaŭ ili spertas saman kontencion, travivas plenan disvolviĝon, kiel Albanio. Oni eĉ ekvidas vent-motorojn, male al ĝia najbarino !

Valizojn en hotelo tuj post nia alveno, sendube malnova feri-centro de la "malnova epoko" kaj per loka taksio ni ekveturas al *Valbona*, ultima celo de tiu vojaĝo. Sed la albana montaro ja ne volas oferti la malavaran sunon, kiun ni ĝuis dum niaj aliaj ekskursoj. Griza ĉielo, surmeto de varma vestaĵo. Ni rapide enpenetras tamen abruptan montaron, en kiu mi tiom volintus piediri ... Sed malfruiĝas, ni dediĉos iom da tempo por vespermanĝi en restoracio por "migrantoj" kaj re-laŭveturos difektitan ŝoseon, ĝis nia "sovet-hotelo" –tute propra esprimo nia!- kiam ni deziras aludi konstruaĵojn el la komunista epoko ... NI ja devas konstati, ke ĉiuj posedas ja ian "famili-aspekton" !

Postan tagon, dimanĉon la 30an, ni vere bedaŭras forlasi tiuj mont-pejzaĝon , kies kadron ni sopiris malkovri kaj admiri, kiel ni tiom ŝatas, sed buso ne atendas. Ni veturis la saman itineron inverse ĝis *Gadime*, kie per taksio ni trafis kuzojn de Bardhyl, kiuj gastis en la regiono, kaj kunekun ni vizitis grotojn kun granda intereso.



En la 80 miljonjara marmora groto de Gadime en Kosovo

Jen plue okazo elvoki la estontecon de tiu parto de Eŭropo kaj ĝian eventualan eniron de EU. Dank' al esperanto, ĉar la albana lingvo restis por ni tute nekomprenebla, ni satigis nian scivolemon !

La lastan vesperon en Tirana ni dediĉis al amika kunĉeado, dum kiu ni kore dankis Bardhyl por la atento kaj komplezemo, kiun li daŭre esprimis dum nia gastado. Ni plezure aprezis la partoprenon de lia edzino en bongusta vespermanĝo en la restoracio "Gloria" ... Tiu neforgesebla momento konkludis mirindan estadon, kiu sukcesis ĉiuvidepunkte !

Ni tutkore dankas denove nian gastiganton kaj memevidente nian serveman ŝoforon Artur! Ambaŭ ebligis al ni konkretigi vojaĝon en tiu "mistera Albanio", ĉar nekonata, sed tiom alloga !

D: Certe vi konstatis multajn mankojn en la lando rilate la infrastrukturon, trafikon, vivmanieron, ks. Ĉu vi povas menci tiom?

Anstataŭ elvoki la de vi aluditajn mankojn, mi taksas pli oportune raporti pri kio mens-frapis nin, ĉiuteme.

= Tiu lando, eĉ je eta amplekso, 340 x 150 km-ojn maksimume, ofertas grandan variecon de pejzaĝoj: ebenaĵoj, mar-randoj, montaroj, kamparoj, arbaroj, sekaj regionoj, ktp ...

= Rimarkiĝas enorma kontrasto inter "tradicio" kaj "moderneco", laŭ urbanism-vidpunkto kaj vivmodoj, kiun ni ŝuldas al eniĝo de unu al alia dum tre kurta tempo, apenaŭ 20 jaroj, male al okcidentlandoj, kie la ŝanĝiĝo okazis malrapide dum 60 jaroj.

= "Sovaĝa" afiŝado iĝas tro libera, kaj ĝin oni devos "reguligi", ĉar tio vere makulas konstruaĵojn kaj pejzaĝojn. Eĉ politikan propagandon oni malkovras sur historiaj konstruaĵoj, jen prioritaton leĝigi !



La granda bulvardo de Tirana

= Abundo da alilandaj lernejoj kaj kuracejoj ŝajnas elmontri ian mankon pri sanzorgado kaj edukado, tiom pli ke tio instalas servojn laŭ du "rapidecoj", lige al monposedo.

= La plej "videbla" farena strebado koncernas starigon de traktado de la rubaĵoj: apartigo, forpreno, depono, ekologia traktado, reetligado, ĉar la maniero alfronti tiun problemon elmontras la staton de disvolviĝo de iu lando ! Ni ne malkaŝu tamen, ke Francio ne estas unu el la plej gratulindaj "lernantoj" tiuteme !

= Ega kontrasto inter "Mercedes" kaj ĉaretoj trenitaj far bicikloj aŭ ĉevaloj, kiujn oni foje trafas sur aŭtovojoj kvarŝoseaj ! Stirado de veturiloj iĝas tre danĝera ĉar la trafik-kodo ne estas obeita, ekzemple la temo de prioritato en la tiel nomataj "rond-kruciĝoj". Ĉar tion ne ignoras alilandaj turistoj, kiuj sekve hezitas uzi siajn proprajn veturilojn aŭ eĉ rezignas pri la servo de lu-preno, kiun ni-mem unue elpensis. Jen enuiga situacio, ĉar turismo riskas lokiĝi nur sur marbordo aŭ reduktiĝi je lu-preno de fiksa rezidejoj, en internaciaj "kluboj", kiuj enpoŝigas devizojn! Tio tute ne favoras albanan ekonomion! Sekve "turismo" malfacile eniras la landon, kiel ekzemple en Kreto, kie grupiĝas turistoj nur en la du ĉefaj urboj, *Heraklio* kaj *Rethymnon* ! Nu, urĝas "eduki" la stirantojn!...



Aerporto de Tirana

Plej mirigis nin konstatante, ke la piedirantoj trairas stratojn je 4 ŝoseoj, sen iu ajn timo, kun totala senkonscienco! Mi malkovris lertan sistemon cele malrapidigi alvenantajn veturilojn, tio je tre modesta prezo; temas pri ŝnurego fiksita sur la ŝoseo, ŝajne iagrade pli efika ol la pli ellaboritaj sistemoj ege multekostaj, uzataj "ĉe ni" ! Same sistemo de surgrundaj kroĉiloj, kiuj supren- kaj malsupreniras, kiam oni elektas la unikan permesatan ŝoseon! "Bravo" !

= La prezo de benzino estas kompanse alta, 1,30 € koncerne senplumban karburadon, kompare kun la enspezaro de la albanoj aŭ kun aliaj produktoj regule uzitaj, kaj ĉefe al la prezo postulata en Francio nuntempe, 1,60€ ... La ŝtato devas konscii, ke se oni posedas sufiĉe da rimedoj por aĉeti veturilon, oni havas sufiĉe da mono por funkcii ĝin ... Ĉe ni veturilo estas taksata necesa posedaĵo de ĉiu civitano, kiun li devas uzi por plenumi labortaskon...

= Kutimo kiel en Francio, en Alzaco, farbi fasadojn je diversaj tre vivaj koloroj estas tre agrabla por la okuloj, plue tio gajigas makulitajn aŭ certagrade difektitajn fasadojn.



Sur la trotuaroj de la albanaj stratoj

= Konstatigās disvolviĝo de "distro-domaroj" longe de mar-rando en la urboj de Durrës, Lezhë, Sarandë, kaj tio laŭ anarkia kaj eksternorma maniero, tiom pli ke raras turistoj sur la aluditaj plaĝoj! Kiu venos okupi tiujn apartementojn? Kion volas Albanio? Turismo por homsvarmo aŭ "elektita" turismo? Bedaŭrinda situacio por tre allogaj lokoj. Ekzemple, ĉu oni sukcesos antaŭgardi la lagunon de *Karavasta*? Intereso de iu lando ne mezuriĝas je grava priatento de lokoj taksataj heredaĵoj de Unesko, sed ĉefe je kapableco respekti kaj valorigi posedatajn juvelojn!

= Okuloj aprezas konстати, ke "aeraj" tubaroj malaperas subgrunden !

= Feliĉe, limiĝas ĝis nun la invado de tutmondaj komerc-centroj, kiuj iom post iom malaperigas la etajn, simpatiajn strat-butikojn, kie oni povas havigi al si regionajn legomojn kaj fruktojn tre bongustajn, kiuj ne originas el la antipodoj! Momente nur "Carrefour" mi vidis. Tion ni spertis proksime de nia hotelo, kie oni plezure aĉetis ĉiutage maturajn fruktojn: ĉerizoj, abrikotoj, bananoj, ktp. Sed la potencaj grupoj internaciaj ankaŭ ĉeestas, kaj enkalkulas altrudi siajn vidpunktojn al la albana ekonomio, ne forgesante la "furiozan" normaligon: *Mac Do*, pizza-butikoj kaj aliaj ... Tutsame por estigoj de bankoj aŭ fabrikoj de veturiloj.

= Multnombraj kafejoj, kie kunĉeadas gastoj antaŭ trink-glaso ... Iom mirige: ĉetablas virinoj aŭ viroj, raras ambaŭ sammomente! Tiuteme malmultas restoracioj. Oni povas observi, ke jaroj da komunismo ne forpelis ian patriarkan kulturon prapatran, kiu kun alveno de liberalismo ŝajnas reĝi hodiaŭan modelon. Io mirfrapis min: oni ne vidas promenantajn parojn, manenmane, kiuj publike kisas sin, kiel kutimas en "latinaj landoj" ! Manko de restoracioj, kiuj proponus albanajn specialaĵojn, kuragigas instaligon de "fast foods"... Ege bedaŭrinde, tiom pli ke malfacilas disponi pri menuoj en

angla aŭ itala lingvo, kiun ni, francoj, sukcesus kompreni. Kuraĝigon kaj gratulon al kelkaj tiaj iniciatoj, kiuj evitas al "malsatantoj" gastigi je hazarde renkontitaj, aluditaj "fast foods", kie ili "vidas" kion oni proponas !

= Oni konstruas kiel oni volas: loko, arkitekturo, alto, surgrunda areo, ktp; urĝas ellabori regulojn por ne minaci lokan belecon, tiom pli ke multaj konstruaĵoj ne konas finpretiĝon.

Grava bedaŭrindaĵo ! Restas ankoraŭ signoj de la komunista epoko, konstruaĵoj intreralie, kazematoj aŭ la "piramido" centre de Tirana ekzemple, kiuj ne eskapas je la modo de la "tags"... Sed ĉar ili estas parto de historio de Albanio, domaĝus ilin detrui, male oni savgardu kelkajn post renovigo, tiamaniere ke la junularo povu aprezi la ŝanĝiĝon ne forgesante, ke ĝi datumas el proksima periodo ! Trafa ekzemplo de rehabilitado, la "Blok".



La centro de Tirana

Tamen stariĝas en la tuta lando multnombraj statuoj honore al la patrolando kaj tiu sinteno ŝajnas ankoraŭ grava ĉiuloke. Cetere "ŝvebas" ĉie la albana, nacia flago !

= Logiko volis, ke Tirana iĝu ĉefurbo, ĉar lokita en la centro de la lando, kio, racie, estas bona ideo, sed tio ne respondas al klasika disvolviĝo de antikva urbo, rande de riverego por plenumi la bezonojn de grava loĝantaro. Tio estas parto de ĝia originaleco, kaj ĝia situo 40 km-ojn for de la maro, piede de la monto Dajti, estas bonŝanco. Tiu-ĉi lasta devus nepre fariĝi la "verda pulmo" de la urbanoj, per multifacetaj aktivaĵoj, ligataj al la libera tempo, vintre kaj somere.

= Kiam en Francio oni elvokas Albanion, la konversaciantoj aludas problemojn de sekureco ! Memevidente ni vidis policiston ĉe enirejo de bankoj, tre malofte por respektigi la trafikregulon, sed

neniumomente ni sentis ian antaŭtimon dum promenadoj, kaj eĉ vespere en Tirana aŭ en vizititaj urboj. Koncerne la "poŝ-vizitantoj", evidentiĝas ke ne ĉi-tie ili agadas, sed en Parizo aŭ en Barcelono !

= Ni ankaŭ admiris florojn, kiuj elvokas la landojn borde de Mediteraneo: laŭroj, bugenviloj, bignonioj, hibiskoj sed ankaŭ magnolioj kun larĝaj folioj dumjunie ...

= Albana lingvo ŝajnas al ni tute nekomprenebla tiom pli, ke la albanoj elparolas fluege je itala maniero, kaj tio tiom laŭte, ke ili ŝajnas sperti kolereton kiam ili esprimiĝas! Koncerne muzikon, krom tiu por la junularo, ĝi similas al nia propra, kaj ni ne havis bonŝancon aŭskulti verkaĵon tipe albanan. Eta bedaŭrindaĵo.

= Religia kulto ŝajnas reakiri gravecon, se konsiderante konstruaĵon de novaj preĝejoj ortodoksaj, katolikaj aŭ dediĉataj al monaĥoj "dervish". Tio ankaŭ konstatigis en aliaj eks-komunistaj landoj.

= Oni sentas, ke ĉe la junularo estiĝas forta deziro "okcidentaniĝi", roboj por festa edziniĝo, jam menciitaj "fast-foods" ekzemple ... Domaĝe lasi malaperi ĉiujn specialaĵojn de tiu bela lando. Eĉ se la mondo suferas je financa krizo, oni konstatas tie-ĉi nepran apetiton je disvolviĝo.

= Dise oni vidas bovinojn, azenojn aŭ ĉevalojn ligatajn al fosto sen iu ajn eblo moviĝi, kio estus taksata aliloke kiel malbona traktado de bestoj. Eble tion oni eble ŝuldas al manko de disponeblaj grundoj kultiveblaj. Same agrokulturo restas ankoraŭ malmulte mekanizita, multaj personoj kultivas per ŝovelilo aŭ pioĉo. Probable ĉar poseditaj grund-areoj estas tro malgrandaj. Ekonomia disvolviĝo ŝajnas estiĝi prioritare je komerco kaj ne je agrokulturo.

Ĉar vivante antaŭe en ia aŭtarcio, estis necese prizorgi kultiveblan grundon, devigante ligi bestojn je fosto. Fakte nenie vidiĝas instalaĵoj dediĉitaj al iuj bredadoj. Krom ŝafoj aŭ kaprinoj, oni ne manĝas ofte bovaĵon, aŭ ĝi devas esti importata mi opinias, ĉar la bovinoj estas tro magraj por disponigi viandon dediĉataj al pretigo de bonaj pladoj ... Sed abundas fiŝoj direkte kaptitaj ĉe bordo aŭ en maro. Ni esperu, ke daŭros tiu valoro. Cetere ni ĉeestis en Pogradec je fiŝ-kaptado per reto ! Nur okaze de festo vidiĝas tia evento ĉe ni! Ankaŭ mirige konstati manko de oliv-arbaroj kiel en najbaraj landoj. Pri deserto, krom itala "tiramisu" aŭ glaciaĵoj el kuveto, la franca "frandemul(in)o" sentas ian mankon ! Feliĉe abundas sukulentaj fruktoj ... eĉ "mirabelle", emblema pruno el nia lorena regiono ! Vera surprizo malkovri tiun flavan frukton en Albanio, tre rare kultivita en Francio aŭ aliloke !

= Tre interesige malkovri en muzeoj, speciale pri etnografio, objektojn tute similajn al tiuj de niaj paparencoj sed en tre malsimila viv-ĉirkaŭaĵo.

= "Liberaj" hundoj vagadas iome ĉie, sed ili ne ŝajnas agresivaj ... Neniu "dom-hundo" ligata al ŝnuro, kio por ni estas tre agrabla konstato, ĉar en Francio la kulto de la familia hundo troas ! Nu, tia sinteno daŭru en Albanio !

= Pri industrio, ne vidiĝas multaj termikaj centraloj... Kiamaniere produktiĝas energio ? Cetere disvolviĝas foto-voltaikaj paneloj, aldonitaj al akvo-cisterno ankritaj sur la tegmentoj, kiuj tradicie ne poluas. Kunekun ili ofertas ian energi-aŭtonomion, kiun oni devas maksimume kuraĝigi. Aliflanke staras en Kosovo vent-motoroj ... Eble tion ankaŭ instalos fakaj inĝenieroj en Albanio.

= Inter la sinsekvaj civilizacioj la romiana postlasis la plej gravajn restaĵojn. Oni konstruis "solide" tiuepoke, niaj monumentoj ne akiros tiom longan vivon! Sed tre agrablas promeni tra Tirana por ĝui ĉiujn stilojn de arkitekturo, ĉefe italan, grekan, balkan, ktp. Hodiaŭ la stilo de freŝbakitaj domoj elvokas tiun, kiun oni renkontas en Rusio, Ĉinio aŭ en ĉiu lando en periodo de disvolviĝo.

Bedaŭrindas konstati, ke eĉ tio submetas sin al tutmondiĝo, despli domaĝe ke la balkana stilo de malnovaj domoj, kiel ekzemple en Bulgario, ofertas tre personan vizaĝon de la lando.

= Fervojo ŝajnas forlasita, almenaŭ por transporto de la homoj, profite al uzo de busoj, pli "fleksebla" kaj malpli kosta. Tamen linio Tirana-Pogradec meritis modernigi por iĝi inter junio kaj septembro turista vojo, ĉar ĝiaj art-konstruaĵoj kaj itinero aparte allogaj, tra montaro kaj panoramo super la Ohrid-lago, estigus turisman atuton por alilandaj gastoj, kiuj aprezus tian proponon!

= Ni ŝatis eblecon tranokti en hotelo laŭ modesta prezo, kiu disponigas klasikajn necesojn, kaj plue, lokigita apud la centro. Denove dankon al Bardhyl! Oni devus tamen inciti vilaĝanojn disponigi "gasto-ĉambrojn", tre aprezataj de vojaĝantoj, tio favore al alveno de turismo internen de la lando. Notinde: uzi efikan inform-dokumentaron ekstere laŭ hodiaŭaj normoj, ebligante malkovri facile kion oni serĉas, monumenton, restoracion, ktp... Koncerne "reklamon", tro abundas ĉiuspecaj paneloj, kiuj agresas la rigardon, ĝis malkaŝi ian indikon pri kio oni bezonas !

= Sed nia unika bedaŭrindaĵo estas neebleco atingi la valon de *Theth* pro ne facilaj uzeblaj transportrimedoj troveblaj, cele malkovron de tiu alloga loko, certe tre "distanca", sed vere vizitinda! Jen io prizorgenda por la turismo, cele faciligi la uzotan itineron. Verŝajne ekzistas gasto-ĉambroj, sed kiamaniere profiti ilin, se la aktuala vojo restas nepraktikebla? La unua plezuro de turisto estas aprezi la traveturantan pejzaĝon... kaj ne la truojn en la ŝoseo. Tiam li ĝisfunde poste ĝuos vagabondadon kaj gastigon memorindajn ! Valo al *Valbonë* estas en fazo de taŭg-aranĝo, jen io eksterordinara kaj espero por *Theth*! *Shkodër* posedas siaflanke laŭ turisma avantaĝo bonegajn plusojn, ĉar proksime akvo, lago aŭ maro kaj montaro. Jen bonŝanco valorizenda kiel en Francio *Nico* kun postregiono, aŭ *Genevo* en Svisio.

Jen kialo pro kio necesas doti *Theth* je mankantaj rimedoj. Kaj tiu komplemento allogos alilandajn turistojn. Ne surprize se vojaĝ-agentejoj, kiujn ni konsultis por elekti intereso-centrojn en Albanio, proponis ĉefe itinerojn tra montaroj, ĉar tio iĝas pli fruktodona ol proponi ĉeestadon ĉe la maro, kaj konstatigaŝ, ke pli oftas tiaj demandoj el la turistoj de okcidenta Eŭropo.

= Jen do la frukto de niaj observoj, konkretigitaj je pli ol 5000 fotoj, kiuj ebligas konservi, daŭre vivantajn, memoraĵojn pri lando ege alloga, riĉa je historio plur-kultura kaj je geografio multfaceta, ofertante superbajn pejzaĝojn, sed ankaŭ la kondensaĵon de la viv-sintenoj de homaro, formita far jarcentoj, kaj hodiaŭ malfermita al tio, kion povas alporti al ĝi el la mondo la plej bonajn.

D: Ĉu vi pensas ke indas reviziti Albanion post kelkaj jaroj? Ĉu vi rekomendus ke tion faru ankaŭ la aliaj vialandanoj?

Kiel vi certe komprenis, montaron ni ŝatas, kaj cele profiti tiun superban ĉirkaŭaĵon ni kun plezuro retrovus Albanion por ĝui neĝ-rakedon aŭ trapiedumadon. Sed nia amikeco kun Bardhyl povus iĝi dua okazo de revizito, ĉar li sukcesis spite familian devojn, organiziĝi por dediĉi al ni plej eble maksimuman tempon ! Kaj tion, ni ne pretas forgesi !

Tuj post nia rehejmiĝo ni elvokis Albanion "ĉirkaŭe" kun multe da entuziasmo. Baldaŭ, en la regiona dulingva bulteno "La Informilo", kiun redaktas Pol, aperos rakonto de nia epopeo. Jen la plej fruktodona reklamo farebla por promocii turismon en via lando. Dankon al ĉiuj albanoj, kiuj malkovrigis al ni ilian landon kaj varme akceptis nin.

Multan dankon!

Intervjuis: **Rita Permeti**

Novajletero de la Veromovado de Berkshire, Britio, por junio-julio 2013 (2013-08-08)

(fragmentoj)

* Malglataĵoj ĉe BBC: Kial ne tutsimpe raportoj la novaĵojn?

BBC estas en profunda malfacilo. Mi ĵus aŭdis, ke unu persono, kiu plendis pri televidraporto en BBC fare de Jane Standley pri la kolapso de Konstruaĵo 7 verdire ricevis repagon pri parto de sia televidpermesilo (58.24 minutojn post la komenco de la video: <http://www.ukcolumn.org/video/uk-column-live-21st-december-2012>). Mi nun vidas en The Press Gazette de la 5a de aŭgusto, ke 'Paul Mason de Newsnight sekvas Crick, Frei kaj Long de BBC al Channel 4 News' (<http://www.pressgazette.co.uk/newsnights-paul-mason-follows-crick-and-frei-bbc-channel-4-news>). Michael Crick forlasis Newsnight post kiam li estis 'tre malkontenta' pri sia nova 'malbone difinita' rolo. Li aludis ankaŭ al la forviŝo fare de BBC de horoj da neelsenditaj novaĵraportoj, dirante, ke "iu ajn kiu faras dokument-filmon ricevos multe pli da materialo el la arĥivoj de [la sendependa] ITN ol de tiu de BBC". Aliflanke, Matt Frei neniel kritikis BBC, kaj li daŭrigas kiel Vaŝingtona korespondanto tre simile kiel antaŭe, provante persvadi nin pri la novaĵoj anstataŭ tutsimpe raportoj ĝin. Rilate al Newsnight de BBC, mi sentis dumlonge, ke oni iom post iom banaligas ĝin. Ĵus antaŭ ol mi verkis la supran pecon (la 5an de aŭgusto) mi enŝaltis Newsnight meze de diskuto pri 'feliĉo', spektis dum kelkaj minutoj, kaj tiam elŝaltis, malfeliĉa. La spektado-ciferoj draste falas.

* Edward Snowden – kiuj estas liaj apogantoj?

Mi opinias, ke multaj homoj kiuj kapablas elflari la novaĵojn sentas, ke estas io tre stranga pri la afero Edward Snowden. Richard Cottrell estas eksa ĵurnalisto kaj Eŭropa Parlamentano, kaj li kontribuis artikolon en 'End the Lie' [Ĉesigu la Mensogon] titolitan 'Edward Snowden's Flying Circus: Quite the maddest show on Earth' [La Fluganta Cirko de Edward Snowden: Entute la plej freneza spektaklo surtere] (<http://endthelie.com/2013/06/24/edward-snowdens-flying-circus-quite-the-maddest-show-on-earth/#axzz2XCpFNuEi>). Li skribis: "Ni spektas eble la plej lerte elpensitan psikologian kaŝkaptan operacion kiu ĝis nun aperis el la granda halo de iluzioj konata kiel la sekurec-ŝtato". Pli-malpli la tuto de la informoj diskonigitaj de Snowden jam estas en la publika sfero. "Se mi pravas, kaj la Fluganta Cirko de Snowden estas nenio pli ol lerta ŝarado, do kio estas ĝia celo?", li demandas. Li diras, ke liaj instinktoj diras al li, ke tiu ĉi estas antaŭprovo, por vidi kion eblas al ili kredigi al la publiko.

Du-tri tagojn post tio, Washington Post publikigis raporton pri io el la lastatempa historio de Snowden, sub titolo 'Snowden voĉis malestimon por likantoj en ĵuspublikigitaj babil-arĥivoj el 2009' (http://www.washingtonpost.com/world/national-security/snowden-voiced-contempt-for-leakers-in-newly-disclosed-chat-logs-from-2009/2013/06/26/e88f7412-de8e-11e2-963a-72d740e88c12_print.html). Al mi ĝi tekstas kvazaŭ li ne vere subite konvertiĝis, sed rolis duoblan vivon.

En plua artikolo, 'Edward Snowden: la Manĉuria Kandidato [cerbolavita agento – aludo al filmo]'

Richard Cottrell atentigas, ke Snowden fakte ne estas subkontraktato de NSA [Nacia Sekurec-Agentejo], sed ke li laboras por kompanio Booz Allen Hamilton, kiu estas "butikofasado por CIA, ne NSA". Plue, "neniuj el la 'sekretoj' kiujn li malkaŝis estas eĉ svage sekretaj". Do kio estas la alternativaj klarigoj? Ĉu la fluganta cirko esti grandioza konfid-truko fare de CIA? Ĉu ĝi povus esti parto de iu interna milito ene de la usona reĝimo? Ŝajnas al mi, ke la faktoj ĝis nun konataj povus esti klarigitaj se malantaŭ ĉio estus Rusio. La efiko de tiu ĉi fluganta cirko estis alporti informojn jam en la publika regno sed konatajn al malmultaj en la tradiciaj amaskomunikiloj. Ĝuste tion strebis fari Russia Today en Britio kaj Usono dum la pasintaj kelkaj jaroj. Iu ajn deca politika ĵurnalisto scias, ke estas aferoj kiujn li ne povas dismeti pere de la tradiciaj amaskomunikiloj, ĉar li ne povus puŝi tion preter sian redaktoron. Sed se la novaĵo estas tiom granda, ke ĝi ĉiuokaze eliros, tiukaze la redaktoro devas kuniri. La Establaĵo povas reagi nur per ŝok-hororo pri ĉiuj tiuj malkaŝoj, kvazaŭ ili neniel imagis, ke tiaj aferoj povus okazi.

Kiam Julian Assange trafis la ĉefliniojn per Wikileaks, multaj el ni sentis, ke la tuta afero ŝajnis tro bone organizita por esti nura manpleno da teknomaniuloj. Multaj alvenis al la konkludo, ke Wikileaks estis operacio de CIA aŭ Mossad. Mi fine venis al la ideo, ke Wikileaks povus esti apogata de Rusio. Do kiam oni donis al Julian Assange lian propran televidoprezenton en Russia Today, mi akceptis tiun vidpunkton. La spionservoj de Rusio devas esti multe pli bonaj ol estas niaj en la veromovado. Se ili opinius, ke la operacio estas apogata de CIA, ĉu ili estus tiel kunlaborintaj kun ĝi? Se tio ja estas la klarigo, bonŝancon al ili. Rusio batalas kontraŭ evidentan strategion de ĉirkaŭado, same kiel faris Germanio antaŭ cent jaroj.

Kiu ajn el tiuj interpretoj ĝustas, se efektive unu el ili ĝustas, mi povas kompreni kial Prezidento Obama diris la 27an de junio, ke li ne okupiĝos pri marĉandado por persvadi eksterlandajn registarojn resendi Snowden al Usono (<http://www.theguardian.com/world/2013/jun/27/obama-edward-snowden-wheeling-dealing>). Sed ili aliras la aferon tre malsame rilate al Bradley Manning. Mi supozas, ke tio estas, ĉar li agis kiel individuo kun konscienco, kaj kun nenia superpotenca apogo. Ili povas tirani lin.

* La Unua Mondmilito: tempo por kontemplado

Post tio ni povos antaŭĝui la venontjaran jarcentan datrevenon de la eksplodo de la Unua Mond-Milito. La tradiciaj amaskomunikiloj nun ekparolas pri tio, sed mi aŭdis, ke ili ne deziras tro paroli pri la kaŭzo de la Unua Mond-Milito pro timo "embarasi la germanojn". Mi neniam komprenis la kaŭzon de la Unua Mond-Milito. La afero neniam havis por mi sencon. Finfine, antaŭ kelkaj semajnoj, mi renkontis iun kiu ja komprenis, kaj kiu jam verkis klarigon pri tio en 2011. Estis – mi devintus diventi – mia kunorganizanto de la grupo Keep Talking, scienca historiisto Nick Kollerstrom. Li nomis sian artikolon 'Pri la evitebleco de la Unua Mond-Milito', kaj ĝi ne provizas komfortan legaĵon se vi estas brito

(http://inconvenienthistory.com/archive/2011/volume_3/number_4/on_the_avoidability_of_world_war_one.php). Ŝajnas, laŭ la vortoj de filozofo Rudolf Steiner, ke "malantaŭ tiuj, kiuj estis iamaniere marionetoj, estis en Anglio potenca kaj influhava grupo da homoj kiuj persiste puŝis aferojn en la direkton de milito kontraŭ Germanio, kaj per kiuj estis pavumita la vojo por la mondmilito kiu ĉiam estis prognozita". El mia legado de la libroj de profesoro Carroll Quigley, ŝajnas, ke tiu grupo devus esti la sekreta societo starigita de Cecil Rhodes en 1891, kaj kiu, okaze de lia morto, estis transprenita de Lordo Milner. Kaiser Wilhelm, okaze de la ekmilitado, priskribis la manipuladon kiel

"grandioza atingo, kiun devas admiri eĉ tiuj por kiuj ĝi signifas katastrofon".

Post kiam mi verkis la supran alineon, mi ekprenis en kafejo ekzempleron de The Mail On Sunday, okaze de la 99a datreveno de la milit-eksplodo, kaj trafis artikolon de Simon Heffer, en kiu li agnoskis, "... ne necesis, ke ĝi okazu" (<http://www.dailymail.co.uk/debate/article-2384269/Honour-dead-yes--dont-celebrate-futile-conflict-blights-day-On-99th-anniversary-Great-War-brilliant-historians-provocative-view.html>). Li aludis al antaŭnelonge eldonita libro 'The Sleepwalkers: How Europe Went to War in 1914' [La Somnambuloj: Kiel Eŭropo ekmilitis en 1914] de kembriĝa historiisto Christopher Clark. Tamen recenzo en History Today [Historio Hodiaŭ] asertas, "La rakontado de Clark forvelkas fine de julio 1914, ĝuste kiam ĝi devus esti atinganta sian klimakson" (<http://www.historytoday.com/blog/2012/11/sleepwalkers-how-europe-went-war-1914>). La recenzanto, Sean McMeekin, ĵus publikigis propran libron: 'July 1914: Countdown to War' [Julio 1914: Retronombrado ĝis militado]. Laŭ la libroprikskribo, la ĉefaj kulpuloj estis malgranda grupo da ŝtatestoj, en Rusio kaj Francio (<http://www.amazon.com/July-1914-Countdown-Sean-McMeekin/dp/0465031455>). Ne ĝeniĝu; Simon Heffer informas nin, ke kultur-ministro Maria Miller varbis taĉmentojn da historiistoj por helpi al ŝi festi la eventon, tiel ke ĉio fine estos en bona ordo.

* Retaksante la antaŭmilitajn jarojn

Mi ĵus prezentis serion da kvar prelegoj ĉe kastelo en la Valo Loire pri la 'English-speaking idea' [anglaparola ideo] de Cecil Rhodes kaj ĝia rilato kun la Esperanta ideo. Komence estis entirita la eminenta ĵurnalisto kaj kampanjanto por socia justeco William T Stead, sub la kompreno, ke la celo estas alporti ideojn de demokrateco kaj civilizo al la Imperio. Stead jam proponadis, ke la Imperio fariĝu federacio de memregantaj ŝtatoj, sed kiam li konstatis, ke la motivo de Rhodes ŝajnis rilati al la vastigo de la Imperio per instigo de pluaj militoj li kontraŭis, kaj estis marĝenigita. Li fariĝis la ĉefa voĉo de la opozicio al la Brita-Afrikansa Milito, kaj sendube estus la ĉefa voĉo de opozicio al la Granda Milito se li ne estus mortinta en Titanic.

Dum mi laboradis por tiuj paroladoj, Michael Portillo, kiu estis la ministro de defendo sub Margaret Thatcher, sed kiu – saĝe laŭ mi – forlasis la politikon, kaj fariĝis komentariisto de BBC, estis prezentanta serion da mallongaj paroladoj en BBC Radio 4 pri '1913: La Jaro Antaŭe'. Li citis historiiston, kiu diris, ke eble la jarcenta datreveno de la eko de la Unua Mond-Milito devus doni eblecon por reelpensi la historion de tiu periodo. En la sesa epizodo, Michael Portillo parolas pri la laborista maltrankvilo de tiu periodo (<http://www.bbc.co.uk/podcasts/series/r41913/all>). Estis parolo pri revolucio, kaj en Irlando estis parolo pri sendependeco. Dum mi tion aŭdis, mi estis kunmetanta la parton de miaj paroladoj pri William Stead, kaj do mi rekontrolis, por vidi, ĉu la Granda Maltrankvilo influus mian komprenon de lia rolo. Unu afero kiu dumlonge mistifikis min estis la tri akcidentoj kiujn suferis Olympic, antaŭ la subakviĝo de Titanic. Ĉu ĉio povus esti atribuita al nekompetenteco de la bon-sperta Kapitano Smith, kiu daŭrigis por kapitani Titanic? Estas nuntempe multe da esplorado kiu sugestas, ke la ŝipo kiu subakviĝis fakte ne estis Titanic, sed Olympic. Olympic estis kriplita en akcidento ĉe Southampton, sed tribunalo registris, ke kulpis la kapitano de Olympic. La teorio estas, ke la ŝipoj estis interŝanĝitaj, por havigi asekurmonon. Sed kial okazis tiuj tri akcidentoj ĉiukaze?

Ŝajnas, ke neniu konsideris sabotadon. Sed kial iu ajn dezirus saboti Olympic? Kiam mi esploris pri la Granda Maltrankvilo, mi konstatis, ke Irlando estas sur la sojlo de sendependiĝo. La katolikoj estis por, kaj la protestantoj (kaj en la irlanda kunteksto tio signifas kristanoj kiuj ne estas rom-katolikoj)

estis kontraŭ. Tamen la prezidanto de la ŝipkonstruejo Harland and Wolff, William Pirrie, protestanto, deklaris sian subtenon por irlanda sendependeco (<http://www.historyireland.com/20th-century-contemporary-history/william-pirrie-the-titanic-and-home-rule/>). Supozeble li timis perdi sian ŝipkonstruejon se li sensukcese kontraŭus sendependecon. Do kio estus la pozicio de la interna rondo de Rhodes-Milner? Se ili en tiu stadio planadis militon kontraŭ Germanion, ili estus farantaj ĉion eblan por teni Harland and Wolff en britaj manoj, kaj tio signifus kontraŭi irlandan sendependecon. Kiel ili persvadas Lordon Pirrie ŝanĝi sian opinion? Mi supozas, ke ili uzus siajn normalajn metodojn de miskredigo kaj implica minacado. William Pirrie ja ŝanĝis sian opinion, kaj Harland and Wolff faris gravan kontribuon al la brita militstrebo. Pirrie fariĝis en 1921 Vic-Grafo.

* La vero pri la Unua Mondmilito povus konduki al la vero pri 9-11

Tiu ideo povus esti ĝusta aŭ malĝusta, sed ĝi estas la sola kohera klarigo kiun mi konas, kiu klarigus tiujn eventojn. Eble la ŝlosilo al disvastigo de la vero pri 9-11 povus esti instigi retaksadon de la periodo antaŭ la Unua Mond-Milito en la tradiciaj amaskomunikiloj. Estas multe pli facile konfesi tiujn aferojn kiam ili estas en la historio ol kiam la eventualaj militkrimuloj estas tago-al-tage vidataj, montrantaj sian grandiozan ĉarmon en la televido.

Mi trovas, ke estas multe pli facile nuntempe paroli kun homoj pri tiuj aferoj ol antaŭ kvin jaroj. Ĉiu scias, ke estas io malĝusta. Iuj aferoj kiuj antaŭ kvin jaroj estis nekredeblaj aŭ nepenseblaj nun ŝajnas esti aŭ ĝenerale akceptitaj aŭ facile kompreneblaj. Mi multe strebis por pretigi miajn paroladojn por Greziljono, kaj tio estas la kialo, ke malfruas tiu ĉi novaĵletero, sed ja valoris. Doni historian kuntekston povas pensebligi la nepenseblon, kaj kredebligi la nekredeblon. Foje eĉ vero-aktivistoj gapas pro la mensogoj kiujn oni diras al ni. Nuntempe estas tiom da tiaj aferoj, ke mi povus ĉiutage produkti ĉi-tian novaĵleteron se mi povus sufiĉe rapide labori. Espereble, per prilumo de tempo al tempo de kohera aro da kernaj temoj mi povas, kun aliaj, kuraĝigi al homoj mem rimarki la mensogojn. Ĉu ĉiuj el tiu homoj intervjuataj lige kun la nuna fluo de trolado en la brita gazetaro, akuzante siajn trolantojn pri 'mizogeneco', aspektas aŭtentaj, aŭ ĉu ili aspektas kiel aktoroj? Ĉu la ŝtato preparas nin por interreta cenzurado? Ĉu 'mizogeneco' estas MI6-vorto, kiaj ŝajnas esti 'paranoja' kaj 'konspirteorio'?

Mi lasos vin kun tiuj pensoj, tiel ke vi povos eliri en la mondon kaj daŭrigi la paroladon.

* 'La Teorio kaj Praktiko de Oligarĥia Kolektivismo'

Mi jam atingis elĉerpaĵojn el 'LA TEORIO KAJ PRAKTIKO DE OLIGARĥIA KOLEKTIVISMO' de Emmanuel Goldstein. Same kiel Winston Smith, mi eklegis: "Ĉapitro 1: Nescio estas Forto". Ĝi klarigis, ke tra registrita tempo estis tri specoj de homoj: la Altaj, la Mezaj kaj la Malaltaj. Mi jam kaptis la ideon, ke la Malaltaj estas nesciaj pro nescio, kaj la Altaj estas nesciaj pro memdecido. Sed kion pensi pri la Mezaj? Ĉu tiuj voĉoj kiuj elvenas la tele-ekranon vere povus esti parolantaj laŭ nescio? Ĉu estis nescio pro nescio, aŭ ĉu estis nescio pro memdecido? Mi atente rigardis por movetiĝoj de la okuloj, kaj aliaj signoj de 'vizaĝkrimo'.

Tiam, same kiel Winston Smith, mi transsaltis al "Ĉapitro 3: Milito estas Paco". Ĝi tekstis: "La dispartigo de la mondo en tri grandajn superŝtatojn estis evento kiu povis esti kaj efektive ja estis antaŭvidita antaŭ la mezo de la dudeka jarcento. Pro la ensorbiĝo de Eŭrope fare de Rusio kaj de la Brita Imperio fare de Usono, du el la tri ekzistantaj potencoj, Eŭrazio kaj Oceanio, jam en la praktiko

ekzistis. La tria, Orientazio, aperis kiel sendependa unuaĵo nur post plia jardeko da konfuzita batalado". Verdire, la konfuzita batalado okazas en la sud-okcidento de Azio. La armeo de Oceanio, NATO, efektive regas multon el sud-okcidenta Azio pere de marionetaj registaroj, kaj la bankoj de Oceanio, apogataj de la dinastio Rothschild, efektive regas okcidentan Eŭrazion – la Eŭropan Union. Orienta Eŭrazio – Rusio – nun rezistas la pluan vastiĝon de NATO, kaj jam desegnis linion en la sablo en Sirio.

Mi plulegis: "Kombinite unuforme aŭ alie, tiuj tri superŝtatoj estas por ĉiam militantaj inter si ... Sed fizike la militado ampleksas tre malgrandajn nombrojn da homoj, plejparte multtrejnitajn specialistojn, kaj estigas relative malmulte da viktimoj. La batalado, kiam ĝi ja estiĝas, okazas ĉe la svagaj landlimoj kies pozicion povas nur malklare diveni la averaĝa homo ... Por kompreni la naturon de la aktuala milito — ĉar malgraŭ la regrupiĝado kiu okazas je kelkjaraj intervaloj, ĉiam temas pri unusama milito — oni devas unue kompreni ke ĝi malpovas fariĝi finita. Neniu el la tri superŝtatoj povus esti definitive konkerita eĉ de kombinaĵo de la aliaj du".

Emmanuel Goldstein plue klarigis, ke la ĉefa celo de la moderna militado (Konforme al la principoj de duoblapenso, tiun celon samtempe agnoskas kaj malagnoskas la direktantaj cerboj de la Interna Partio) estas eluzi la produktaĵojn de la maŝino sen plialtigi la ĝeneralan vivnivelon. "Ekde la fino de la deknaŭa jarcento", li skribis, "ekzistas latentaj problemoj en la industriigita socio, pri kion fari per la surpluso da konsumvaroj. ... En la frua dudeka jarcento, la antaŭvido al estonta socio nekredeble riĉa, ripozoplena, orda, kaj multefika ... estis parto de la konscio de preskaŭ ĉiu legipova homo. ... Tio ne okazis ...".

Mi memoras la parolon pri estonta socio ripozoplena tiom malfrue kiel la 1960aj jaroj, kiam mi estis studento – kaj Emmanuel Goldstein estus samaĝa. Mi scivolis, kio okazis al tio. Nun mi povas iom pli bone kompreni la plimulton de la ĵurnalistoj de la tradiciaj amaskomunikiloj, kiuj verŝajne ne estas membroj de IngSoc, sed kiuj ja suferas de duobla pensado. Se vi volas esti pli ĝisdata pri Sirio ol vi estus pere de la tradiciaj amaskomunikiloj, mi sugestas, ke vi legu, aŭ relegu 'Mil Naŭcent Okdek Kvar' de George Orwell, kaj aparte liajn elĉerpaĵojn el 'La Libro' de Emmanuel Goldstein (https://eo.wikipedia.org/wiki/1984_%28romano%29) (https://en.wikipedia.org/wiki/Nineteen_Eighty-Four)

Salutas **Ian**
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth

<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

Beletraĵoj

Ŝercaĵoj



Humoraĵo el Brazilo



Humoraĵoj el Brazilo

Anekdotoj

La instruistino kaj Ben

- Cxu vi scias kiui estas la prezidento de USONO?
- Bedaŭrinde, ne!
- Vi devas atenti pri la lecionoj, Ben.
- Cxu vi scias kiu estas Ana?
- Ne!

- Ankaŭ vi devas pli pri via edzo!

George Bush en la lernejo

- Salton geknaboj, vi povas demandi min pri io ajn.
- Bone,- diras Bob- mi havas tri demandojn: Kiel eblas ke vi venkis la balotojn kvankam akiris malpli da voxdonojn? Cxu vi opinias ke la lancxo de la atombombo en Hiroshima estas la plej granda terorisma ago enmonde? Kial vi atakis Irak-on sen ia ajn motivo?

Cximomente sonoris la tintilo kaj la gelernantoj eliris esketeren.

Post la paŭo, parolis Tom. Mi havas kvin demandojn: Kiel eblas ke vi venkis la balotojn kvankam akiris malpli da voxdonojn? Cxu vi opinias ke la lancxo de la atombombo en Hiroshima estas la plej granda terorisma ago enmonde? Kial hodiaŭ la tintilo sonoris 30 minutojn pli frue? Kie estas Bob?

- La parolado de Hxrushev

Nikita Hrxusev, eksa unua sekretario de la Sovetia Kompartio paroladis pri la krimoj de Stalin. Iu demandis:

- Kial vi ne kritikis Stalin-on siatempe?
- Kiu parolis- demandis Hxrushev.
-
- Nun mi kredas ke vi scias la respondon!

- **Brazila ekspozicio de gravuraĵoj en Tirana**


- Je temo “Tempo kaj Memoro”
- Septembro 2013
- Aŭtoroj: Airton Cardim, Alessandro Lima, Alexandre Camanho, Antonio Oba, Eduardo Belga, Fabiola Notari, Julia Goeldi, Julio Lapagesse, Rachel Vallego, Rafael pagatini, Tatiana Bond,
- Fotis: Bardhyl Selimi







Visar Zhiti⁶



Fragmento el la libro "La Inferaj vojoj"

OMSCA-1 2012

La liberigo de Edmond Sejko

- Nu, ĉu oni liberigis Edmond-on?
- Tie ni lasis, li atendis..

Alvenis la tago por li. Atendis li ĉe la korto malsupre. Sed oni estis malfruiĝintaj por voki lin. Kutime la liberigoj okazis tre rapide, preskaŭ kaŝe, dum momento. Post la matenmanĝo, iamfoje eĉ antaŭ la apelo. Sed oni ne estis vokante Edmondon supren. Kaj ne nur li estis maltrankvila. La enprizonuloj

⁶ Albana verkisto, eksa politika prizonulo, dum aprilo-septembro 2013 ministro de kulturo

transe, elirinte el la depono aŭ alveninte el iu laboro ekster la dornodratoj, demandis: nu, ĉu oni vokis Edmond-on? Ne, ankoraŭ...Kial?

Edmond Sejko daŭrigis iradi tien ĉi tien sola, per mallongaj paŝoj, nervozaj, sed li mem ne ŝajnis nervoza...Kiel bona junulo, diradis ĉiuj, min mem li estis ege kuraĝiginta, aparte kiam oni igis min ministron kaj mi ne povis elteni la martelegon, ties tremadon kaj la polvon eliĝinta el la roko kaj kovrinta min tutan. "...aliaj intelektuloj, kiuj ne konis la fizikan laboron, la prizonon, ne surgenuiĝis, - diris al mi.- Ili venis el la libroj rekte ĉi tie kaj staris kvazaŭ sur la libroj. Ilin vi memoru." Ankaŭ mem Edmond tiel estis, kvazaŭ sur la libroj, nerompebla. Post la laboro, li klopodis ellerni iom da franca, poste la talan, la anglan. Li ridetis kiam mi vokis iamfoje lin Edmond Dantes, la personaĝo de "la Grafo de Monte Kristo". Fakte mi kaŝe bonaŭguris lin, ties sorton, eliron el la prizono, la venĝon, la riĉecon...

Sed oni ne estis liberigante lin. Li trapasis longajn jarojn en la prizono. Danke al amnestio, ion profitis, sed ankaŭ per sia laboro. Sufiĉis rekondamno kaj ĉio perdiĝis. Ĉu oni intencis lin rearesti? Pasis du horoj, tri, kvar...Trojĝis, oni ne estis vokante lin. Ni ne povis diris al li ion. Ni sentiĝis malbone. Okazu kiel oni volas, respondis li, dum ni ekbruligis cigaredon kun li laŭ la rito de la liberigo. Per kio konsoli ni lin?

Li estis filo de iu mortpafito de Kompartio, kiu, kvankam ĉamo⁷, estis akuzita kiel greka agento. Li portis altan gradon en la militista ŝiparo. Teme Sejko necesis al la Kompartio kiel agenton de imperiismo, en kaŝrilatoj kun grekoj, kaj oni trompis lin, komisiis ĉi tiun kontraŭtaskon, oni diradis en la prizono, ĝis kiam venigis lin antaŭ la mortpafa plotono.

Tiel oni intencis agi ankaŭ kun la alia ties filo, kiun oni same mortpafis, sed ĉi lasta kuraĝe kontraŭis, vi estas krimuloj, murdistoj, deklaris li en la malfermita juĝproceso, okazinta en la urba kinejteatro. Jes, jes, tio veras. Li estis laborinta en la tekstilkombinato "Maŭ Ze Dong". Kiam Ĉinio perfidis, oni demetis tiun nomon al la kombinato, sed la perfiduloj estas ĉi tiuj, vi! Mallaŭtvoĉu, ci, ne parolu...

La fraton de Edmond oni akuzis...sabotaĝulon, kvazaŭ li intencis bruligi la departementon kie li laboris, aŭ la tutan kombinaton, uzinojn, la urbon de Berat...Kune kun iu junulino...Ne, neniam, sed oni bezonis denove malamikojn. La heredintojn de la malamikoj. Lin oni havis preta. Des pli, li estis brava, do danĝera, ĉamo, signifanta suspektinda por ili...Oni mortkondamnis lin, per mortpafigo. Kaj aplaudis la homoj en la kinejteatro. La lastan parolon, diris al li antaŭ la mortpafo. Tio estus via fino!- kriis li. Sed kie lin enterigis, kie? Oni ne scias.

Edmond sopiris. Mi sentis la pasion de la sopiro, tiel kiel ĝi ankaŭ min bruligis en la vizaĝo.

Sur la grundo kie stariĝis tiu kombinato, sen la nomo "Maŭ Ze Dong" nun, kiam ĝi estis malbona nekultivita tero kaj falis la ombro de la praa kastelo, ankaŭ Skanderbeg estis malvenkita ĉi tie, diris mia patro...-mi volis rakonti, sed pli bone ke mi ne parolu...- sub tiuj fundamentoj oni enterigis la kadavron de mia onklo, mortigita dum la esplorenketado, sen juĝproceso, kovris ĝin per koto, kaŝe. Kial do? Estis li nacionalisto, kontraŭulo...Tiel oni susuradis en la sino de la mia parencaro.

Kaj, kiam en la televiziaj kronikaĵoj oni donis iun reportaĝon el la tekstilkombinato, propagandis produktojn kaj vidigis drapojn kaj tolojn fluantaj kaj fluantaj, al mi ili ŝajnis kiel kadavroj, kvazaŭ ili elvolviĝis kaj la turbano ne finiĝis. Malhelaj ŝtofoj por mortpafitulaj kostumoj. Ne, estas kostumoj por novedzoj. Kun la sama tiu kostumo la albanoj mortas, ilin enterigas kun ĝi. Sed ne la mortpafituloj...

⁷ Albano el regiono albana Ĉamerio norde de Grekio

Nu, kiel povus iri la aferoj akurate al nia industrio! Fabrikaj starigitaj sur la krimo...nur la kulpan industrian disvolvis ĉi tiuj...Kaj la puno trafus ilin kaj la ties homojn...Trafus ilin la malbena, nepre., Malbone ili finiĝus. Oni atakos la fabrikojn iutage. Memoru tion, ruinigos ilin, rompos la maŝinaron, elŝiros, trenos ilin per ĉevaloj kaj vendos kiel feraĵojn, memoru tion. Mi antaŭsentas tion. Ĉar...

Ĉe Edmond, tremis la manoj kaj la lipoj.

- Jen la foto de mia patrino,- ripetiĝis lia voĉo enlarne. Juna virino, bela, gaja. Iam...- Ŝi sin ĵetis el la fenestro ĝuste tagmeze. Ĝuste meze de la urbo. Ŝi ne povis elteni la alian mortigon, de... Mi vidis ŝin kiam oni kovris per blanka littuko, kiu sangumiĝis.- Kvazaŭ estis burĝonitaj rozoj rapide rapide,- mi murmuris,-- kiujn mi ne sukcesis doni.

Desegnaĵo por la drapoj de la kombinato, nu, faru, pentristo. Kion mi dirus, ĉu mi krii? Ankaŭ mi estis tremanta.

Edmond-on prenis la geavoj, kie ili vivis mem, en tiu urbeto kun la terura nomo: Stalin. Ĉu ankaŭ niaj lokoj portas niajn nomojn, ĉu? Kreskiĝis Edmond, fariĝis fascina, sed ĉagrenita. Silenta, sed plene de boneco. Kaj oni varbis lin soldaton, en taĉmento kie oni ne portis eĉ lignan fusilon, kiel ekzerciĝis kvazaŭ iamfoje ili kun malbona biografio. Laboris en la kanaloj kaj elĉerpis terpomojn. Rakontis mia frato, Shpëtim, li estis soldato en la sama taĉmento kun li.

Oni atendis ĝis kiam li kreskiĝu kaj arestis lin. Edmond venis en la prizono kun la soldata vesto. Poste la geavoj kadukiĝis kaj ne plu venis en la prizono. Sendis ili pakaĵojn, el siaj ŝparaĵoj...Eble oni membris kiel Grekio bruligis Ĉamerion kun ĉiuj ĉamoj, diris mi al Edmond, sed jen pli malbona rezulto la Viaj, ol la fremduloj...

Li rigardis min rimarkeble. Scipovis li kredi. Ankaŭ ne kredi. Ĉu oni liberigus lin nun? Li kvitiĝis kun la puno, eĉ transpasis la limdaton. Estas troe kondamnita...

Pasis la antaŭtagmezo. En la laboro, subtere, oni babilis pri li. Tie, en la korto ni lasis lin...Atendis apud sia sako (...plene de prizoniĝo...). Rondiradis. Ŝajne kvietaj. Ĉiuj, tutan vivon, rondirados tiun sakon. Ĝia gorĝo estas ligita ankaŭ per nia piedo per fulma fadeno...Lasu ĉi la poeziaĵojn.

Kiomfoje okazis rearestoj ĝuste la tagon de la liberigo de multaj enprizoniguloj. Oni malfermis la ĝiĉeton de la pordo de la ĉelo kaj dirante nenion, etendis paperpecon. Ne tiun de la aresto, sed la decidon de la juĝejo sen juĝproceso. Ankoraŭ dek pliajn jaroj en la prizono pro agitacio kaj propagando kontraŭ la Kompartio kaj la ŝtato. Kie? En la prizono...

Kiam la dua laborturno supreniris al la minejo, oni demandis unu la alian:

- Nu, ĉu oni vokis supren Edmond-on?
- Jes.
- Por liberigi aŭ...?
- Tutsame estas, kaj la kondamno kaj la liberigo de ĉi tiuj. Kiel la neĝo...kiel tiu zumado...
- Kion vi havas kun la neĝo, ĝi estas pura, blanka, ne komunisma, nek faŝisma, venas el la ĉielo.

Tradukis **Bardhyl Selimi**, septembro 2013

La "93" de Inĝ. Ismail Farka

- Oni prenis inĝ. Farka-n.
- Kiu?
- Ĉi tiuj de la komandejo, kiu alia? Du policistoj...
- Kien oni kondukis lin?
- Kiel mi sciu? Oni arestis lin.
- Denove?!- mi rigidiĝis. Kaj bedaŭris. Kiel ni povus resti sen li.- Kial?- demandis mi konfuzita, sed ankaŭ timigita.- Ĉu li ektimis kiam oni enkatenis?
- Ne. Li eĉ mokis ilin. Kial vi arestas min tiel sen multe da solemneco?- estis li dirinta.- Ne tiel, tio ne konsideriĝas...
- Kion li estis farinta? Ĉu li laboris en la aŭtoriparejo?
- Oni diras ke li estas deklarinta ke ĉi tiu lando saviĝos de Sovetunio.
- Kie li diris tion?
- Nenie. Atestis pri tio du ordinaraj enprizonuloj kiujn li ne konas persone. Sed oni sciis, Farka estis kontraŭsovetia.

...Ne konas ilin?...Kio tio gravas, lin konas ĉiuj kaj tio sufiĉis. La interparoloj kun li estis venantaj impete en mia kapo, mi estis sentanta ilin kiel fizikajn frapojn, kiel vekigojn. Li kuraĝis kaj mokis ne pompe, eĉ simple rakontis, ĉar la mokeco estis mem en la ties rakonto, li ne elektis envane ...Mi ne kredas, estas falsa fundamento.- Mi memoris kiam li diradis tion en la minejo, sed ne, la aktualeco, la socialismo estis sen fundamnetoj.- Oni sendis nin por studado en Sovetunio, ĉar ankoraŭ mankis ĉi tie la universitatoj, mi estis deksepjara kaj duono,- akcentigis li tion" duono" kvazaŭ volis diri duonulon.- 93 personoj enŝipiĝis, konis unu la alian, estis urbanoj de Tirana. Oni vokis la nomojn kaj mi demandis min: ĉu rezultiĝas io el ĉi tiu? Ĉu fariĝos io? Mi dubis. Nek la alia, ne, tiel rezultiĝis al mi, nur al tri personoj mi fidis. Oni estis elektintajn nin kun bona biografio, el komunistaj familioj kaj tiom. El tiuj 90, parto progresis ĝis alte, ĝis la Politikburoo, kelkiu iris malsupren, la plimulto akiris titolojn ProfDrrr, DrrrProf, ĉar estis kopiintaj iun lernolibron, nenion apartan, nenia malkovro aŭ solvo, aŭ inventaĵo, ne, ne, ne menciu tion, jen ĉi tiuj kreus la futuron, niaj marksistoj. Kaj eĉ ili ne kuraĝas dubi ke Marks, post kiam foriĝis de ekonomio kaj proksimiĝis al socializado, produktis kistojn, nevaloraĵojn, pensu vi kiel ili krevas en la epoko de globalizado. Kaj Lenin nur pligrandigis tiujn kistojn.- Nu, ili estas sangaj kistoj,- interrompis mi,- grandaj kiom la ŝtatoj, kiom la ties aero...- Poetaj aferoj tiuj komparoj,- aldonis serioze Farka.

Kaj nun, kiam oni estis arestinta, li viziĝis kiel Sokrato, kun la peza kapo, sen regula hararo, kiel planedo. Mi timas ke oni venenigos lin...

Tradukis **Bardhyl Selimi**, septembro 2013

Ismail Kadare

La Palaco de la songoj

(Baldaŭ aperos)

...La miaj parencoj estis ĵus alportintaj ĝin al mi. “La Oficisto de la Palaco de la Songoj”..., nova eldono, aldonita. Ĝi ne troviĝis en la kolekto “La Malvarmsangeco”....

Tirana kaŝita ne nur post la kadareca⁸ pluvo, sed ankaŭ ŝovita transe en la imperio, ne tiu komunista, sed otomana, la samaj ili estis, pli malbona tiu la unua por mi. Jen, la Centra Komitato de la Partio de la Laboro, la Palaco de la Songoj en la romano. Vi ne konscias, eldirus la amikoj, vi legas Kadare-n kiel vin tio plaĉas. Trafos denove malfeliĉo al vi. Ne gravas, respondus mi. Sed, aŭskultu, la songoj de la civitanoj de la tuta lando, rakontitaj de ili mem, denuncitaj, kolektitaj per diversaj manieroj, enmaniĝis en la Palaco. Surbaze de la ties komentoj, faritaj de spertuloj, la ĉefo de la ŝtato, la Sultano, Enver Hoxha⁹ por mi, tiel mi volas legi ĝin- kion vi havas?- decidis kion li farus, masbuĉadon, malkovris malamikajn grupojn, verajn kaj falsajn, kondamnis peze kion li povis. Surbaze de la songo de iu vilaĝano, profunde trans la montoj en Kukës, tiel ŝajnis al mi, inter la songoj kiujn eĉ la ĉevalo ne akceptis porti, tiom fiaj ili ja estis, kc..kc..oni difinis la politikon de la ŝtato, la interrilatojn kun la aliaj ŝtatoj, malfermiĝon aŭ enfermiĝon. Murdado de rapsodoj, artistoj. Grizaj kupoloj, bunkroj, diplomatoj, la Veziro, la ties polico, nomumadoj, malnomumadoj, promovigoj en la kariero, nigraj registaraj veturiloj, ah ne, fiakroj, trotadis sur la piedirejoj kaj ŝajnis kvazaŭ ili rompadis ostojn. Ankaŭ la miajn. La alveno de la printempo. Ĉi tiun titolon portas la lasta ĉapitro. Kion anoncas ĉi tiu sciigo? Printemposojlo, ĉu Praga printempo? Ni estis aŭdintaj. Ĉu la vetero plivarmiĝis?

Ankoraŭ neĝo supre de la montoj. Malvarme en la ĉambroj, en la kruroj.

Kiel tio rare okazis ĉe mi, nur kun la bonaj libroj, dum mi legis, mi sukcesis aŭdi la voĉon de la aŭtoro, mistere, dispecigita tra la personaĝoj. Por mi tio sufiĉis, estis ia indikilo. Mi ne scias kiel okazis ĉe mi, sed jam infano, kiam mia frato, pli aĝa ol mi, laŭtvoĉe legis por mi Ŝekspiro-on., “Hamlet-on”, mi sentiĝis akurate ke li ne kaplevis de la malnova libro, ĉar tiel li ekvidus miajn larmojn, kaj mi forirus por ke ne plu aŭskultu. Poste li prenis “Makbet-on” el la patra biblioteko, kie nur malmulte da libroj plurestis. Tio ne plaĉis al mi, tiom kiom la “Hamlet-o”, des pli ke li legis ĝin same en la nia ĝardeno kaj finis samtiel, kiam krepuskiĝis. Ah, ne, Makbet-o estis fia, li murdis en sia hejmo, min malesperigis, ne devus...ankaŭ en la hejmo de Hamlet estis murdoj, sed li estis junulo, venĝanta por sia patro. La fantomo ĉe “Hamlet-o” eliris jam en la komenco kaj parolis. Tiel, kiam mi daŭrigis mem plulegi, mi aŭdis la librovoĉon, la libro posedas voĉon, sed en la granda beletro. Mi pensis ke tiel estis okazinta ankaŭ al la aliaj...kun Golsuorto, Tolstojo...Ĉe Remark estis ankaŭ pluvo. La miraklo estis, ĉar ŝajnis al mi kvazaŭ la aŭtoro legis sian libron per voĉo, poste mi sukcesis kompreni ke estis aŭdante nur mi. Neniam vidinte kaj sciinte kiel li parolis, mi aŭdis Mitrush Kutel-on. Kun la poeziaĵoj tio okazis pli ofte. Mi jam sciis kiel parolis Naim, Esenin, Uitman, Lorka, Eluar, De Rada. Aŭskultu Fishta-n¹⁰, diris min la patro, estis li malpermesita. Mi estis alkutimiĝinta per la

⁸ Ismail Kadare, elstara nuntempa albana verkisto

⁹ Albana komunista diktatoro 1944-1985

¹⁰ Naim, De Rada, Fishta elstaraj albanaj verkistoj el XIX kaj XX jc.

voĉo de la verkoj de Kadare kaj atendis senpacience, kie ajn. Marmora malvarmeco, monumenteca. La homo malfortiĝas kaj la ŝtato fortiĝas, ĝi kirasiĝas kiel giganta testudo, nevidebla monstro, angoron disdonanta, kiu, dum pigre iradas, ĉion piedpremas. Ĉion. Ankaŭ tie kie oni ne kredas, ĉe la malebleco. Supervivanta.

Mi eliris tra la inferaj vojoj por anonci...

.....

Ĉu vi tralegis? Ne, ankoraŭ ne alvenis mia vico. Kial oni ne legigas ĝin laŭvoĉe por ĉiuj, dum la legada tempo? Ankoraŭ ne falis Enver Hoxha, ne, ke oni anstatuigi liajn verkojn per la ceteraj... Tio estas ja la plej bona novaĵo enirinta en la prizono, diris Bardh Kupi. Kio? La romano... Ni estis farante ir-revenojn en la supra korto. La tero estis frostigita. Ĝi krakadis. Ankaŭ la dormo ne estis la nia, oni forprenis de ni la sonĝon. Ni devus timi ankaŭ tiujn, diris al mi Astrit Xhaferri. Devas nepre enfali la reĝimo, insistis Naim Staravecka pluen. Aŭ oni enprizonigos Ismail Kadare-n. La taso jam pleniĝis ankaŭ por li, bruspiregis Bajo. Devus oni dirinta al li... Ne zorgu, ĉar ili ne bezonas lin en la prizono, diris la verkisto Halil Laze. Lasu tion, ne malbonaŭguru, ĉar povas tion oni aŭdi kaj la parolo iras supren, en Tabir Saraj, diris Maks. La romano estas mizerego kaj neniu povas efiki al ili, diris la alia Maks. Kontraŭe, ili estas...

Vin tio ŝajnas tiel, al 5-6 personoj legantaj, ĉar vi ne havas alion por fari, sed la mondo ne estas renversita jam. Ĝi ne renverseblas per libroj, diris Shkodrani. Renverseblas, renverseblas, renverseblas, diris mi. Tiel kondukis ĉiam li, koleris Zyhdi Morava, oni ne komprenis pro kio. Foje karesas kaj poste frapas, rompas la makzelojn kiel rabiiginta boksisto. Poste kuracas li mem. Por denove rompu. Ĉu oni povas kredi al li? Li eskapas. Vi ne povas fari ion al li. Ĉi tie diras ke ne temas pri vi, esktere diras, jes ja. Vi ne komprenas, tiun romanon permesas mem la ŝtato, diris Ron, por ke ni vidu kiom forta ĝi estas, eĉ en la sonĝoj ĝi eniras, vi ne povas faligi ĝin, malamikoj!

Ombrolumo. La limoj solviĝas. Kaj la strangaĵo estas ke al vi tio ŝajnas bona, al mi, ŝajnas malbona. Miaj silentaj pensoj timetis ellasi voĉon. Ne estis tiel la aliajn fojojn. Ni legas tutajn liajn skribaĵojn, denove diris Ron, oni ne povas kompreni kiam li sin ŝajnigas. Oni ekspektis tion. Ĉi tien li nepre alvenus. Estas freneziga Ismail Kadare ĉe la "La Oficisto de la Palaco de la Sonĝoj", kreu min, zorgiĝis envere Dine Dinia. Por li, ĉiam doloris la aliaj, homoj, libroj, objektoj. Tiom da agitacio kaj propagando kontraŭ Partio kaj ŝtato apenaŭ plenumis la tuta prizono kune, ne povis mi pacienci por diri. Kaj tion nun faras mem la ŝtato, junulo, rediris Robert Vullkani. Estas ĝi ja kafkeca romano, oni diras. Kiu tion diras? Kafkeca... kiel ripetaĵo aŭ novecaĵo?

Aŭskultu, mi rakontu ion alian, ĉar timas forgesi tion. Estas vere. Fronte la la apartamento de Kadare, en la alia palaco, la Ŝtata Sekureco estis instalinta tiajn subaŭskultilojn sofismigitajn, por dedukti kio estis dirite. Diurne. Oni deĵoras per tri turnoj ankoraŭ nun, mi kredas. Oni sin ŝanĝas ĉiujn ok horojn. Jes, jes, tion diris al mi la inĝeniero Farka, kiam li estis ĉi tie. Estas inventinta, li estis inventisto. Eĉ unun el tiuj li havis la sian, ankaŭ li inĝeniero. Mi ne scias kial li diris tion al mi, por teroro eble, diris Farka. Ni subaŭskultas ĉiun, eĉ la niajn, fingrosvingis li. Neniam fingrosvingis la inĝeniero Farka. Ne li, sed tiu rakontinta. Fabelaĵoj. Veraj fabelaĵoj...

...per tiu romano li venĝis ankaŭ por ni, diris Lekë Mirakaj. Kia bela venĝo, klarigis Luan Myftiu, ĝuste por la premio "Nobel". Tie vi staru, ĉesigis lin Kasëm Stafa. Definitive li montris kun kiu li estas, diris Esat Çoku. Eh, kun kiu, alfrontis lin Bajo. Kun Albanio. Necesas lin ĝi aŭ li amas ĝin?

Ĉu oni ne severe kritikis lin ankaŭ por la romano “La Vintro de la Granda Soleco”? kaj kial? Eh? Ĉu vi forgesis? La Partio kunvenis, ĝiaj kritikulaĉoj, kiuj kun la aŭtoro, devus plibonigi la romanon por si mem, tio estas la bruo, diris Nuredin Skrapari. Ĥruŝev estis malfermiĝante, Enver estis kondukante la landon al la abismo, en Azion, dum vi alibias. Kiu, ĉu mi? Ne vi, ne. Ĉu vi vidis kiel li mokas la renversitajn klasojn, nin? Tion vi nomas disidenco, ĉar al la aliaj oni ne permesas tion? Kaj poste oni tradukis lin mem. Per enprizonuloj, per sklavoj. Jusuf Vrioni tradukis ĝin al la franca, la sama kiu tradukis ankaŭ Enver-on. Kaj eĉ la ties nomon oni ne surmetas. En la itala tradukis Kudret Kokoshi, li sciis Dante-n parkere, la tutan “Diinan Komedion” li recitis en la prizono.

Daaante... Haltis envere unu el la tradukintoj de Dante. Unu ministro demandis min: ... estas eldonita negativa romano por la Centra Komitato? Jes...

Nek la aŭtoro ne tiom gravas, kiom la nomo de la tradukisto por ĉi tiuj, estis dirante Eugen Merlika. La popolo havu intelektulojn kontraŭstarantajn. Kiun, la popolon?

La interparoloj, la komentoj, la kvereloj, la malaperigo de la libroj, la retrovo, la relegoj, la kopiado de la partoj, la disputoj ankaŭ en la vico, ĉe la ŝtuparo, en la manĝejo, subtere, la murmuroj ĉe la litoj, post la sonorado de la kampaneto por ekdormi, daŭris. Kiel mi povus sendi ĝin al la fratoj en la prizono de Burrel? Kiun? Tiun libron kiu... montras kiel oni bruligis la librojn. Mi trovos kelkiun por kopii ĝin. Mi donos 10 cigaredpakaĵetojn, 20, eĉ kun filtrilo. Kiel li volu. Tiom vi taksas tion?

Naturece, la informiĝo iris supren. La sekurecoficio devus fari sian relacion longan kaj detalan, tre sekretan, por la Palaco de la Songoj, tiel ŝajnis nun al mi la Ministrejo de la Internaj Aferoj kun la Centra Komitato de la Partio de la Laboro. Kion ni dirus tie, ke oni alportis min tiun libron, kiun mi disdonadis kaj kion diris? Kia decido estus entreprenota? Denove arestoj...

Ĉu vi vidas kiun helpas la romano pri la songoj?- koleretis Shemsi al mi. Kial vi prenis ĝin?

Mi legis en la ĵurnaloj ke oni estis okazintaj apartan kunvenon kaj “La Oficisto de la Palaco de la Songoj” estis kritikita. Kunveno kie mem Ramiz Alia¹¹, la vicdiktatoro, je la ĉeesto de la edzino de la diktatoro, de la Nigra Pantero, diris: “La Partio kaj la popolo levas vin en la Olimpo, sed, se vi ne restas fidela, ili ĵetos vin en la abismon”, Jen, tio sciigas la ĵurnalo! Tio estas malfermita minaco. Prizono, murdo! Murdo de la libroj.

Ne zorgu, nenio okazos, kiam vi ekscios tion, estos malfrue.

Eh, ĉi tiuj murdas ankaŭ tion kio ankoraŭ ne estas kribita. Tio estas terure. Sed ne tion kio nun estas skribata... Kaj li, la dua post la Granda Murdisto, vidu, kuraĝas kaj mencias Olimp-on, deziras ŝajniĝi sin sciulon, eĉ la lokon de la Dioj traktas kvazaŭ ĝi estis oficejo de la Centra Komitato. La krimuloj! La kanajloj! Jen, ili malpermesos la libron, por ke ĝi legiĝu kaj ni timu, kaj ĉu vi kredas al viaj stultaĵoj, frenezuloj. Tio estas ja organizita, estas apartaj direktorejoj, krom tiu IV, mia amiko. Kaj la komisaro, kial vagadis inter la enprizonuloj en la korto, kun la Sekureca oficiero, kiu ne parolis? Eh, ĉu oni venigis iun verkiston el Tirana? Forkaptis min la malespero. Denove enfalis mian kapon la plafono kune kun la ties ĉeftrabo. Sed oni ne povas enprizonigi Kadare-n, ne. estas ja li tiom granda nun, kiom eĉ la prizono apenaŭ povas ampleksi, diris mi. La prizono ampleksas la tutan Albanion, rediris Bajo, sed li venu, estus bone por li. Ne, ni bezonas liajn verkojn, mi kontraŭstaris. Sed tio estas bona ankaŭ por la verko, insistis li, por la tuta beletro bonas la prizono. Kiel, ne povante skribi? Ne

¹¹ Komunista diktatoro dum la jaroj 1985-1992

havante, estas pli bone ol havante malbone, mi aŭdis deinterne ion kvazaŭ krion. Ni bezonas nun, stari, diris mi, konfuzita. Kiel la prizona supo... Ne konfondu ĝin al la prizona supo, vidu, mi petas, trans tiu telero. Mi ne havas alian, diris. Nu, per tiome oni estas lasinta nin. Prizona supo, bone vi diris, sed oni ne starigas monumenton al la supo!... Vin gardu de tiu leganta nur unu libron! Sed vi estas mahohistoj! Maŭistoj, diru. Mi kredas pli multe al Kadare ol al la tuta Militista Akademio aŭ al iu ajn alia havanta la Partio. Mi amas kaj doloras por li. Tio estas io alia, ĉar vi sopiris ankaŭ pri la esplorenketisto. Ankaŭ mi kredas, por kompreni la kontraŭon. Verkisto de la socialista realismo estas ia taĉmento. Ju pli elstara, des pli danĝera...

La vizaĝoj de la enprizonuloj nun ŝajnis kun la bluiĝintaj signoj de iu masakro. Kun fendetoj surfrunte, glavaj stigmatoj, kuglospuroj surbrake. La kondamna taĉmento... La mitraloj sur la gardolokoj, trans la ĉirkaŭigo, tiel senvestitaj disde la verdaj kovraĵoj, pretaj por boji, kiel ĉiam similis al feraj cerberoj sub la korvoj alproksimiĝintaj malalte ankaŭ sur la ŝultroj de la frostigitaj soldatoj.